

Sennacieca REVUO



Sennacieca Asocio Tutmonda

N°150 decembro 2022



Marksismo usonigita

Antaŭvido de Edward Bellamy

Postlasitaj leteroj

Japanaj E-memoraĵoj

Originala novelo

Fororienta eksterordinaro

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS- KAJ AGADKAPABLO!

Lafontenaj fabeloj

Siraj friponaĵoj

Ukrainaj artistoj

Personaj dummilitaj engaĝiĝoj

Supplément au numéro 1407-1410 de Sennaciulo
Sept.-Dec. 2022



Sennacieca **Revuo** estas eldonaĵo de SAT

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta - FR-75020 Paris, Francio

Telefono: (+33) 09 53 50 99 58

kontakto@satesperanto.org / www.satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n-ro 1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064 / BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markov

Vic-Prezidanto: Pedro Sanz

Sekretario: Brandon Sowers

Kasisto: Bruno Henry

Vic-kasisto : Alexandra Paz

Ceteraj membroj: Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone

Reprezentantoj de SAT en la LEA-Komitato: Saioa Escobar, Paz

La skipo de S.**R.**

Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markov

Enpaĝigantoj kaj redaktantoj: Marcelo Redulez kaj Sergo Sir'

Ceteraj redaktantoj: José Antonio del Barrio, Hori Jasuo, Gary Mickle, Mijazava Naotaroo, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Pedro Sanz, Rikardo Schneller, Franciska Toubale.

Kontribuojn por ambaŭ gazetoj

-Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo-
elektronike sendu al

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro
132-134 avenue Vincent Auriol
FR-75013 Paris
Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Publikigo de artikolo ne signifas, ke ĉiuj redaktoskipanoj konsentas pri ĝia enhavo.

Ricevintajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: Ulzama Digital

Polígono Industrial Arteta Calle 33 - ES-31620 HUARTE (Navarra) - Espagne

Parution annuelle - *aperas ĉiujare* - Le directeur de publication : Guy Cavalier

Abonnement annuel - Jara abono : Francio 39 eŭroj

Autres pays: *Aliaj landoj*: vidu la detalojn en la kotiztabelo presita en Sennaciulo.

Dépôt légal à la date de parution: n-ro CPPAP 0525 G 86567

Suppl. au n° 09-12 2022 (1407-1410) septembre à décembre 2022 de Sennaciulo

Numéro ISSN: 1248-2293.

N°150 decembro 2022

ENHAVO

04

Enkonduko

La redaktoskipo

05

Marksismo usonigita

Merrit Abrash

10

Kompendio pri nacia ekonomio

Kurt Tucholski

13

Leteroj konservitaj de Ŝimazaki Toŝikazu

Hori Jasuo

22

Friponaj Lafontenaj fabeloj

Sergo Sir'

30

La dekok jaroj de sortodivenisto Miĥajl Miĥajloviĉ

Mijazava Naotaroo

36

Nigr' kaj Blus'

Serço Sir'

39

Ukrainaj artistoj dum milito

Marcelo Redulez

49

Katja Gritseva, revoluciema

Marcelo Redulez



ENKONDUKA NOTO

Karaj legantoj

Jen la numero 150 de Sennacieca Revuo. Ĝi ekas per analizo de 19-jarcenta verko de Bellamy, Rigardante malantaŭen, kiu fakte aperis esperantlingve en 1937, antaŭ ol esti reeldonita en 2005. Ankaŭ lia « Parabolo pri la cisterno » aperis esperantlingve ĉe SAT-broŝurservo. Daŭre pri ekonomio, venas poste traduko de satiro el la granda depresio de 1931, de Kurt Tucholsky. Plian perspektivon pri tiu epoko, el alia mondoparto, donas leteroj kolektitaj de la esperantisto Ŝimazaki Toŝikazu. Ni poste saltas kelkajn jarcentojn pli for en la tempo, kun friponaj fabeloj de Lafonteno, ne konfuzendaj kun liaj pli konataj fabloj ! Sed tuj poste, jen reveno al la nuno, ĉar k-do Naoto ebligas al ni malkovri la verkon, per kiu li ĵus elpaŝis la beletran terenon. Post beletro venas muziko, kun artikolo pri rasismo en ĵazo, kompletige al la pasintjara pri Ella Fitzgerald. Fine venas kolekto de kontribuoj rilate al nunaj ukrainaj artistoj : la kantisto Andryj Khlyvnyuk, famiganto de la popolkanto « Hej ! Surherbeje la viburno ruĝa ! » sur la ukraina batalfronto, la grafikistino, poetino kaj socialista aktivulino Katja Gritseva, kaj la kantistino Katja Polishchuk. Ĉi tiujn kontribuojn ordigis kaj kompletigis per diversaj klarigoj Marcelo Redulez, kun helpo de Katja Gradzion. Dum la korektado de la revuo, la enmeto de anarkiisma ruĝ-nigra bendo en la paĝoj 48-49 ilustre al la artikolo pri Katja Gritseva vekis demandon, ĉu ĝi ne riskas esti konfuzita kun la simbolo de la naciismaj admirantoj de Stepan Bandera, aludita pli poste en la dosiero (p. 65). Fine estis decidite konservi ĝin kaj ni kalkulas kun via komprenemo, ke temas pri malsamaj aferoj.

Materialo jam estas prilaborata por la venonta eldono de Sennacieca Revuo. Vi estas bonvenaj proponi ion, kaj faru tion senatende, ĉar por rekapti la malfruon de la aperritmo necesos ne atendi tutan jaron por kunmeti la venontan numeron.

*Agrablan kaj verko-instigan legadon deziras al vi
La redaktoskipo*

Merritt Abrash

Tradukita de
Matthew Weitendorff
kun permeso de la aŭtoro [1]



Marksismo Usonigita

En sia utopia verko
«*Rigardante malantaŭen*»,
la verkisto kaj ĵurnalisto Edward Bellamy
antaŭvidis ankaŭ politikon de egalaj
enspezoj kaj eliminon de sociaj klasoj

Unu verkisto de la 19a jarcento, aktiva ankaŭ en ĵurnalismo, kreis eksterordinaran utopian vizion, en kiu ĉiuj produktivaj instalaĵoj estis posedataj de la socio. Male al la granda plimulto de pli fruaj utopiaj proponoj, ĉi tiu specife aplikoblis al plene disvolvitaj industriaj teknologioj kaj organizado, kiuj, sub centralizita racia direktado por uzo anstataŭ profito, laŭsupoze kapablus havigi al ĉiuj homoj la materialajn necesaĵojn de bona vivo. Ĉi tiu verkisto antaŭvidis ankaŭ politikon de egalaj enspezoj kaj eliminon de sociaj klasoj. Lia vizio disvastiĝis rapide kaj fariĝis parto de la heredaĵo de potencaj ideoj de la okcidenta civilizacio.

La resumo ĝis ĉi tie klare taŭgas pri **Edward Bellamy** – kaj same tiel klare pri **Karl Marx**. Sed kiam ni antaŭeniras al la akcepto de iliaj doktrinoj, akuta diverĝo aperas. Marx estis furioze atakita, fortrenita el unu lando post la alia, kaj lia nomo fariĝis inter estimindaj homoj vorteto signanta socian kaj ekonomian fiagadon. Bellamy, aliflanke,

iĝis honorata civitano, kaj lia formulo por utopio estis akceptita eĉ de liaj kontraŭuloj kiel afero ne ekster la limoj de legitima usona politika diskurso.

Kio eksplikas la profundan kontraston en la usona reago al vizioj, kiuj kundividis simile radikalajn instituciajn trajtojn? Al la individuisma usona menso, la regimenteca industria armeo de Bellamy devus ŝajni pli indigniga ol la marksisma forvelko de la ŝtato. Sed lia utopia verko ***Rigardante malantaŭen*** trovis egale porpledantojn en fabrikoj, bienoj, kolegioj, kaj Nov-Angliaj salonoj. Kial ĝi povus elvoki respektplenan atenton de tiaj malsamaj elementoj de civitanaro notinde imuna, tiam kiel nun, al ekonomiaj aŭ politikaj programoj, kiuj vagas tre malproksime for de la mezo de la vojo? [2]

Evidente, Bellamy sukcesis malsovaĝigi marksismajn celojn kaj rimedojn tiel, ke ili ŝajnis kongruaj kun usonaj idealoj kaj tradicioj – neniu malsignifa heroaĵo. Eĉ

pli rimarkinde estas, ke li ŝajne plenumis tion pli-malpli hazarde. Li entute ne celis malsovaĝigi la marksisman teorion, nek fari specifajn timigajn elementojn nedolorigaj, pro la bona kialo, ke li ne estis studanto de marksismo. Surpriza afero estas, ke li probable eĉ ne legis Marx antaŭ la tempo, kiam li verkis **Rigardante malantaŭen**.

Kvankam ekzistas nenia certa pruvo pri ĉi tiu aserto, ni havas la propran ateston de Bellamy, ke

«mi neniam estis en ajna senco studanto de socialisma literaturo, nek konis pli multajn el la diversaj socialismaj projektoj ol iu ajn ĵurnalleganto povus». [3]

Ĉi tiu malpretendo ricevas subtenon (kvankam je multe pli frua dato) el unu linio en lia recenzo pri **The Communistic Societies of the United States** de Charles Nordhoff:

<https://edwardbellamyhouse.org>



«<< La vortoj 'socialisto' kaj 'komunisto' trafas malagrabile usonajn orelojn, ĉar ĝenerale konsiderataj kvazaŭ implicantaj ateismajn kaj superstiĉajn kredojn kaj praktikojn kaj nenormalajn seksajn rilatojn.» [4] (La hiper-viktoriano Edith Leete vekas miron de la nunaj legantoj pri iuj ajn seksaj rilatoj en Bostono de 2000, kie la agado de la verko supozeble okazas, eĉ sen konsideri la eksternormajn.) Nenio en la verkoj de Bellamy ĝis **Rigardante malantaŭen** indikas konscion pri la

subtileco, amplekso, kaj intelekta rigoro de la scienca socialismo de Marx. La longa ĉapitro pri **Rigardante malantaŭen** en la antaŭnelonge aperinta superrigardo pri utopioj de Krishan Kumar konkludas, ke Bellamy ne studis Marx, antaŭ ol verki la libron, sed faris tion poste. [5] Tio eble estas la plej kredebla scenaro. Tio signifas, tamen, ke Bellamy, per koincido aŭ intuo, sukcesis malarmi ĉiujn incendiajn trajtojn (vidatajn de usonaj okuloj) de marksismo sen ia klara ideo pri tio, kio estas marksismo. Se Bellamy estus sperta pri Marx kaj intence komencus reformuli ĉiun minacan elementon de marksismo en formo akceptebla al usonaj sentivecoj, estas apenaŭ io ajn, kiel oni klarigos sube, kion li verkus alimaniere en **Rigardante malantaŭen**.

O ni devas rimarki unue, tamen, ke antaŭpripensu ŝajnas probable ĉe la eksterordinara zorgado por neniel ajn bildigi la popolamasajn aŭ kolektivajn aspektojn de Bostono en 2000. Legantoj tiel absorbiĝas en la utopia substanco de tio, kion oni diras al la ĉefrolulo Julian West, ke ili ne rimarkas la preskaŭan foreston de rekta bildigado pri la funkcia socio. La miriga fakto estas, ke kiom **Rigardante malantaŭen** rakontas historion, neniuj homoj ekzistas en Bostono krom la Leete-oj; la solaj esceptoj estas komerca vendisto kaj kelnero, de kiuj neniuj havas eĉ unu linion da dialogo aŭ estas alie individuigita. La Leete-oj ŝajnas havi neniujn parencojn kaj neniujn amikojn. Neniu ajn vizitas ilin, kvankam ili havas la plej ekscitan allogaĵon en la urbo ĉe sia loĝspaco. Kiam ili marŝas al la manĝejo – aŭ kiam Edith kaj Julian iras al la vestaŭvendejo – ili ne renkontas konatojn. La tuta romano okazas, post kiam Julian ek troviĝas en la jaro 2000, en urbo kiu estas, por romanaj celoj, neloĝata, krom de la tri Leete-oj. Bellamy penas por konservi ĉi tiun izoliĝon. Oni venigas Julianon al lernejo kaj magazeno, sed pri la antaŭa li avertas: «Mi ne priskribos detale, kion mi vidis en la lernejoj en tiu tago», kaj komentas nur pri la instruado pri fizika kulturo. [6] La vizito al la magazeno ricevas unu alineon, en kiu Julian donas analogion anstataŭ priskribo (Bellamy, 127) – tipe, la leganto ricevas pliajn informojn pri la temo (ne multajn

ĉiukaze) el tio, kion la Leete-oj diras al li aliloke, ol de tio, kion li observas surloke.

Krome, la telefona dissendo-sistemo, kiun Bellamy celebras, subfosis du gravajn deknaŭjarcentajn formojn de publika socia interagado: ŝajne neniu iras al koncertoj kaj malmultaj al preĝejo (la tre populara s-ro Barton, oni rimarku, predikas *nur* telefone). «Hejme ni havas komforton, sed la belegeco de nia vivo estas, sur ĝia socia flanko, tiu, kiun ni partoprenas kun niaj kunuloj», diras doktoro Leete (Bellamy, 165), sed nenio en la romano ilustras ĉi tion. Fakte, estas la komforto de hejmo, kiu determinas la tonon de la nova socio por Julian. Kaj tute burĝa hejmo ĝi estas: patro laboras, patrino administras la dommastrumon kun la helpo de publikaj servoj kaj (se necese) dungita helpo, kaj filinoj butikumas. Ĉu samniveligo de la socio? Ĉu komuna posedado? Ĉu diktatoreco de la proletaro? Ĉu libera amo? Malmultaj el la proletaj atributoj – ĉu faktaj ĉu fantaziaj – de la komunismo de Marx ekloĝas en ĉi tiuj benignaj paĝoj. La laboristaj klasoj ne nur ne regas en *Rigardante malantaŭen*, sed ili estas rangitaj eĉ pli for el la rigardo de la leganto-samtempulo de Bellamy, ol de iliaj vivantaj samspeculoj de 1888. Gravas, ke la plej granda proksimiĝo de Julian al proletoj estas ĉe la magazeno, kie la laboro konsistas el mendoplenumado kaj distribuado anstataŭ produktado. La solaj scenoj kun multaj homoj en la romano – fakte, preskaŭ la solaj kun pli ol kvin – estas en la koŝmaro pri Bostono de Julian. Ĉi tie Bellamy klare portretas «amasojn» kaj «svarmojn» – kia ĝenia inversigo, ke estas *komunismo*, kiu

malnecesigos amasan agadon kaj provizos al la individuo la fizikan kaj socian spacon necesan por la bona vivo! Tio karakterizas la manieron, per kiu *Rigardante malantaŭen* trankviligas tutan gamon da timoj, kiuj atakis la plej multajn usonanojn (kaj plejparte ankoraŭ atakas) ĉe la nura mencio de marksismo.


Ekzemple, la fundamenta supozo pri nesolvebla klasa konflikto estas evitita per la feliĉa certigo, ke oni povas «ĉerpi dekoble pli da profito el homoj, unuigante kun ili, ol konfliktante kun ili» (Bellamy, 91). Ĉi tio, doktoro Leete

klarigas, ne estis perceptita dum la deknaŭ jarcento, ĉar individuismo mallarĝigis la vidkampon. Post kiam oni rekonas la principon de maksimuma efikeco per kunlaboro, la deziro pri gajno fariĝas kialo por akordo, ne por konflikto, kaj la hierarkia organizo de la industria armeo estas senigita je klasaj atributoj.

La eksproprieto je kapitalo, kiu timtremigis eĉ multajn usonanojn, kiuj ne havis multon, je kio eksproprieti ilin, fariĝas benigna dumaniero: la grandaj kapitalistoj, en la formo de kompanioj, libervole

akceptis la novajn aranĝojn, kaj la aranĝoj mem povis esprimiĝi laŭ la kutima bildo de kompanioj kaj akciuloj, trankvilige analogigita al nacio kaj civitanoj. Finfine, kapitanoj de industrioj kaj generaloj de industriaj armeanoj havas similajn estrajn trajtojn, kaj estas prave konjekti, ke la lastaj originas prenite el la antaŭaj.

La timo pri stagnado rezultanta el la elimino de monaj instigiloj estas kontraŭbatalata per diversaj alternativaj allogiloj. Publika estimo, pli larĝa kariera elekteleco, prestiĝaj premioj



kaj, plej efike, la fakto ke «niaj virinoj sidigas en alta loko kiel juĝistoj de la raso kaj rezervas sin por rekompenci la venkantojn», instigas elstarecon en la industria armeo (Bellamy, 180). Fakte, tiurilate Bellamy ruze alvokis pli bonajn instinktojn ol Marx, asertante, ke la homoj tiom kapablas respondi al konsideroj de honoro kaj fiero kiom al tiuj de materiala memutilo aŭ historia neevitebleco.

Unu el la plej sukcesaj modifoj de Bellamy en tio, kio laŭ populara supozo estas marksisma doktrino, rilatas al la afero de unuformeco. Satiroj pri marksismo (kaj fakte ankaŭ *Rigardante malantaŭen*) multe sin okupas pri la teda sameco, kiu descendas sur socion kiel konsekvenco de tio, ke ununura senkonkurenca provizanto plenumas la bezonojn de loĝantaro, al kiu mankas diferencigoj de enspezoj, edukado kaj baza vidpunkto. Bellamy tamen nete finas ĉi tion, allasante, ke ĉiu homo porciigu enspezojn laŭ propra elekto, tiel ke egalaj enspezoj ne bezonas signifi unuformajn konsummanierojn. Plue, novaj produktoj kaj agadoj povas esti enkondukitaj de grupoj de homoj, kiuj kunmetas siajn enspezojn por ĉiu ajn komuna celo, kiu plaĉas al ili, eĉ ĝis inkluzive la fondon de gazeto aŭ ajntendenca religia kongregacio. *Rigardante malantaŭen* multe elstarigas la plenumaĵojn de siaj civitanoj, kaj prave; ĉi tio estis unu el la plej brilaj artifikoj de Bellamy por sentigi usonanojn komfortaj rilate celojn, kiujn oni pasie kondamnas, kiam ĉampionas ilin marksistoj. Eĉ la reglamentado nedisigebla de la industria armeo estas malpezigita per la rava perspektivo de kompleta liberigo en la aĝo de kvardek kvin jaroj de la neceso vivteni sin. Se Bellamy kaj Marx kandidatus unu kontraŭ la alia por publika ofico, Karl havus problemon por superi tiun. («Al ĉiu laŭ ties bezonoj» estas sufiĉe seka kompare kun – se elpensi Bellamy-anan sloganon – io kiel «Plene viva post kvardek-kvin!»).

Sed, kompreneble, marksismo estis malbonfama malpli pro siaj viziecaj instituciaj trajtoj kaj sociaj politikoj, ol pro sia insistado pri materiismo, determinismo kaj politika revolucio. Materiismo akiras sian punbatadon en la prediko de sinjoro Barton, kiu finiĝas per elvokado de io pli

simila al la kulmina stelinfano en 2001, verkita de Arthur Clarke. «Ĉar dumaniera estas la reveno de la homo al Dio 'kiu estas nia hejmo', la reveno de la individuo per la morto, kaj la reveno de la homaro per plenumo de la evolucio, kiam la dia sekreto kaŝita en la ĝermo estos perfekte malvolvita. La longa kaj laciga vintro de la homaro finiĝis. Ĝia somero komenciĝis. La homaro trankrevigis la krizalidon. La ĉielo estas antaŭ ĝi» (Bellamy, 194). Kiam Friedrich Engels skribis pri la marksisma utopio: «Ĝi estas la supreniro de la homo el la regno de la neceso al la regno de la libereco», [7] li kreis netan sekularan sloganon, sed ne tian, kiu trankviligus la timojn de bonmoraj civitanoj, kiuj egaligas materiismon kun ateismo. Determinismon sufosas la deklaro de doktoro Leete, ke la sistemo, sub kiu la homaro vivas en 2000, estas «tute libervola, logika rezulto de la funkciado de la homa naturo sub raciaj kondiĉoj» (Bellamy, 89). «Logika rezulto» povus esti ia determinismo, sed la rolo de la racio estas pli decida ol en la kazo de historia neevitebleco. Bellamy prezentas la avacon en utopion kiel rezulton de inteligenta homa elekto farita sub la gvido de bonvola, sed praktika etiko – tute pli modera kaj pli flata ol la rigida senpersoneco implicita de historia determinismo.

Tiuj atributoj de elekto kaj racio ankaŭ ekzorcigas, en la rakonto de doktoro Leete, la plej rektan malallogaĵon por deknaŭjarcentaj usonanoj en marksismo: la necesan renverson de la ŝtato. Bellamy forpuŝas de si la tutan demandon de revolucia perforto kun senspiriga senzorgeco. Tuj kiam Julian West alvokas la fantomon de la «granda sangoverŝado kaj teruraj konvulsioj», kiuj devis okazi dum la masiva transiro al la mondo de 2000, jam doktoro Leete, sendube senzorge forfrapante la cindron de sia cigaro, certigas lin, ke okazis «absolute neniu perforto». Ĉiuj – popolamasoj kaj kompanioj egale – komprenis, ke venis la tempo por la granda ŝanĝo; «ne pli eblis kontraŭstari ĝin per forto ol per argumentado». La cetero de lia eta parolado – la sola fojo, kiam temas pri la reala ŝanĝo al utopio – estas plena de frazoj priskribantaj skvamojn, kiuj falas de okuloj: «ili ekkomprenis», «nun estis devigitaj rekoni», «estis ekrekonita kiel aksiomo» (Bellamy, 54). La nova socia aranĝo, kiel oni komprenas, ne estis

rezistita, sed bonvenigita de ĉiuj flankoj kiel, se io ajn, tro malfruiginta. Nenia minaco al juro kaj ordo en ĉi tiu revolucio!

Tiamaniere oni formulis ĉiujn ĉefajn aspektojn de marksismo, kiuj verŝajne kaŭzus malracian antipation, laŭ akcepteblaj usonaj manieroj – «arte» formulite, oni dirus, se ne la plimulto da pruvoj evidentigus, ke Bellamy eĉ ne konsciis, ke li faras tion. Do kio klarigas la eksterordinaran lerton, per kiu li traktas la radikalaj temojn, kiujn li kundividis kun Marx? La respondo certe estas, ke la du viroj laboris en profunde malsamaj tradicioj, germana filozofia sistemigado en la kazo de Marx, usona pragmatismo en la kazo de Bellamy.

Marx prezentis sian utopian estontecon kiel la kulminon de neevitebla historia progresado propulsata de

kompleksaj interagoj inter menso kaj materio. La utopio de Bellamy estas simple la rezulto de tio, ke racia socio forigas misfunkciadojn per la logika apliko de ekzistantaj organizaj teknikoj, sub la premiso de etika kodo, kiu jam ordonis akordiĝadon. Marksismo estis, se temas pri ĝia ebla akceptiĝo en Usono, enmarĉiginta en abstrakta teoriumado promesanta universalan socian renverson en la praktiko; *Rigardante malantaŭen*, kontraste, estas feliĉe libera de teoria enkadrigo. Ĝia komunismo povis asimiliĝi al usonaj idealoj kaj tradicioj, ĉar ĝi estis prezentita kiel platformo de pragmata reformo, surbaze de kiu oni agus laŭ klera interakordo. La kronanta peniktuŝo en ĝia allogo, oni konjektas, konsistis en tio, ke ĝi sonis, kvazaŭ ĝi «funkcios» – ne «devas» aŭ «devus» funkcii, sed *funkcios*. Kun tio, la senintenca usonigado de marksismo fare de Bellamy estis kompleta.



Notoj

[1] Artikolo originale publikigita en *Extrapolation*, Septembro 1989, kaj adaptita en: Abrash, Merritt. 1991. «Looking Backward: Marxism Americanized.» *Utopian Studies* 3 (4): 6–9.

[2] Estas, oni devas rimarki, foje tendenco ĉe studentoj de *Rigardante malantaŭen* malemfazi ĝian radikalismon. Ĉi tio estas kazo de legado malantaŭen de efiko al kaŭzo: se la libro ne sukcesis inspiri la malmoderan malamikecon, kiun Marx inspiris – jen la vojo de ĉi tiu pensmaniero – ĝi devas esti ne tiom radikala. Tamen, laŭ iuj ajn vaste validaj ekonomikaj aŭ politikaj normoj de la 19a jarcento en Usono, la grandioza projekto de Bellamy estis, konsiderate aparte de lia formo de prezentado kaj elekto de argumentoj (pri kio temas ĉi tiu referaĵo), radikala en ekstrema grado.

[3] Arthur E. Morgan, *Edward Bellamy* (New York: Columbia University Press, 1944), 372.

[4] samloke, 371.

[5] Krishan Kumar, *Utopia and Anti-Utopia in Modern Times* (Oxford: Basil Blackwell, 1987), 144

[6] Edward Bellamy, *Looking Backward* (New York: North American Library, 1960), 152.

[7] Friedrich Engels, «Socialism: Utopian and Scientific», en Karl Marx kaj Friedrich Engels, *Selected Works*, Vol. 2 (Moskvo: Foreign Languages Publishing House, 1958), 153.

Kurt Tucholsky

Tradukita de
Riŝo (31227)

Kompendio pri nacia ekonomio

*Satiro el la jaro 1931, tempo de la
Granda Depresio en la 20-a jarcento.*

«Lingvo estas armilo, tenu ĝin akra»

K. T.,
verkisto, kritikisto,
kontraŭulo de naciismo kaj militismo



Vikipedio - Sonja Thomassen

Kurt Tucholsky,
Parizo 1928

Nacia ekonomio estas, kiam la homoj miras, kial ili ne plu havas monon. Tio havas plurajn kaŭzojn, la plej subtilaj estas la sciencaj kaŭzoj, sed tiuj povas esti forigitaj per leĝoj pri nacia kriza stato.

Pri la malnova nacia ekonomio oni povas nur ridi kaj ni povas ignori ĝin. Ĝi regis de 750 antaŭ Kristo ĝis la jaro 1 post Markso. De tiam la problemo estas tute solvita: ja la homoj daŭre ne havas monon, sed ili scias almenaŭ kial.

La bazo de ĉiu nacia ekonomio estas la tiel nomata «mono».

Mono estas nek paga, nek interŝanĝa rimedo, ankaŭ ne estas fikcio, sed antaŭ ĉio ne estas mono. Per mono oni povas aĉeti varojn, ĉar ĝi estas mono, do per ĝi oni povas aĉeti varojn, ĉar ĝi estas mono. Sed tiu ĉi teorio intertempe estis forlasita. De kie la mono venas, estas nekonate. Ĝi ĉeestas aŭ forestas – plej ofte forestas. La cirkulanta papermono estas garantiata de la ŝtato; tio okazas tiamaniere, ke ĉiu posedanto de papermono povas iri al la imperia banko kaj tie postuli oron interŝanĝe. Li tion ja povas. La superaj

bankoficistoj estas leĝe devigataj porti orajn plombaĵojn, kiuj garantias por la papermono. Tion oni nomas or-kovro.

La bonstato de iu lando baziĝas sur ĝia aktiva kaj pasiva komerca bilanco, sur la internaj kaj eksteraj pruntoj kaj ankaŭ sur la diferenco inter la ĝiro de la aĝia trato kaj la intereza normo de la lombardaj kreditoj; dum pluva tempo tio inversiĝas. Ĉiumatene en la ŝtataj bankoj oni ludas per ĵetkuboj por difini la tiel nomatan «diskontan procentaĵon»; lastatempe la germanoj sukcesis atingi per 3 kuboj 20 procentojn.

Koncerne la mondan ekonomion, ĝi estas interplektita.

Kiam la varo foriras de la entreprenisto pere de vendado, ĝi nenion plu valoras, sed estas varodifekto. Anstataŭe la entreprenisto havas la monon nomatan plusvaloro, malgraŭ ke ĝi ĉiam malpli valoras. Se entreprenisto enuiĝas, tiam li vokas la aliajn kaj tiam ili formas truston, tio signifas, ili devigas sin, neniakaze produkti pli ol ili povas produkti, kaj ne vendi siajn varojn sub la kosto de fabrikado. Ke la laboristo ricevu por sia laboro ankaŭ salajron, estas teorio, kiu hodiaŭ ĝenerale estas forlasita.

Gravan rolon en la negoco ludas eksportado. Eksporto estas, se aliaj aĉetitoj, kion ni ne povas mem aĉeti; krome estas nepatriota ago aĉeti fremdajn varojn, tial la eksterlando devas konsumi enlandajn, tio signifas germanajn varojn, ĉar aliakeze ni ne estas konkurenckapablaj. Se la eksporto okazas inverse, ĝi nomiĝas importado, kiu en pluralo signifas riproĉojn. Ĉar malmultekosta tritiko estas nesana kaj ne tiom digestebla kiom multekosta sekalo, ni havas la importprotektan doganon, kiu protektas la doganon kaj ankaŭ la germanan agrikulturon. La germana agrikulturo loĝas de dudek kvin jaroj rande de abismo kaj tie fartas sufiĉe bone. Ĝi havas ŝuldojn, ĉar la peza industrio malbonfartas kaj la agrikulturo tro multe forprenas de ĝi. Tion oni nomas ekvilibro de intereso. De ambaŭ institucioj estas postulataj altaj impostoj kaj la konsumanto devas pagi ilin.

Ĉiu ekonomio baziĝas sur la kredit-sistemo, tio estas sur la erara supozo, ke la alia redonos la pruntitan monon. Se li ne faras tion, tiam okazas «subtena agado», kiu ebligas al ĉiuj bonajn gajnojn, escepte por la ŝtato. Tiam bankroton oni ekkonas, kiam la loĝantaro estas invitata havi konfidon. Cetere tiam ĝi havas ja plej ofte plu nenion.

Kiam la entreprenistoj translokas ĉiun monon al eksterlando, oni nomas tion la seriozeco de la situacio. Bonordaj ŝtatoj facile elturniĝas en tia situacio; tio malsamas por rabistaj ŝtatoj, kie aro da rabistoj elsuĉas la loĝantojn.

Ankaŭ la akciaj societoj estas grava parto de la nacia ekonomio. La akciulo havas du gravajn rajtojn: li estas tiu, kiu donas la monon, kaj dum la ĝenerala asembleo li rajtas esti en opozicio kaj protokoligi ion, el kio la estraro faros al si la tiel nomatan sabaton. La akciaj societoj estas nemalhaveblaj por la



Vikipedio - Adam63, perspektive modifita

ekonomia vivo: ili produktas la privilegiajn akciojn kaj la postenojn de la kontrolkonsilio. Ĉar ĉiu akcia societo havas kontrolkonsilion, kiu konsilas pri tio, kion ĝi efektive devus kontroli. La akcia societo garantias la akuratajn pagojn de la tantiemoj al la kontrolkonsilio. La pretekstoj, per kiuj oni diras, kial la akcia societo ne povas pagi impostojn, kunmetiĝas en tiel nomata «bilanco».

La ekonomio ne estus ekonomio, se ni ne havus la borson. La borso utilas al vico de ekscititaj sinjoroj por anstataŭi la ludklubon kaj la restoracion; la pli piaj iras krome en la sinagoton. La borso observas ĉiutage la situacion de la mondo: ĝi konformas sin laŭ la sagaco de la bankdirektoroj, kiuj tamen plej ofte vidas nur ĝis siaj nazpintoj, kio kelkfoje efektive estas longa distanco. Kiam la homoj kriegas eksterordinare multe en la borso, oni nomas tion: la borso estas firma. En tiu kazo la publiko venas la sekvontan tagon kaj engaĝiĝas, post kiam jam la plimulto estas forgajnita. Kiam la borso estas malfirma, tiam la publiko ĉiam ĉeestas. Tion oni nomas servo al la kliento. La borso plenumas ekonomian funkcion: sen la borso la blagoj disvastiĝus konsiderinde malpli rapide.


En ekonomio ekzistas ankoraŭ etaj dungitoj kaj laboristoj, sed la teorio jam delonge rezignis pri ili.

Resume oni povas diri: la nacia ekonomio estas la metafiziko de la pokerludanto.

Mi esperas, ke mi povis esti utila al vi per ĉi tiuj indikoj kaj aldonas, ke ili estas donataj kiel ĉiuj varoj, kontraktoj, pagoj, tratsubskriboj kaj ĉiuj aliaj komercaj devontigoj: do sen iu ajn garantio.

Noto:

Peter Panter, Theobald Tiger, inter aliaj, estis pseŭdonimoj de Kurt Tucholsky.



Traduko el Kurt Tucholsky,
«Panter, Tiger & Co».
Hamburgo, 1954.

La mondo de la 1930aj jaroj, kiun travivis esperantistoj

HORI Jasuo

Leteroj konservitaj de Ŝimazaki Toŝikazu

«Renkontiĝo» kun Ŝimazaki Toŝikazu

Iun tagon antaŭ kelkaj jaroj, viro de la sama aĝo kiel mi, sinjoro Ŝimazaki Taekazu, vizitis min. Li vidis la lokan ĵurnalon Ĵoomoo, en kiu mi aperis lige kun Esperanto. Li diris al mi, ke lia patro s-ro Ŝimazaki Toŝikazu estis esperantisto. Tiam li montris al mi bildkartojn el la mondo kolektitajn de lia patro. «Ŝimazaki Toŝikazu, ĉu?» Tiun nomon mi aŭdis.

Mi elprenis la libron *Esperanto-Movado de Gunma 1906-2010*, kompilitan de mi antaŭ dektri jaroj kaj serĉis la antaŭmilitajn paĝojn. Li aperis jene:

1. En la listo de membroj de Japano Esperanto-Instituto en 1929: Ŝimazaki Toŝikazu, ĉe Tojoŝima Curuĵiroo, 80 Hjakkenn-maĉi, Maebaŝi,
2. En 1937 Ŝimazaki Toŝikazu partoprenis la 25-an Japanan Esperanto-Kongreson (Tokio)
3. En 1939 Ŝimazaki Toŝikazu trapasis la altnivelan ekzamenon de Esperanto
4. En 1940 Ŝimazaki Toŝikazu partoprenis la 28-an Japanan Esperanto-Kongreson (Mijazaki).



Ŝimazaki Toŝikazu naskiĝis en la dua jaro de la epoko Taiŝoo (1913), la saman jaron kiel mia patro. Tamen, Toŝikazu estis vokita al la ĉina fronto, malsaniĝis tie kaj revenis al Japanio post la milito en 1946, sed mortis pro la malsano. Ankaŭ mia patro, naskiĝinte en la sama

jaro kiel s-ro Ŝimazaki, estis mobilizita al la ĉina fronto, sed pluvivis kaj vivis ĝis la aĝo de 91 jaroj. Kiam mi aŭdis, ke Taekazu kaj mi estas samaĝaj, mi estis profunde kortuŝita de ĉi tiu koincido. Mi rememoris, ke ankaŭ la fabelverkisto Niimi Nankiĉi naskiĝis en la sama jaro kiel Toŝikazu kaj mia patro. Niimi ne estis vokita al la milito pro sia malsaneco, kaj bedaŭrante, ke li ne povas kontribui al la patrujo, li mortis pro malsano antaŭ la fino de la milito.

La sortoj de tri viroj naskitaj en la sama jaro estis tiel malsamaj. Mi povis kreski kun mia patro, helpate de li, sed Taekazu perdis sian patron kaj kreskis en malfacilo. Eksciinte tion, mi sentis kvazaŭ mi havus respondecon iel revivigi lian patron en Esperantujo.

Ŝimazaki Toŝikazu, filo de komercisto de kruda silkaĵo en la urbo Fuĵioka en la gubernio Gunma, elektis Komercon Mezlernejon Maebaŝi por transpreni la komercon de sia familio. De Fuĵioka li ne povis viziti la lernejon, tial li loĝis ĉe s-ro Tojoŝima en la distrikto Hjakkenn-maĉi, Maebaŝi.

En la libro *Esperanto-Movado de Gunma 1906-2010* aperas artikolo pri Esperanto-kurso en 1929 kaj ankaŭ foto okaze de la lerneja kultura festivalo. En tiu foto aperas tri plenkreskuloj kaj ok lernantoj. Bedaŭrinde ne aperas la vizaĝo de Ŝimazaki Toŝikazu, sed Taekazu konjektas, ke tiun foton faris lia patro, ĉar li havis intereson pri fotado kaj posedis fotilon. Tiu foto temis pri

la kultura festivalo, kaj la Esperanto-klubo ekspoziciis bildkartojn, leterojn kaj Esperantaĵojn senditajn de eksterlando. En la lernejo Esperanto-movado estis vigla, kaj ankaŭ Ŝimazaki Toŝikazu partoprenis en la agado kaj kreskis kiel esperantisto.



Poŝtkartoj el Italio

S-ro Ŝimazaki montris al mi du albumojn, en kiuj estis kolektitaj poŝtkartoj. Mi malfermis ilin kaj trovis poŝtkarton de Mussolini. Estis ankaŭ poŝtkarto de «Unukolona Pagodo» en Hanojo kaj poŝtkarto de la kastelo de Hue, la ĉefurbo de la Nguyen-dinastio en Vjetnamio. Ili estis bildkartoj nigrablankaj, ĉar ili estis faritaj antaŭ 90 jaroj, sed mi povis imagi, kiel grandan impreson ili donis al la juna Ŝimazaki Toŝikazu, kiam li ricevis ilin.

Je unua ekrigardo, mi komprenis, ke ili estas valoraj, kaj proponis, ke ni faru libron pri ili kune. Mi ricevis la albumojn, tuj skanis ĉiujn poŝtkartojn kaj stokis ilin en mia komputilo. Surprize, tiuj bildkartoj kovris ĉiujn kontinentojn krom Afriko.

La plano estas publikigi ĉi tiujn, sed se mi simple metos ilin en la paĝojn kun Esperanta kaj japana tradukoj, la legantoj ofte ne bone komprenos, pri kio la bildoj temas, do mi komencis esplori pri la poŝtkartoj. Ekzemple, mi kompreneble scias, ke Mussolini estis la kreinto de faŝismo, sed mi scias malmulte pli ol tion. Nuntempe, danke al interreto, mi povas tuj trovi, kio li estis kaj kion li faris.

Se mi ankoraŭ havas problemojn, kiujn mi ne povas solvi en interreto, mi povas demandi esperantistojn en tiuj landoj. Ekzemple, mia itala amiko respondis min pri la enigmaj ciferoj en la poŝtkartoj de itala virino Sabine. Sur ŝiaj kartoj ĉiam estis skribitaj romiaj ciferoj kiel ekzemple XI post la jaro de la dato, kaj la itala amiko tuj respondis, «Ĉi tio estas la jaro en la faŝisma kalendaro. XI signifas la 11a jaro post la formado de la Faŝisma Partio en 1921. Ĉiuj decaj intelektuloj en tiu tempo skribis ĉi tion.» Tio estas mia nova scio kaj surprizo.

Vladimiro la 2^a de marto 1929
VII^a jaro

Poŝtkartoj el Vjetnamio

En la albumo estis poŝtkarto de malnova tradicia domo en Hanojo, Vjetnamio. Laŭ mia vjetnama amiko, Duong, kiu skribis ĉi tiun poŝtkarton, estis la unua homo, kiu lernis Esperanton en Vjetnamio, kaj tiu ĉi poŝtkarto estas historie grava. Kiam mi demandis, kia estas tiu domo nun, li diris: «La usona bombado dum la Vjetnama Milito bruligis tiun ĉi kvartalon, sekve nenie estas ĝia spuro



nun.» Poste mi vizitis Hanojon kaj hazarde iris al kafejo en tiu kvar-talo. Tiu amiko diris al mi fingre montrante: «Tie estis tiu domo.» Tie estis ordinara urbopejzaĝo de Hanojo netradicia.

Post pli da esploro pri ĉi tiu viro Duong, mi trovis francon nomatan Lucien A. Péraire. Naskiĝinta en Francio en 1905, li veturis per biciklo al Siberio, Japanio, Ĉinio kaj Vjetnamio, kaj post reveno al Francio li eldonis la libron *Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto*. En ĝi, li skribis, «La 24an de aŭgusto 1931 mi forlasas VINH, akompanate de du junaj skoltaj.» Rigardante la vivojn de la mizeruloj, li skribis, «se mia rakonto iomete kontribuis al tiu emancipiĝo, mia surtera vivo ne estis vana».

La plej frua dato de la poŝtkartoj de Duong estis la 30a de novembro 1932, kaj unu jaron kaj duonon pli frue Lucien estis en la sama urbo Vinh. Mi konkludis, ke Duong lernis Esperanton de Lucien. Poste mi trovis la foton de Duong, kio pli emociis min.



Letero de Sovetunio

Tuj post la revolucio Sovetunio adoptis politikon «uzado de Esperanto por informi la mondon pri la rezultoj de la revolucio» kaj rekomendis korespondadon de Esperanto, sed male la rezulto fariĝis kontraŭsovetunia propagando, ĉar la ricevintoj de leteroj de Sovetunio eksciis, ke ilia vivo estas pli bona ol tiu en Sovetunio.

Post la Granda Purigo de Stalino en 1937 Sovetunio malpermesis Esperanton, kaj multaj esperantistoj estis arestitaj, ekzilitaj kaj foje mortigitaj. Ŝimazaki Toŝikazu korespondadis dum tiu tempo, kiam Esperanto estis permesita. Ŝimazaki ricevis multajn poŝtkartojn el Sovetunio, kaj inter ili estis ankaŭ letero. Mi estis surprizita, ĝin malferminte. Estis eltondaĵoj de sovetiaj gazetartikoloj, en kiuj tiamaj potenculoj de la lando Stalino, Molotov, Kaganoviĉ kaj Pik portas la ĉerkon de Katajama Sen al la Kremlo Placo. Kio estis Katajama Sen?



Katajama, japano, estis gvidanto de la japana laborista movado kaj la internacia komunista movado. Establinte la Usonan Komunistan Partion kaj la Meksikan Komunistan Partion en Usono, li iris al Moskvo kaj estis elektita kiel altranga membro de la ĉefestraro de la Komunista Internacio en 1922. Li mortis en Moskvo la 5-an de novembro 1933 en la aĝo de 74 jaroj. Lia kadavro estis enterigita en la muron de Kremlo.

Ĉi tiu letero alvenis al la mano de Toŝikazu la 30an de decembro 1933. En Japanio komunisma movado estis severe subpremita: la 15-an de marto 1928 okazis la granda aresto de «La 15-a de marto», kaj miloj da komunistoj estis arestitaj. Sekve, la maldekstra movado kolapsis. La 20-an de februaro 1933 Kobajaŝi Takiji, proleta verkisto, estis torturita kaj mortigita.

Se policianoj vidus ĉi tiun leteron, Toŝikazu povus esti arestita.

«Ĉu Ŝimazaki ne havis socialisman tendencon?»

Taekazu respondis, «Ne.» Sed ĉu tiu esperantisto de Sovetunio sendus tian danĝeran informon al korespondanto, kiu ne havas intereson pri politiko kaj socialismo? Li certe sentis kamaradecon en Ŝimazaki kiel kune batalanta laboristo, tial li sendis tiujn eltranĉaĵojn. Tamen, en la albumoj estis nur poŝtkartoj krom tiu letero, tial mi ne povis kontraŭdiri Taekazu-on.

Ankaŭ multaj leteroj estis konservitaj

En la poŝtkartoj lasitaj de Ŝimazaki Toŝikazu kaj konservitaj de lia filo Taekazu, estas ofte mencioj kiel «Mi sendis leteron», do mi demandis la filon: «Ĉu vi ne konservas leterojn?»

Li respondis «Jes», kaj alportis ĉirkaŭ 100 leterojn. Male al bildkartoj, ĉi tiujn leterojn neniu malfermis dum 90 jaroj, do kiam mi elprenis la leterpaperon el la koverto, eliris ankaŭ la sigelita aero de la 1930aj jaroj. Mi korektis la faldojn, zorge skanis ilin kaj metis ilin en mian komputilon.

Fininte la deĉifradon de la poŝtkartoj, mi komencis deĉifri la leterojn. Subite la realaĵoj de la 1930aj jaroj, kiuj estis tute ne klaraj en la poŝtkartoj, aperis antaŭ miaj okuloj. Vi rememoru tiujn jarojn. La Granda Depresio okazis ekde la jaro 1929. Sovetunio potenciĝis, kaj la tutmonda laborista kaj komunista movado fortiĝis, inspirite de Sovetunio. La leviĝantaj nazioj en Germanio subpremis tiujn movadojn perforte en Germanio kaj komencis prepari sin por milito. En Sovetunio esperantistoj bildigis la progreson de la socialisma konstruado en siaj leteroj, sed en 1937 Stalino malpermesis Esperanton kiel danĝeran lingvon, kaj multaj esperantistoj estis persekutitaj. En Ĉinio, en 1931 Japanio okazigis la Manĉuran Okazaĵon, konstruis la pupŝtaton Manĉurio kaj komencis plenskalan agresmiliton sur la ĉina kontinento. Estis tre malfacila tempo. En tiuj jaroj Ŝimazaki Toŝikazu kaj liaj gekorespondantoj vivis. Kiam mi foliumis ĉiun folion de la leteroj, tia mondo aperis, kaj mi estis kortuŝita.

Ekde ĉirkaŭ 1937 la nombro da leteroj lasitaj de sinjoro Ŝimazaki malgrandiĝis. Ĉu Toŝikazu estis mobilizita al milito? Ne. La monda situacio ne permesis Esperantan korespondadon. Sovetunio kaj Germanio malpermesis Esperanton kaj persekutis

esperantistojn. Ankaŭ en Japanio okazis la subpremado de la libereco de parolado en la milittempa reĝimo, kaj la esperantistoj estis ankaŭ en la mezo de tiuj kirloj. Japanio estis en simila situacio.

Leteroj el Germanio

S-ro Ŝimazaki ricevis multajn leterojn el Germanio de multaj homoj kompare kun aliaj landoj. Ĉi tie, mi prenos s-ron Schlamp Ludvig en Munkeno. Kiel mi legis nur sur poŝtkartoj, Schlamp estis ordinara esperantisto. La plej multaj poŝtkartoj temis pri «*Oktobra Festivalo en Munkeno*». Koloraj poŝtkartoj elstaris inter la nigrablankaj poŝtkartoj, sed sur ili estis skribitaj nur aferoj pri la festivalo, do la enhavo estis tute banala.

La unua poŝtkarto, kiu venis de s-ro Schlamp, estis tiu datita la 30-an de marto 1929, kaj la adreso de s-ro Ŝimazaki estis «*Hjakken-maĉi, Maebaŝi*». S-ro Ŝimazaki naskiĝis en 1913, do tiam li estis nur 16-jara kaj lernanto de la Komerca Mezlernejo Maebaŝi. S-ro Schlamp estis jam 36-jara kun edzino, 20 jarojn pli maljuna ol Ŝimazaki. Li eklernis Esperanton en 1927 kaj jam partoprenis en la SAT-Kongreso de 1929 en Leipzig. En aŭtuno 1929 li petis, ke Ŝimazaki sendu al li japanan kimono por lia edzino. Laŭ li estis kutime vesti sin kiel fremdulo ĉe la karnavalo, kaj Ŝimazaki, la filo de silkaĵpograndisto, sendis al li kimono, verŝajne kun la helpo de sia patrino. Schlamp sendis al Ŝimazaki fontoplumon. Post proksimume du jaroj da tiaj pacaj korespondadoj la letero de novembro 1932 tute ŝanĝiĝis.

Jen lia letero:

«Vi sciigas min pri po tago 15 hora laboro kaj pli, krom aliaj mizeraj vivkondiĉoj. Ke en Japanio same kiel en Germanio regas mizero, tion mi komprenas, ĉar ambaŭ ja estas kapitalistaj landoj. Sed tion mi ne sciis, ke en Japanio laboristo dum jaro nur havas tri tagojn da libertempo. Kompreneble mi bone imagas, ke por 19-jara junulo kiel vi, tiaj kondiĉoj estas pli ol mizeraj. Kial vi ne laboras en negoco de via patro? Kie por vi laŭ mia opinio estus pli bonaj vivkondiĉoj?

Jes, ankaŭ en Germanio regas blanka teroro, sed revolucia movado en nia lando bonege antaŭenmarŝas. Rigardu lastajn grandajn strikojn en Hamburgo, Munkeno, Berlino kaj lasta parlamentbaloto, en kiu kompartio atingis preskaŭ 6 milionojn da voĉdonantoj. En nia lando preskaŭ jam regas civilmilito, ĉiutage en alia urbo estas interpuŝiĝoj inter revoluciaj laboristoj unuflanke kaj polico kaj faŝistoj aliflanke.

En nia lando kapitalista registaro ne plu scias, kion fari por eviti revolucion por eligi la krizon, oni vigle dekretas eksterordinarajn dekretojn (altigo de impostoj, malaltigo de salajroj kaj subvencioj al senlaboruloj) por savi kapitalistan reĝimon, sed vane. Nia lando jam nombras pli ol 7 milionojn da senlaboruloj kaj konstante kreskas. Mi persone jam estas senlabora pli ol du jarojn, sed tamen sufiĉe okupita, ĉar mi estas triobla kasisto, en mia Esperanto-grupo, en nia partia ĉelo kaj en sindikato, al kiu mi apartenas laŭ profesio. Kompreneble per tiaj kasistopostenoj mi persone nenion enspezas.»





S-ro Schlamp estis senlabora de du jaroj. Li ne diris kiel li vivtenis sin, sed eble vivis per tiu subvencio al senlaboruloj. Pli ol sep milionoj da senlaboruloj signifas, ke triono de la laboranta loĝantaro estis senlabora. Dum ĉi tiu situacio daŭris, estis nature, ke la laborista movado kaj la socialisma movado leviĝis. S-ro Ŝimazaki ankaŭ laboris en la silk-rilata firmao «Jokota Ŝooten» en la urbo Fukuŝima, sed estas surprize, ke li havis nur tri libertagojn en unu jaro. En la metilernadservo de la Edo-epoko en la 18-19aj jarcentoj dungitoj havis nur tri liberajn tagojn ĉe la Bon-festivalo kaj Novjaro, sed ĉu tia okazis ankaŭ en japana «firmao» en la 1930aj jaroj? Tamen, en la norda regiono Toohoku en la 1930-aj jaroj malriĉegaj terkulturistoj vendis siajn filinojn al prostituejoj. En ĉi tiu letero, mi povas senti solidarecon de s-ro Schlamp al Ŝimazaki, kiu eltenis malfacilan vivon, kaj mi povas imagi, ke ankaŭ s-ro Ŝimazaki sendis similajn leterojn, kiuj igis s-ron Schlamp deziri skribi tian aferon.

S-ro Schlamp estis senlabora, sed diris, ke li estas sufiĉe okupata. Li laboris kiel kasisto de la Esperanto-Societo, la ĉelo de la Komunista Partio kaj la laborista sindikato.

«Ĉelo» estas la «plej malgranda unuo de organizo» kaj tiu vorto estis uzita de Sovetunio kaj la nazioj, kaj ankaŭ de la Japana Komunista Partio, sed nun en Japanio oni uzas la vorton «branĉo». Ŝajnas, ke s-ro Schlamp fieras diri, ke li estas membro de la Komunista Partio de Germanio. Li estis ĝoja pro «disvolviĝo de la revolucia movado» kaj «kresko de la Komunista Partio en elektoj», kaj li havis esperon, ke la revolucio sukcesos baldaŭ.

Ne troviĝas postaj leteroj de Schlamp. Ĉu li ne sendis aŭ ne povis sendi aŭ Ŝimazaki perdis aŭ kaŝis ilin?

Ĉu Schlamp estis arestita?

Nelonge post tiu ĉi letero, Adolfo Hitlero iĝis la ĉefministro en januaro 1933. La parlamento estis dissolvita la 1an de februaro, du tagojn post la inaŭguro de la kabineto, kaj la elektdato por membroj de la Dieto estis decidita esti la 5an de marto. Je noktomezo la 27an de februaro la germana parlamentejo estis bruligita (germane: Reichstag-Feuer). Hitlero kaj Hermann Wilhelm Göring deklaris, ke ĝi estas «la komenco de la komunista ribelo» kaj tuj komencis aresti komunistojn. La sekvan tagon, la 28an, li petis prezidanton Hindenburg suspendi la bazajn homajn rajtojn de la Konstitucio kaj eligis prezidentan kriz-ordonon, per kiu li povu aresti komunistojn kaj aliajn sen juraj proceduroj. Heini Knorr, alia korespondanto de Ŝimazaki, kiu loĝis en Königsberg (nun Kaliningrado en la rusa teritorio), skribis jene en letero datita la 1an de marto 1933:

«Hieraŭ brulis en Berlino la parlamento. Komunisto nederlanda bruligis parlamenton, tiel informas la burĝa gazetaro la legantaron. Ĉu vi kredas tion, ke kom-isto estis farinto? Mi ne povas sciigi al vi ĉion, ĉar mi havas suspekton pro malfermo de tiu ĉi letero.

Mi petas vin, skribu baldaŭ, kiel vi pensas pri germana laboristaro revolucia.

Estu kuraĝa, ne perdi la kredon al komunismo, ne forgesu vian germanan kamaradon kaj vian eksterlandan klasfraton. Malhelpigu militon kontraŭ Sovetio kaj Ĉinio. Malhelpu la mondmiliton. Agitu kontraŭ ĝin. Nun mi finas leteron. Skribu tuj. Estu singarde.

(Marde arestitaj 80 kom-istaj deputitoj de la parlamento)»

Sub la administrado de Hitlero, oficejoj de laboristaj sindikatoj kaj Komunista Partio estis fermitaj kaj iliaj proprietaĵoj estis konfiskitaj. Kio okazis al la komunisto Schlamp? Mi petis mian germanan amikon s-ro Klawe esplori tion.

Lia unua respondo estis, ke «ĉar Schlamp estis sindikatano kaj komunisto, estas certe, ke li estis arestita kaj verŝajne transportita en la koncentrejon Dachau.»

Post iom da tempo, mi ricevis la duan respondon kun fotoj de la apartamentaro, kie Schlamp loĝis. La foto maldekstra estas tiu apartamento, kaj en la alia vidiĝas ŝtuparo en ĝi. Danke al altnivela teknologio mi vidis lian loĝejon. Mi emociiĝis, bildigante en mia kapo Schlamp-on supreniri laŭ tiu ŝtuparo. Se mi estus juna, mi volus viziti ĉi tiun apartamentaron kun Taekazu.

Sekvante tiujn fotojn, s-ro Klawe rakontis al mi «Stumbligajn ŝtonojn» (germane: Stolperstein). Tiu ĉi ŝtono estas 10-



centimetra kvadrata betona kubbloko enigita en la trotuaro, kaj en ĝian surfacon estis muntita kvadrata latunplato gravurita kun la nomoj kaj datoj de naskiĝo de la persekutitoj kaj viktimoj de la nazioj. S-ro Klawe mem iris al la loĝejo de Schlamp kaj certigis, ke ne



estas stumbla ŝtono de Schlamp sur la tortuaro antaŭ lia apartamentaro. S-ro Schlamp eble pluvis.

Post tio, definitiva dokumento estis sendita al mi. Mi sciis, ke esploroj estas faritaj pri tio, kiuj homoj estis tenitaj en kiuj koncentrejoj en Germanio, kaj

la dokumento venis de tiu esploroj pere de s-ro Klawe. Sur ĝi estis jene skribite:

«Kara Jasuo,

Interesajn informojn mi intertempe ricevis pri «nia» Ludwig Schlamp. La arĥivistoj el la memorejo de la koncentrejo Dachau respondis! Ili sendis aldonitan resumon. Kiel ni timis, li estis inter la unuaj kaptitoj de la naziismaj faŝistoj, kaj ili enkarcerigis lin en Dachau (https://eo.wikipedia.org/wiki/Koncentrejo_Dachau) ekde la 10.8. ĝis 21.12.1933, do tuj komence de la fifama historio de tiu koncentrejo. El la alkroĉita resumo ni ankaŭ ekscias, ke li estis arestita de la bavara politika polico, la loka praorganizo de la Gestapo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Gestapo>), la sekreta politika polico de la nazioj. Lia kaptitnumero (certe kun ruĝa angulo: <https://ja.wikipedia.org/wiki/ナチ強制収容所のバツシ>) estis 3219.

Bona novaĵo: ni ankaŭ ekscias, ke li pluvis areston kaj militon kaj en la jaro 1949 ankoraŭ vivis, sed nun en alia strato en Munkeno. La Dachau-aj arĥivistoj rekomendis ankaŭ esplori informojn en alia arĥivo, tiu de Arolsen (<https://arolsen-archives.org/en>). Ankaŭ tien mi nun skribis kaj petis informojn. Plie mi skribis en publikan forumon de la urbo Munkeno kaj petis eventualajn posteulojn de Ludwig Schlamp kontakti min.

Ni nun konas ankaŭ la naskiĝdaton de Ludwig: 20.7.1893.

Amike salutas, Christoph»

KZ-Gedenkstätte Dachau			
STIFTUNG BAYERISCHE GEDENKSTÄTTEN			
Häftling			
Vorname	LUDWIG		
Nachname	SCHLAMP		
Geburtsdatum	20.07.1893		
Geburtsort	München		
Geschlecht	m		
Festsetzung	-		
nach April 1945	Wohnte 1945 in München, Oberkiesplatz 40		
Zuletzt bekannte	-		
Zugangsstelle	-		
Hafterlauf			
Datum	Eintragsnummer	Eintragsdatum	Eintragsort
11.05.1933	3219	2. Gang	KZ Dachau
Kategorie der Abgrenzung	Politische Prisoner		
PRISONIER	-	Prisoner	
Häftlingskategorie			
Anmerkung			
Quellen			
Name	Bismarckstraße Dachau, 7.10.1933, Buch 1, 2		
Name	KZ 1.1.1933 / 1.1.1933 / 1.1.1933		

Resume s-ro Klawe informis min jene:

S-ro Schlamp estis unu el la unuaj arestitoj de faŝistoj kaj estis malliberigita en Dachau de la 10a de aŭgusto 1933 ĝis la 21a de decembro 1933. Li estis arestita fare de la politika polico de Bavario, la antaŭulo de la Gestapo. Lia kaptitnumero estis 3219. Li postvivis la koncentrejan vivon kaj militon kaj vivis en

1949 en alia loĝejo en Munkeno. Lia naskiĝtago estas la 20-a de julio 1893.

S-ro Schlamp postvivis la militon, sed s-ro Ŝimazaki nelonge. Li malsaniĝis en la

batalkampoj kaj revenis al Japanio post la milito, sed la 11an de julio 1946 li forpasis. Inter la leteroj konservitaj de la familio Ŝimazaki estis ankaŭ poŝtaĵoj el japanoj. Mi montros du japanojn.



Poŝtkartoj kaj letero el Manĉurio

La dekstra poŝtkarto estas unu el ili, kaj la bildo temas pri «Ĝenerala Konsulo de la Japana Imperio en Kantoo», kaj la vorto «milita poŝto» estis stampita sur ĝi. La sendinto estis japana, kaj la teksto estas jena:

«Langehingsun, la 12an de sep.

Estimata sinjoro,

Dankon al vi, mi ricevis vian poŝtkarton hodiaŭ. Mi estas 23-jara laboristo kaj ne povas skribi bone pro ke mi lernis dum nur unu jaro. Mi havas grandan intereson je la kolekto de bildaj poŝtkartoj de tuta mondo.

Mi sendis ĉiu p.mjn, kaj mi ne povas gajni ĝin ĝis la fino de tiu ĉi monato, por ke manĉuria P.O vendis novajn P.Mjn. Tute mi sendos al vi nelonge. Mi petas vin, ke vi sendos al mi kelkajn viajn P.Kjn de urbo.

Tute via T. Okabe »

Ĉar Manĉurio ankaŭ estis «sendependa lando», estis propraj poŝtoŝtampoj kaj poŝtmarkoj, sed mi, amanto de poŝtmarkoj, neniam pensis pri poŝtmarkoj en Manĉurio. En Interreto mi trovis jenajn aferojn:

Manĉuraj poŝtmarkoj ekzistis de 1932 ĝis 1945. Sur la unua poŝtmarko emisiita la 26an de julio 1932 estis skribite «Manĉura Poŝto» kun la blanka turo de Liaoyang kaj la Imperiestro de Manĉurio, kaj laste estis kvar specoj de neemisiitaj poŝtmarkoj en 1945. Dum tiu tempo, pli ol 160 specoj de poŝtmarkoj estis emisiitaj.

Estis peto de belorusa korespondanto «sendi poŝtmarkojn de Manĉurio», kaj Toŝikazu eble sendis leteron al la esperantisto en Manĉurio por plenumi lian peton.

Mi pensis, ke «armea poŝto» estas sendita nur de la batalkampoj, sed mi eksciis, ke la letero el Manĉurio ankaŭ estas traktata kiel armea poŝto.

Persono nomata Okabe ne troviĝis en la Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio. Multaj japanoj, kies nomoj aperas en poŝtkartoj kolektitaj de Ŝimazaki, ne aperas en ĉi tiu leksikono. Multaj malaperis el la historio kiel sennoma esperantisto.

Poste venis alia poŝtkarto de li:

«Kanto, la 3an de okt.

Kara samideano,

dankon al vi por via afabla karto. Mi estas tre ĝoja kaj miras sciiginte Fukuŝima-ŝi tre granda urbo per via sendita karto.

Mi estas leterportisto kaj nun pritraktas milita poŝto.

Oni kontentas nova reĝimo, sed multaj manĉurianoj ne ĝin. Mi pensas, se Japanujo savos ilin el danĝero de milito kaj kapitalisma kruela, ili kontentos kaj dankos al ni. Multaj koreanoj dankas al Japana armeo, sed ne estas savita el mizera stato de mankado.

Poste mi volas respondi vian alian demandon. Kun afabla saluto, via T. Okabe. 間島日本電信局内 岡部徳重 »

El tiu poŝtkarto ni povas scii, ke li laboris en la telegrafa stacio kaj respondecis pri «militaj poŝtaĵoj», do li rajtis legi poŝtkartojn kaj leterojn de aliaj homoj, kaj mem juĝis, ĉu la enhavoj de tiuj poŝtaĵoj estas permeseblaj aŭ ne. La armeo severe kontrolis la enhavon, kaj se troviĝas armeaj sekretoj aŭ maloportunaĵoj pri la Japana armeo en la poŝtaĵoj, certe tiuj estis forĵetitaj aŭ povis esti, ke policianoj vokas la skribintojn por pridemandi ilin.

En tiu ĉi poŝtkarto kaj en lia sekva letero estis skribitaj ne taŭgaj aferoj (laŭ mi), ekzemple «kruela kapitalismo» kaj «La kompartianoj ĉiam laboradas vigle, kaj areстите estas murditaj de niaj soldatoj». La japana armeo kaj la registaro ĉiam fanfaronis, ke Manĉurio estas paradiza lando, kie vivas harmonie kvin rasoj, nome japanoj, ĉinoj, manĉuroj, mongoloj kaj koreoj. Do lia mencio pri la stato de Manĉurio certe ne plaĉis al la armeo, sed li estis la respondeculo, tial li mem stampis la aproban stampon sur siaj poŝtaĵoj.

Jen lia lasta letero:

«Kara samideano
Lungĉingcun, la 30an de Okt.
Elkoran dankon al vi por via afabla letero kaj via fotografaĵo. Mi ankaŭ sendas mian.

Soldatoj japanaj estas tre kontenta kaj ĝoja, kaj bonvenita de Manĝuranoj kaj Koreanoj ankaŭ. Sed Komunistoj malnovaj Ĥinaj soldatoj ĉiam estas kontraŭ ili, kaj faras profanaĵon.

Preskaŭ tutaj kamparanoj Ĥinaj estas malsaĝuloj mem ne koni ilia reganto kaj estas senrigardo pro la politiko. Se vi Japanaj soldatoj savos ilin, ili estas tre kontenta kaj obeema. Sed malgrandaj japanaj soldatoj ne povas gvati ilin perfekte. Tial Ĥinaj soldatoj instruas ilin kaj ambicio de Japanujo. En Manĝurio la pacon mi ne povas senti. Ĉiam mi vidas la areston, murdon, profanon kaj aliajn multajn.

La kompartianoj ĉiam laboradas vigle, kaj areстите estas murdita de niaj soldatoj.

Pri vilaĝano-atako al vagonaro, mi ne povas scii perfekte. Eble mi pensas ili faris, instruite. Via foton mi ricevis kun granda plezuro kaj enmetis mian albumo. Mia foto estas farata


en Yenki (局子街〔支那名延吉〕 preskaŭ la mezon de tiu ĉi monato.

Mia naskiĝloko estas Naganoken.

Mi ne havas korespondantojn en suda kaj centra Manĝurio, sed antaŭe mi skribis al Ĉoŝun Esp. Grupo. Se mi prenos respondon, mi baldaŭ skribos al vi ilia adreson. Mi instruas Esp-n Koreanoj tie ĉi.

Mi ŝatas tre multe por interŝanĝi P.M. kun Usonoj. Bonvole instruu min, mi petas. Kun samideana saluto, tute via T. Okabe»

Troviĝas nur tri poŝtaĵoj de li. Ofte la korespondado interrompiĝis diverskiale, do mi ne plu pensis lian postan sorton. Tamen kiam mi legis leteron de la 27a de februaro 1933 de s-ro Faltus en Usono, mi troviĝis jenan frazon:



«Bedaŭrinte, mi eksciigis la tre malĝojan informon ke via kara amiko k nia kara batalanto k-do Tokuzju Okabe mortigis en Manĉurio! Ĝi estas terura la destino de la homanaro k mi ankaŭ tre malĝojas, kvankam mi ne sciis lin persone, sed mi scias, ke li estis via amiko kaj do ankaŭ mia amiko k kamarado. Mian kondolencon al nia batalanto, bonega k-do Okabe!»

Lia Esperanto estis stranga pri la uzo de la vorto «morti» kaj «mortigi». Ne estas klare, ĉu li mortis aŭ ĉu li estis mortigita, sed laŭ la etoso de lia skribo, certe Okabe estis mortigita. Kiu

sendis tiun informon al Faltus? Kial, kiel kaj kie li estis mortigita? Okabe estis 23-jara junulo. Tial mi ne povas kredi, ke li mortis pro malsano. Li laboris en la telegrafa stacio, do mi ne kredas, ke li estis envolvita en iu akcidento aŭ tumulto. Li estis respondeca pri milita poŝto, kio signifas, ke li estis en tia posteno, en kia li havis okazojn scii militajn sekretojn el tiuj kontrolitaj leteroj. Ĉu li malkaŝis ilin ie?

Faltus uzis la vorton «kamarado» pri li, kio signifas, ke ankaŭ Okabe povas esti maldekstrulo, kaj pro tio ĉu li estis arestita de policianoj, torturita kaj mortigita? Ĉu tia supozo estas tro fantazia?

Faltus skribis tiun letron la 27an de februaro 1933. Estis nur kvar monatoj inter la lasta letero de Okabe kaj la letero de Faltus. Tio signifas, ke Okabe estis mortigita nelonge post kiam li skribis sian lastan leteron.

Letero de Aizaŭa Rjoo

Troviĝas unu letero en ne tre bona Esperanto. Jen la enhavo:

«Omori, la 23an de junio 1929

Kara samideano!

Lastatempe kiel vi fartas? Ĉu ankoraŭ estas bona? Ni ĉiuj estas tute bonaj.

Nun en la lasta letero mi promesis al vi sendi fotografiaĵon nian. Do mi sendos ĝin. En la foto sin trovas konstruaĵo kun kelkaj fenestroj, ĉu ne? Ĝi estas nia lernejo. La fotografita loko estas antaŭo de ĝi.

Nia nuntempa stato de rondeto estas, fininte La Turo de Londono, sekvis ĝin Danco de Skeletoj farita de U. Akita.

Ĉu vi apartenas ian Societon de Esp.? Se jes, pri tio sciigu al mi, mi petas.

La somera libertempo tuj venos, sed ni havas nenian projekton, ĉar ni nur volas reveni hejmon. Se vi volas, ni havos interŝanĝon de adresoj inter ni. Ni ĉiuj ne loĝas en Tokio. Mi aŭdis, ke vi en venonta libertempo supreniri al la montoj. Nur estas bona, mi esperas.

Lasante tiun leteron bonvole sciigu al mi pri «socia senco de Esp» vian penson!

Vian sanon!

Sincere via Rjo Aizaŭa »



La Turo de Londono kaj Danco de Skeletoj estas verkoj de japanaj verkistoj respektive Nacume Sooseki kaj Akita Uĵaku. Eble ne estas eljapanaj tradukoj, do Aizaŭa kaj ŝiaj koleginoj legis ilin en la japana lingvo.

Akita Uĵaku estis esperantisto. Ankaŭ li devenis de la gubernio Aomori same kiel Aizaŭa Rjoo. Poste, okaze de la 10-jariĝo de la Soveta Revolucio, li estis invitita al Sovetunio kaj vojaĝis en la lando dum ok monatoj. Poste ankaŭ li estis arestita de la japana polico. Li kaj Rjoo havis okazajn renkontiĝojn.

Kiam mi legis tiun ĉi leteron unuan fojon, mi pensis, ke tiu Aizaŭa estas viro, sed baldaŭ mi ekrememoris la libron «Juneco de Aizaŭa Rjoo» eldonita en 1985. Mi trovis en Vikipedio jenajn aferojn pri Aizaŭa Rjoo:

«Aizaŭa Rjoo (1910-1936) naskiĝis en la gubernio Aomori kiel filino de kuracista familio. Ŝi lernis Esperanton en la kurso okazigita en 1927. Tiun tempon ŝi ekhavis intereson pri socialismo. En aprilo 1928 ŝi studentiĝis en la Virina Medicina Kolegio en Tokio, kaj en aŭtuno ŝi organizis Esperanto-klubon. En 1929 membriĝis al la Ligo de junaj komunistoj kaj komencis agadi kiel komunisto.

La 4an de aprilo 1933 ŝi estis arestita en Hokajdo kaj torturita. Ŝi estis kondamnita al kvarjara enkarcerigo. La 21an de januaro 1936 ŝi estis liberigita, sed 7 tagojn poste ŝi mortis.»

En la letero Rjoo demandis pri «socia senco de Esperanto». Mi supozas, ke ŝi ekhavis dubon pri la forto de Esperanto kiel mondŝanĝilo, kompare kun la forto de komunismo.


La foton menciitan en la letero mi poste trovis en la albumo de Ŝimazaki. Rjoo staras plej dekstre.

D e n o v e korespondanto de Ŝimazaki estis mortigita.

En la socio, kie regis kapitalista krueleco, esperantistoj ne povis ĝui pacan Esperantan vivon kaj devis labori

kune kun la laboristaro en la mondo.

Noto: La libro pri la poŝtkartoj kaj leteroj konservitaj de la familio Ŝimazaki estis antaŭvidita por apero okaze de la 109a Japana Esperanto-Kongreso en septembro 2022.



Traduk-adaptitaj
Far Sir'



Incit-verke jen kelke da belaj **FABELOJ**

ja friponetaj,
sed **LAFONTENAJ**

Averto.

La versoj de Lafonteno en ties (malĉastaj) «fabeloj» estas ĝenerale regulaj male al liaj en la pli konataj «fabloj», kaj pli ofte temas pri

deksilabaj versoj kun cezuro post la kvara silabo, ili do iom similas al la kutimaj francaj aleksandroj kun du silaboj malpli en la unua hemistiko. Mi uzis la saman skemon, formetante la du unuajn silabojn de klasika formo de esperanta aleksandro priskribita en la Parnasa gvidlibro kaj en PIV, tio estas:

v - v - v / v - v - v - v

(kun ebla ne uzo de la neakcentita lasta silabo ĉe la rimoj).

Al monema virino, fripona galanto

Ke pimpulinoj plenumas senplumigojn
Rabante virojn, ne nutras plu rubrikojn
«Senmon'» jam mortis: sen pago, for amoro!
Nun eĉ ameto estiĝas nur per oro.
Mi tamen plu, por nia vir-honoro:
nur l' koketinojn koncernas l' diro supra
kaj malgraŭ ties lertecoj eblas kapti
almenaŭ unu el cento sen barakti;
kaj ŝin ŝerctrompi per truko tute supla.

Por la ekzemplo elektos mi Gulfaron.
Li realigis friponan trompan faron,
ĉar li gajnis de belulin' favoron,
sen eĉ elspezi moneron groŝ-valoran.
Vi notu tion, galantaj spadnobejoj;
memoru tamen, ke l' trukon lud-amorano
de vi mi ne plu bezonos por modeloj;
ĉe la kortego mi trovos tre facile
pli ol nur unu Gulfaron se utile.

Do nia ulo Sinjoron Gasparenon
vizitis tiom ke fine al l' edzino
li ame ardis sen limo, kun fascino.
Ŝi pri beleco, superis eĉ Helenon,
tre ege plaĉis, krom pro difekto hida
fuŝanta l' tuton, sufiĉa por mallogi
la plej enamajn: ŝi estis monavida,
sed nun pri tio, ne indas epilogi.
Mi diris, vane efikas la sopiroj;
barbaran lingvon parolas tiu, kiu
sen or' en mano nur venas pro deziroj.
Pri lud', subjupo, plezuro nur ĝukriu,
jen la rimedoj uzataj de Cupido:
el ties budoj eliras ĉe la francoj
pli da kokritoj ol da grekaj lancoj
el la ĉevalo dum l' Troja pra-milito.
La anim-staton de l'in' ni ne forgesu.
De ŝi, la ulo, per ĉio vortigita
nenion tiris. Ja ĉiuj pri «vortigi»
komprenis prave – leganto, vi permesu
al mi tiele alnomi «mistifiki».
Gulfar' vortigis, ĝis kiam li proponis
du cent eskudojn. L' belino aŭdis tion:
kaj al Gulfaro la edz' mem prunte donis
post pet' la sumon kaj al labor' foriris.
Pri l' fi-edzino nenion li suspektis.
«Jen Sinjorino, ĉi du cent eskudojn,» diris
Gulfaro meze de homoj kiuj spektis,
«al via edzo transdonu vi, mi dankas.»,
L' belino pensis «jen bona lud' de rolo!
Ja tiel, l' pago ne suspektinde strangas!»



Estante tamen
virino kun parolo
ŝi tuj l' morgaŭon
regalis lin plenkore.

Ĉi tag' kaj sekvaj, la ul' fruktigis vore
la pagon, plie aldonis eĉ uzuron:
prodigemulo ricevu plenan mezuron.
Ge-Gasparenaj, sin post labor' ripozis,
Gulfar' alvenis, kun dir':

«pri mia ŝuldo
Ĉar spit' al kio unue mi supozis
ĝi nur utilis por venki laŭ rezulto.
Al Sinjorino returnis mi l' monon:
do en ŝuldlibro, bonvolu mian nomon
forstreki, dankon!»



Aŭdante tion, frida
pli ol bankiso, l' ulino ĝin ne negis
– l' afero estus facile tuj pruvita –
ŝi nur bedaŭris ke ŝi lin amorflegis
ja tro fervore; jen kio ŝin ĉagrenis:
imagu! perdi kion li forprenis!
Ŝin forlasante, Gulfaro iris rekte
ĉi tiun faron, trumpeti plej delekte
sur urb-tegmentoj tamtami ne selekte...
Nu, ne utilis pro tio lin admoni:
en uj' de francoj, jen tiel vivas oni.

Bildoj:
supre: Larin kaj Aveline
live: J. H. Fragonard

La lignoŝuisto*

Lignoŝuisto, Blazio li sin nomas,
 al in' edziĝis, de mire ega belo.
 La paro, multe da mono ne disponas
 do iras peti vendiston pri barelo
 da kredite aĉetebraj tritik-grajnoj,
 sub skrib-promeso; l' vendist' plenigas l' agon.
 Tuj post templimo, postulas li repagon:
 al la edzino korp-pagon (kun krom-gajnoj)
 la malĉastulo per tio prove trudas.
 «–Por min kvitanci, elpoŝu eĉ ne groŝon
 vi mem pli indas por solvi ĉi negocon
 (li diris) jesu al kio mi aludas!
 – Mi tuj cerbumos, respondas ŝi, je tio!»
 Returne hejmen, retrovas ŝi Blazion
 kaj de l' propono li havas tuj la scion.
 Diras Blasio: «Edzin'! Je l' nom' de Dio!
 la monon nian sen risko ni reprenu.
 Tuj iru diri al tiu vir' nun venu
 ĉar mia edzo forestas tutan tagon,
 mi min kaŝos, kaj vi rifuzos l' agon
 sen ke antaue, vi havu l' pagateston
 nu, tio naskos neniun ajn proteston.
 Por min averti, vi tusu sed tre forte
 kaj tute klare, prefere eĉ dufoje.
 Jen, de kaŝejo mi ŝprucos al plenlumo
 senbremse tiam, pro tim' de misfortuno»
 Dirite kiel, farite tiel. L' edzo
 el tio, iĝis rindinda pro vanteco,
 ke ĉiuj tiel, priklaĉis la eventon.
 «Nu, tusi antaŭ la ago tio frustras,
 (burĝulo dika al la belino flustras)
 nur poste tusi trioblus la profiton!
 Ne plu eraru, silentu tamen poste,
 Inter ni diru: ĉu taksis mi malfroste?»
 «Aĥ (ŝi respondas) Sinjor'! Ĉu kredas vi
 nin sprite lertaj samkiel via damo?»
 (Vi sciu: apud l' dikulo, kun infano
 ĉeestis ties edzin' en l' ejo ĉi.)
 «Mi firme kredas, (ŝi pluas nun emfaze)
 ke Damo tiel reagus samokaze;
 Sed ve! ne ĉiuj samsaĝas kiel ŝi!»

*Originala titolo «Fabelo pri
 okazaĵo en Château-Thierry»
 (Ĉatotjerio), kie naskiĝis
 Lafonteno



Bildo : Jean Dambrun (laŭ J.H. Fragonard)

La konfesprenanta edzo

Sinjur' Artuso, sub l' granda reĝ' Francisko,
 soldat-militis. Ĉar lerta batalisto
 li sin rivelis, post Itali-aliro
 dum solenego fariĝis Kavaliro.
 Ĉef-generalo surmetis al li l' spronon
 el ĝi li kredis superi alt-baronon
 en rajto pasi ricevi avantaĝon.
 Realirante fiere la vilaĝon
 li ne retrovis l'edzinon en preĝado.
 Li ŝin forlasis en hejmo tute sola,
 kaj ŝin retrovas en gaja maskerado,
 en salt' dansantan, en vivo plej frivola,
 kaj galantuloj kun ŝi, en miriado,
 Sinjur' Artuso l' aferon ja ne frandis;
 «Sed kion fari, li ade sin demandis,
 ĉu nun pro mia foresto de l' vilaĝo,
 min oni vidas kun rang' de kokritaĉo
 kovrante tiun de alt-kavalireco?
 Mi sciu l'veron, el ambaŭ troas io!»
 Per konfes-preno, okaze de kermeso
 li kiel pastro sin vestis, cel' al scio.
 Edzino lia liapieden kaŭris.
 Unue, pekojn nur etajn ŝi bedaŭris,
 La sinjorino, tuj post la banalaĵoj
 alvenu fine al gravaj misaj paŝoj
 la diroj prenu alian ton-kvaliton,
 Ŝi diris «Pastro, vizitis mian liton
 jen nobelulo, jen kavalir', jen pastro.»
 Sin rekonigis la edz' kun troa hasto,
 se la konfeso profitus plu persiston,
 senfina oni imagus la fi-liston.
 Do lia edzo el ĉi interrompado
 en fin' profitis: li diris «Fi-najado,
 plej malfidela, eĉ pastro! Kaj vi kredas
 al kiu voĉi? – Al mia edz', mi vetas!
 Ŝi diris, tiel plej lerte sin helpante,
 Mi vin rekonis, kaj kvankam elegante
 vi rolas pastron, mi pensis tuj al spito.



Bildo : Jean Dambrun (laŭ J.H. Fragonard)

Jen stranga kazo: vi, kiel saĝa viro,
 surprize stumblis ĉe mia simpla sprito,
 Nu, vi laŭdire fariĝis kavaliro:
 dum vi antaŭe nobelis je et-rango
 kaj vi pastrigis per l' sacerdota vesto!
 Artuso kriis: «Al Dio estu danko!
 Mi ja plej stultas, en mia fuŝprotesto!»

La ringo de Hanso Karvelo

Hanso Karvelo, olda jam prenis
 junan virinon kiel edzinon ;
 zorgoj premigaj kune alvenis :
 ja konsistigas tio kutimon.
 Babnjo (de l' ino estis la nomo
 el famili' de granda renomo)
 estis tre bela, plej bonhumora,
 preta al fajra ludo amora.
 Tial timegon havis Karvelo
 de mokemuloj kaj kokriteco,
 Per l' dekalogo el ŝton-tabelo
 ĝis prod-legendoj pledis la edzo
 laŭte laŭdinte piajn instruojn
 kaj hontigante kaŝrendevuojn ;
 ade li tondris kontraŭ galantaj
 kosmetikaĵoj fiaj kaj vantaj,
 l' mondon ĉi, kiu ecas diboĉe,
 li furioze skurĝis plenvoĉe.
 Ĉi paroladon de puritano
 ĉiam ignoris l' ina timpano,
 frandi predikojn ŝi ne kutimis
 krom se amanto ĝin gest-esprimis.
 Fakte el tio l' bona sinjoro
 povis silenti nur kun doloro,
 estis al morto ofta sopiro.
 Tamen, profitis nia martiro
 el revigligaj kelkaj momentoj :
 kiel en unu el ĉi eventoj.
 Iam post festo fin' de dimanĉo
 kie abundis vino kaj manĝo
 apud Babino, ronkis Karvelo,
 ŝajnis ke, al li, l' abism-anĝelo
 ŝovis sur fingron iun sorĉ-rington,
 al li dirante: «Konas mi l' vringon
 kiu torturas, ronĝas la sangon,
 al ĉi turmentoj, Hans', mi rimedu:
 tenu ĉi ringon, ne ĝin formetu,
 dum ĝi ĉirkaŭos vian falangon,

kion vi timas, tio ne eblos
 sen la informo pri ĝi tujtuja
 – Vian favoron mi pricelebros,
 diris Karvelo, kaj haleluja!
 Majsto Satano, estu pro tio
 rekompencita, danku vin Dio!«
 Hanso vekigis, kun en l' okulo
 resto de dormo. Ĉu li konscias
 sian teniĝon? - ĉar ja, l' bonulo
 havas la fingron, kie vi scias.



Bildo : Milo Manara

La oto-faristo kaj la muldo-flikisto

Sinjon' Vilhelmo, lontane trabutikis
sen la edzino graveda de ses lunoj;
ŝi, juna, simpla, nobele eĉ kvalitis
kun nom' Alico, el land' de Katalunoj.
Kompan' Andreo kelkfoje ŝin vizitis
kun celo kiu neniun iluzias,
en ĝi li majstris – ja tion Dio scias –
neniam vane li sternis siajn retojn;
li en kaptado kutimas tiom lerti
ke oni taksus saĝegaj la birdetojn
kapablaj fuĝi sen kelkajn plumojn perdi.
Tre nova estis Alico pri ĉi temo.
Pro troa sprito ne trafis ŝin tedemo:
pri ĉi malvirto, okazis nul akuzo.
Pri am-malicoj, nenion ŝi konjektis.
L' sinjorineto en paŝoj fronte rektis
sen ajna scio pri truko nek pri ruzo.
Ĉar estis l' edzo en magazeno fora
ŝi ĉe la hejmo, en ĉambro restis sola.
Andre' alvenis, insiste ŝin rigardis
kaj plej malvarme, ŝin krude alparolis:
«Ja min mirigas, ke ĉe la fin' de l' mondo
kompan' Vilhelmo fariĝas vagabondo
sen fina faro de via ena ido:
orelo mankas! Tuj al l'unua vido
ĝin mi konstatis, l' vizaĝkoloro via
estas atesto de okazaĵo tia.»
Tuj ŝi ekkriis: «Je la bonec' de Dio!
Ĉu mi mis-naskos fuŝ-unuotan bebon?
Ĉu estas taŭga rimedo al ĉi tio?
– Jes ja, li diris. Vi fidu mian strebon
por vi persone, kaj povas mi komenti
ke aliuloj ne tiom min agigu
ol kiom por vi. Ĉar povas min turmenti
neniuj zorgoj fremdulaj, tamen sciui
ke por kompano, ĝis mort' mi helpi pretas.
Ni nun silentu, prefere ni tuj provu,
ĉar pri orela fasono mi ja spertas!
– Vi provu ilin fasoni plej simile,

rebatis l' ino. - Ne estas malfacile,
respondis l' ulo, pri tio mi do certas!»
Kaj li tuj montris pri kio li kapablas.
Eĉ se naiva (eĉ male se lucida)



Alico trovis ke l' ludo tre agrablas
Ni ne disertu pri ĉi afer' libida.
Andreo zorgis kun granda korinklino
al ĉi laboro, farante ĉu tendenon
ĉu kartilagon, ĉu faldon ĉe la limo;
kaj domaĝante nek ŝtofon nek fasonon.
Li diris: «Morgaŭ, ni pluu la projekton
per polurado ĝis trafi la perfekton
por ke tiele vi havu bonan finon.
– Mi multon ŝuldas, ŝi diras, pro ĉi faro:
tre gravas trovi amikon en najbaro!»
Kaj la morgaŭon, je l' tuja sama horo
kompan' Andreo, kun ĝojo ĉe la koro
iris trovi l' kompatindulineton.
«Jen mi, li diras, cel' al orel' elfino
por ke vi fine retrovu la kvieton.

- kaj mi mesaĝon, respondis la belino, mi pretis sendi por urĝi vin pri tio. Ni iru ĉambren.» Tuj en la konfekcio pluiris ili en vigla agkadenco tiom ardege, ke en Alica penso skrupulo ekis pro ĉi laborfervoro. Do ŝi naivas al l' bona apostolo: «Ĉu faras vi nun tro multe da oreloj? ĉar tio estus laboro tute fuŝa!» Kaj li: «Ne timu! en task' oto-retuŝa por mi neniam okazis misaferoj!»


Kaj kiam l' edzo ĉesigis la vojaĝon surstable restis ankoraŭ la orelo. Tuj post kisado, kun tono de kverelo ŝi plende diris: «Vi faris laboraĉon pri nia bebo, kaj sen kompan' Andreo ja la infanon mi naskus unuotan. Do, ĉar ne eblas kontenti sin per veo, Sinjor' Andreo, orelon algluotan fasonis en mi, tuj, ĉion prokrastante. Ni lin vizitu, por nepre danki lin; amikoj tiaj utilas ja konstante!» Sinjor' Vilhelmo, laŭ la rakont' de l' in' neniel povis kompreni la profundon de la vakuo en la edzin-spriteco De l'okazaĵo, postulis li abundon da detaletoj; kolero trois: l' edzo bastonon prenis, celante draŝi draste la kompatindan katalunian inon sed kiu negis ke agis ŝi malĉaste. Mildigis iom la edzan punanimon ŝia naivo kaj ŝia malmalico. «Sinjoro! veis en spasma plor' Alico al vi, en kio estigis mi difekton? al li mi donis nek monon nek objekton; plu ĉio restas; cetere, dum riparo de nia ido, Andre'al mi konfidis ke vi pli multe profitos de la faro: pri lojaleco al vi mi ĉiam fidis se vi konstatas mensogon, vi min murdu.» Eliras l' edzo el la kolero sia, kaj al ŝi diris: «Nu bone, ni ne gurdu plu pri l' afero, vi taksis ĝin ne fia, mi ja konsentas, ke ni ne plu aludu

estigis tio nur troan paroladon. Mi nur ordonas: vi morgaŭ tiel ludu ke ĉi-loĝeje, mi kaptos l' renagaton: nenion diru pri nia malkonsento; sekretu kiel la tomb' - aŭ se ne, l' via!- vi lin perfidu kun multe da prudento vi min ŝajnigu for en vojaĝo plia, kaj rendevuon vi donu per letero, en nian domon, pri tio vi insistu. Andreo venos, vi iel ajn lin distru, krom evidente per fajlo de l' orelo: ĝi nun perfektas, nenion plu bezonas.» La naivino plenumis tre precize la ordonaĵon, kaj tio ne surprize, ĉar granda timo al bestoj spriton donas. Andreo venis, la edzo senprokraste alvenis brue. L' kompano serĉas haste sin kien kaŝi, nenion li eltrovis krom la litpadon¹ en kiun li sin ŝovis. La edzo frapis al pord'. Tuj post malfermo, Alic' per mano indikis al Vilhelmo ke l' galantulo sin ŝovis en litpadon. Vilhelmo havis tioman egan spadon ke eĉ kvarobla Andre' ne lin timigus, sed serĉis ulojn kun kiuj li efikus sen celo certe, lin murdi, sed kontraste eble l' orelon fortranĉi, aŭ pli draste ja kion oni tranĉumas en Turkio kruela lando en plena barbario². Li al edzino mallaŭte diris tion, ŝin forkondukis -nenion ŝi replikis- kaj per riglilo la ulon enŝlosigis. Andreo pensis ke sciis l' edz' nenion kaj eĉ sin kredis savita de l' misfaro. Kompan' Vilhelmo, revante pri si mem ŝanĝis la celon, pri sia venĝriparo kun uz' de malpli skandala stratagem' ja pli diskrete, kaj eĉ pli fruktodone.

«Alic' tuj iru, li diris voĉ-ordone, al Andre-ejo, rakontu al l' edzino pri l' okazaĵo, de l' eko ĝis la fino. Vi ŝin venigu, nur diru por ĉi tio ke ŝian edzon minacas grava puno ke al vi mi ĵus klarigis pri l' sankcio

– ĝi ja trafos ŝin, jen ŝia misfortuno! –
 otofaristoj puniĝas per torturo
 ablaciiga, pri kiu nur mencio
 hirtigas harojn surkape pro teruro;
 ke ŝia edzo tuj spertos je ĉi tio;
 kaj ke nur pro ŝi, atendas l' ekzekuto.
 Sed ĉar ŝi tamen neniel respondecas
 ŝi eble gajnos rezignon al l' amputo;
 Ŝin vi venigu, vin urĝu; mi promesas
 ke, se ŝi venos, forgesos mi l' aferon.»
 En ĝoj' Alico obeis tuj l' oferon
 l' edzin' Andrea alkuris senprokraste
 diligentece, senspira kaj plej haste;
 eniris l' ĉambron, ne vidis l' edzon tie,
 kaj do imagis lin enŝlosita ie.
 Ĉar l' sinjorino plu estis en timado
 kompan' Vilhelmo, kun nun en ŝrank' la spado,
 ŝin tuj sidigis, por tiel ŝin informi:
 «Pri sendankemo, ne volas mi konformi
 Andre' min helpis notinde pri utilo
 pro kio, antaŭ ol via hejmfiraro
 mi reciproku per far' de mi eksperta.
 Dum mi forestis, li oto-ĉarlatanis
 l' alican bebon. De truko tiel lerta
 mi ja revanĉu, do jen, mi tion planis:
 vi naskis idojn kun nazo tro aperta,
 l' muldilo kulpas, tutcerte! Sed imagu,
 pri tio sperta, mi povas senprokraste
 perfekte ĝin tuj ripari. Ne bombaste
 parolu ni plu, pri tio ni nun agu.»
 Li ŝin brakkaptis tuj post la epilogo
 kaj ĵetis litten, tuj apud l'edz-kaŝloko,
 duon-plezure, duon- sintrude ĝuis
 de l' ino, kiu pri l' tuto eĉ ne bruis
 nur benis Dion, ĉar spertis pro revanĉo

ne l' edzo, kiu eskapis el la tranĉo,
 sed ŝi, ĉar tiom da am' por li ŝi tenis.
 Sinjor' Vilhelmo, de sia flanko, plenis
 je emocioj kaj tiom ege pikis
 l'incito ke al l' inet' li ne aplikis
 «por dento denton», donante al la edzo
 por pizo fabon³, por nigra blankan panon.



Veras ja diri, ke dolĉas la venĝeco!
 Plej saĝe estis uzadi tian planon
 rehonoriĝi entute li deziris
 li ne pli bone ol per ĉi proceduro
 el ĉi ofendo, sukcese sin eltiris.
 Nu, ĉion vidis Andreo sen murmuro
 taksis la erojn, sed sen eĉ eta vorto,
 kaj Dion dankas pro spert' de nur ĉi sorto.
 Por nur orelo, li kompromisus prave,
 sed lin mirigis eskapi malpli grave,
 ja «malpli grave»: pli bonas en konkludo
 kornpar-akiro ol orempar-amputo!

Notoj

1. Litpado: en la franca *ruelle*. = vojeto lasita inter muro kaj lito. Verŝajne pro la fakto ke oni ne plu aranĝas litojn ĉimaniere, la vorto kvazaŭ ne plu uziĝas. Eo-vortaroj ne ĝin traktas, escepte de GDFE, kiu proponas *murlita interspaco* -kio estas pli difino ol uzebla vorto.

2. Turkio, kruela lando en plena barbario : tutcerte ne temas pri *ordinara ksenofobio*, sed pri incita piko kontraŭ la tiutempa emfaza furoro de ĉio turk(ec)a, plej ofte komplete fantazia.

3. donante por pizo fabon: Tiam oni taksis pizon, fazeolon kaj fabon samspeciaj, fabo estante la plej bongusta, pizo la malplej.

Bildoj: J.H. Fragonard

MIJAZAVA Naotaroo

tiu ĉi nomo signifas «rekta viro el sankteja rivereto»

Plumnomo de MIYAZAWA Naoto 33356



La dekok jaroj de sortodivenisto **Miĥajl Miĥajloviĉ**

Kiam renkontiĝis rigardoj mia kaj lia, la viro proksimiĝis al nia tablo kaj sidiĝis sur la neokupata seĝo. Mi kaj Rostov reciproke okulsignis pro surprizo. Tamen ial ni sentis, ke ni jam konas la viron. Ĉu mi iam surstrate vidis lin donacantan monerojn al maljuna almozulino? «Sinjoroj. Ĉu vi ne volas scii, kiaj vi fariĝos post dekok jaroj?» Li amike ekparolis per lerta Esperanto. Mi supozis, ke li estas unu el la intelektaj senlaboruloj, kiuj abundas en la urbo. Liaj vestoj estis malpuraj. Malfortiĝis la brilo de la lampo de la surmura lumigilo. Ŝajnis, ke malaltiĝis elektra tensio. «Sendube, vi, sinjoroj, ne kredos ke mi povos antaŭdiri, kiaj vi fariĝos post dekok jaroj.» Por mi pli nekredeble estas, ke iu fremdulo en tiu drinkejo parolas al mi en Esperanto. Pli ol cent jaroj pasis post la publikigo de tiu artefarita lingvo, sed ankoraŭ restas granda miskompreno inter popolanoj. Eĉ en Rusio sagacaj junuloj parolas la anglan.

Mi konis ĉiujn esperantistojn en Vladivostoka Esperanto-Klubo,

ĉar preskaŭ ĉiujare mi vizitadis la urbon en la kvin lastaj jaroj. Pasintjare mi vizitis la praloĝantan vilaĝon en la arbarego, tamen en ĉi tiu jaro ni ne havis ekskurson. Mi iom enuiĝis de la urbo kaj de la esperantujo en la urbo. Mi akompanis lektoron Rostov, kiu naskiĝis en Kamĉatko. Li estis mia kolego en la universitato de Sapporo. Lia preciza nomo estas Sergej Aleksandroviĉ Rostovcev. Ĉar mi havas multajn rusajn konatojn, kies nomo estas Sergej, iam mi vokis lin Rostov. Rostov estas la nomo de kvietra historia urbo en Rusio. Kaj laŭ mi, la kremlo, la palaco en tiu urbo estas pli bela ol tiu en Moskvo.

Li iom fieras, ke troviĝis kozakoj inter patroflankaj praparencoj.

«Jen skribitaj estas la aferoj, kiujn vi spertos morgaŭ, sinjoroj!»

La viro prenis du kovertojn el la malpura ŝultrosako, kaj metis ilin antaŭ nin. La

La 3-a Premia Verko pri Originala Verko en Esperanto ĉe Literatura Konkurso de Japana Esperanto-Instituto en 2022

Mi dediĉas ĉi tiun verketon al la memoro de mortinta samideano Aleksandr Borisoviĉ kaj al la pasintjare forpasinta verkinto de fantazia noveleto «La rakonto pri insekto en ŝtono», nome al mia amiko ARI Tadahito, kaj al la lolikona (knabinet-amema) kaj bonkora japano Erkin. Ofte kun li mi vizitis Rusion. Jam pasis preskaŭ 20 jaroj de la afero priskribita en ĉi tiu rakonto. Oni diras, ke la iama rustinta urbo Vladivostoko (ruse signifas «konkeri orienton») jam fariĝis moderna kaj belaspekta. Ĉu estas nur mi, kiu iom bedaŭras pri tio? Mi volas revidi la kuriozajn homojn en la mistera urbo.

Naoto

kovertoj estis strange novaj. Pro scivolemo ni intencis tuj malfermi ilin.

«Ne nun! Malfermu ilin nur morgaŭ nokte, mi petas. Vi legu ilin vespere ĝuste antaŭ la enlitiĝo.»

Lia peto estis prava. Se ni jam legus ilin, ni ne povus juĝi, ĉu lia sortodiveno estas trafa aŭ ne.

«Se mia diveno trafe priskribos viajn morgaŭajn aferojn, aĉetu aliajn sortodivenojn, kiuj montras, kiaj vi fariĝos post dek jaroj. Ĉu bone?»

Mi dubis, ĉu la viro intencas trompi nin. La nombro dek ok estas nek bela, nek prima. Rostov laŭte ekridis.

«Interese! Jes, profesoro, ĉu ne?» Mi respondis ridante pretervole.

«Jes, bone!»

Mi kaj Rostov trinkis multege da vodko. Ni ne povis rimarki, ke la viro jam malaperis.

En la sekvanta tago mi pasigis tempon sen rememori la sortodivenon. Fine de la tago, post la preno de dormiga medikamento, mi rememoris la koverton, kiun la viro donis. Mi prenis ĝin per mia dekstra mano bandaĝita. Malfermis ĝin, kaj elprenis paperojn. Sur ili troviĝis esperantaj frazoj nete tajpitaj.

(Mia koro ekbatis kvazaŭ mi legus ĵurnalan artikolon, kiu traktas mian aferon. Jen estis la sortodiveno por mi.)

«La 7-an de oktobro, 2004 al s-ro MIYAZAVA Naotaroo »

‘Mi kaj Rostov atendis s-inon Naĝeĵda kaj ŝian filinon antaŭ la submarŝipo freŝe verde farbita. Kontraŭ ĝi staras monumento memore al la venko en la dua Mond-Milito kun sur ĝi skulptitaj la nomoj de mararmeaj batalmortintoj.

Antaŭ kelkaj tagoj ni vizitis alian monumenton, memore al la Ĉeĉena Milito. Blankaj ŝtontabuloj ankoraŭ ne skulptitaj atendas novajn batalmortintojn. Sur iom nebula marblua ĉielo ŝvebas eĉ ne unu peco de nubo. Ĉinaj turistoj, kiuj vizitis la submarŝipon, memorigis al mi la urbon San-Francisko. Se kreskus eŭkaliptoj anstataŭ kverkoj, tiu ĉi loko aspektus kiel San-Francisko posttagmeze post malapero de matena nubelo. Ho! Ankaŭ tie en San-Francisko oni ekspoziciis submarŝipon, kiu aktive batalis en Pacifika Oceano dum la Milito, kaj subakvigis multajn japanajn komercŝipojn per torpedoj.

Mi gajnis doktorecon pri esperanta literaturo en San-Franciska Ŝtata Universitato. Tuj post kiam mia kunvivantino Esperanza naskis nian filon Gataroo en San-Francisko, ni decidis geedziĝi kaj reveni al Japanio. Tio okazis antaŭ ok jaroj.

Kiel meksikodevena usonano ŝi ŝajne sentis simpatian al mi, kiu apartenis al minoritato veninta el Japanio. Nun Gataroo samaĝas kiel Anja, la filino de Naĝeĵda.

Profesoro Aleksandr Borisoviĉ Baklanov instruis Esperanton en Far-Orienta Federacia Teknika Universitato. Li estis ĉiam afabla al eksterlandaj esperantistoj. Kun estimo ni nomis lin Aleksandr Borisoviĉ. Ĉar li estis ĉiam okupita de laboroj, li petis membrojn de Esperanto-klubo gvidi nin al turismaj lokoj. Verdire lia afabla aranĝo estis iom ĝena por mi. Sed hodiaŭ lia edzino Naĝeĵda, vestinte sin per bone sidanta blua robo, venis kun sia filino. Kredeble ŝi petis specialan ferion al sia laborejo. Rusa virino ridetas nur al konatoj. Kaj ŝi estis brile bela. Anja portis ruĝan jupon kaj ĉarmajn blankajn ŝtrumpojn. Post nia saluto en Esperanto «Bonan tagon!», Naĝeĵda kaj Rostov interparolas ruslingve. Naĝeĵda ne parolas Esperanton. Ŝia filino Anja parolis al mi en Esperanto. Laŭ rekomendo de Anja, ni piediris al akvario ĉe marbordo.

«Kvazaŭ ni estus en kosmo!» Anja ŝajnis tre ĝoja, kiam ŝi pasis preter la granda akvujo en la malluma akvario. Ĉiuj fiŝoj en la akvujoj, haringo, limando ktp. estis banalaj fiŝoj facile troveblaj en frida marfluo. Staras ankaŭ multaj vakaj akvujoj. Anja karesis nigran rajeton en la akvujo, kies etajn marvivaĵojn infanoj povas tuŝi. Anja ridetis kaj alparolas min, «Jen, ĝi ŝajnas vivanto en la kosmo.» Mi provis tuŝi flavan markolbason kun verdaj makuloj. Ĝi estis pli mola ol mi supozis. Mi rememoris, ke ankaŭ en Rusio oni manĝas markolbason. «Ĉu ĝi estas bongusta?» «Ne. Ĝi estas Kosmo-Vermo, kiu vojaĝis trans multaj lumjaroj da distancoj.»

Ĉirkaŭ la akvario estis eta turisma ripozejo de la urbo. Troviĝis ŝika plaĝo. Jaŭta haveneto por riĉuloj, kiu situas iom for, estis fortike barita kaj serurita. Surstrate troviĝis vendejoj de fiŝoj, salikokoj, kraboj kaj rost-stangaĝoj, kiujn oni nomis ruse «Ŝaŝlik». De ie sonis Rokmuziko. La loko similas al Fiŝista Kajo en San-Francisko, sed ne

estis multe da vizitantoj. Mi supozis ke, somermeze multaj turistoj kaj familioj svarmos. Kvankam la vetero estis bona kaj varmeta pro sunradioj, ĉiuj vendejoj havis ne multe da aĉetantoj, en tiu ĉi aŭtuna ĵaŭdo. Mi kaj Rostov trinkis bieron mordante Ŝaŝlik-on, Naĝeĵda kaj Anja manĝis molan glaciaĵon en taso konuse farita el maizo, kiu kostas 6 rublojn. Kvarope ni sidis ĉirkaŭ ronda tablo ĉe strata kafejo.

Anja svingis siajn piedojn sub la seĝo, kaj demandis min: «Kial vin ne akompanis via filo Gataroo?» Pasintjare, mi promesis al Anja »Mi havas filon, kiu amas knabinon, hundon kaj aventuran ludon. Venontjare, ni kune venos al Vladivostoko. Nepre al vi plaĉos Gataroo (La japana nomo signifas 'noktopapilian viron').» «Hum, kun plezuro mi ludos kun li.» Anja memoras tiun konversacion, kiun ni faris antaŭ unu jaro. Mi kaj Aleksandr Borisoviĉ sekrete decidis, ke Anja kaj Gataroo geedziĝu en estonteco. Ni la du patroj, distriĝis pro la iom antaŭmoderna supozo, ke la geknaboj intimaj ekde infanaĝo, aparte loĝantaj en foraj lokoj, tamen iam povos fariĝi geedzoj.

«Gataroo jam iris al malproksima loko.» «Malproksimen? Kie estas la loko?» «Povas esti Meksikio.» «Ĉu Meksikio estas pli fora ol kosmo?» «Mi supozas pli proksima.» Anja volis demandi plu. «Anja, kune ni vizitu plezurĝardenon, ĉu ne?» Rostov kaj Naĝeĵda intencis ŝanĝi la paroltemon. En tiu ĉi printempo mia edzino Esperanza kaj Gataroo subite foriris el nia hejmo. Mi vizitis ŝiajn geamikojn en SanFrancisko kaj ŝiajn parencojn en la urbo Guadalajara, sed mi ne povis trovi ilin. Povas esti, ke ili nun loĝas en Novjorko aŭ en Denvero, aŭ en suda ŝtato Ĉiapaso? «Per kiu lingvo Gataroo parolas kaj ludas kun siaj amikoj?» «Sendube ruse aŭ esperante. Aŭ per kosma lingvo? Jen! Mi trovis kosmoŝipon tie!» Rigardante la malnovan plezurĝardenon, Anja rapidigis nin. Ĉe la enirejo de la ĝardeno, vidante ĉevalon sur kies dorso sidis ĉarma simio, ŝi iomete cerbumis. Sed decideme ŝi eniris en la ĝardenon. Ŝajne ŝi pensis, ke hodiaŭ ne estas tago por la ĉevalo.

Rapide ŝi enuiĝis de raketforma grimprekaro. «Ĉar neniom ĝi moviĝas. Ĝi estas por infanoj.» Tamen ŝiaj vangoj estis ruĝaj kaj vizaĝo ŝvitetis pro la grimpado. «Naotaroo, ni kune trejniĝu por vojaĝo tra kosmo.» «Ŝajnas por mi iom malfacile.» Vidinte, ke infanoj saltas en multaj balonoj ene de granda baseno, mi hezitis. «Ne. Ni rajdu sur tiu savboato.» Tio estis malgranda rel-tobogano. Ĝiaj reloj estis rustintaj ruĝe.

Mi aĉetis du biletojn kvardek rublajn, kaj enmanigis unu al Anja. Rostov ridis. Naĝeĵda ŝajnis esti iom maltrankvila. «Fronta sidloko estas la mia.» Anja sidis antaŭ mi, kaj ni rajdis sur la savboaton por du homoj. Ambaŭ kosmonaŭtoj surmetis sekurzonon kaj iom streĉiĝis. Giiiii, kun terura bruo la savboato ekiris kaj grimpis deklivon. Baldaŭ la savboato malsupreniris, vibriĝante kun laŭta bruo, pro kiu mi ne povis aŭdi eĉ la voĉon de Anja tuj antaŭ mi. Kiam la savboato abrupte iris kurben, niaj korpoj estis preskaŭ forĵetitaj, kvankam ĝia rapideco ne estis troa. Anja svingis sian manon al Naĝeĵda. Ĝuste tiam la savboato akre turniĝis kun bruego, kaj ni estis preskaŭ ĵetitaj. Gjaaaa, tiam subite la savboato sonoregis, laŭte kaj akre turnis, preskaŭ ĵetitaj antaŭen. Mi forte pensis, ke mi devas protekti Anjan.....

Ĉe tiu momento mi preskaŭ falis antaŭen. Haste mi rigardis al Anja. Anja ridis al mi sidante sur ĉevalo kun simio. Mia ĉevalo estis iom nervoza. Repreninte la rimenojn, por ne malfruiĝi, mi sekvigis mian ĉevalon al la aliaj, kiuj iris cele al la pinto de monteto. «Atendu min, Gataroo.» Anja ne povis lerte konduki sian ĉevalon pro tio, ke ŝi rajdas kun la simio. «Tial mi diris, ke vi lasu simion antaŭ ol ekiri!» Anja paŭtetis kaj kun ruĝa vizaĝo penis manipuli la rimenojn. Mi ne scias ekde kiam, sed la knabino iom post iom fariĝis matura virino. «Kiun vi vokis? ĉu min?» «Kion vi diras, Gataroo. Atendu min!» Jes, hum, malkovriĝis, ke mi estas Gataroo. Kaj tiu ĉi loko estis insulo Maui en Havajo. Mi sciis, ke ni povos vidi akvofalon de sur proksima monteto. Anja kaj mi, nome Gataroo, ĵus fariĝis dudek ses jaraĝaj. Sur iu altebenejo de insulo Maui, pelite de facila vento, ni fine atingas la

turisman gvidiston Tomas. Sur la vojo mia dekstra mano estis gratita de branĉo. «Vidu la pitoreskaĵon, gesinjoroj MIYAZAVA!» Tomas fiere montras malsupren la blankan akvofalon per sia fingro. Ni ne povis aŭdi sonon el la akvofalo. Tamen proksime birdoj kantis. «Saa Kaerimasujo. (Jam estas tempo por iri.)» Tomas instigis nin per japana lingvo. Ĝuste en tiu momento, la granda korpo de Tomas fariĝis malgranda, kaj la korolo de lia ĉevalo ŝanĝiĝis de blanka al beja. Kun japana gvidisto ni rajdvojaĝis ĉirkaŭ estuaro de la rivero Iŝikari en Hokkajdo, Japanio. Ni iris tra densa nebulo preter grandaj flosatingitaj lignoj, kaj baldaŭ ni vidis la Japanan Maron. Pro la sabla grundo la ĉevaloj marŝis malfacile. Estis malvarme. Ni elĉevaliĝis, kaj faris fajron per flosatingitaj lignoj. «Kvazaŭ ni estus en Rusio.» Anja murmuris rigardante la flavajn flamojn. Mi jam ne estis juna Gataroo. Blovis forta vento denove, kaj ĝi intense ĵetis sablerojn al nia vizaĝo. Mi ŝirmis Anjan per mia supervesto..... Rostov batadis mian vangon. Multaj vizaĝoj kun zorgema mieno rigardis min. «Profesoro, baldaŭ venos ambulanco. Okazis akcidento. La reltobogano abrupte haltis.» «Kie estas Anja?» Mi tuj demandis. Mi aŭdas plorvoĉon de Naĝeĵda el proksimo. «Kiel Anja fartas?» Mi intencis levi mian kapon, «Ankaŭ Anja rekonsciiĝis. Ne moviĝu, mi petas.» Mi kaj Anja estis kuŝantaj sur la tero. Du aŭ tri minutojn poste atingis ambulanco, kaj la ambulancoj senprokraste enigis nin en la aŭton. Rostov kaj Naĝeĵda akompanis nin. La okuloj de Naĝeĵda estis ruĝaj pro arda ploro.

Ŝoseoj en Rusio ne estas glataj. Mi intencis paroli al Anja, kuŝante sur mallarĝa lito de la ambulanco fortika kiel armea aŭto. «Baldaŭ ni atingos la terglobon. Eltenu!» Anja ridetis. La kapo de Anja estis makulita de sango. «Mi renkontis Gataroo.» «Ankaŭ mi renkontis lin.» Li estis mi. Mi estas Gataroo. Estis mi, kiu foriris ien. Ankoraŭfoje sonoris sireno malproksime. Anja fermis siajn okulojn. Eble pro sedativo mi trankvile endormiĝis.

En malsanulejo, la kuracistoj kaj flegistoj lacige multfoje kontrolis nian korpon. Ili fotis nian kapon per rentgenradioj el diversaj flankoj kaj anguloj, kaj kontrolis nian sangon. Mi ne scias kial, sed ili kontrolis eĉ nian urinon. Aleksandr Borisoviĉ venis kaj estis ege ŝokita vidinte la kapon de Anja volvitan de bandaĝo. Unu post alia, venis la membroj de Esperanto-Klubo. Al ĉiuj unuope Rostov klarigis detale la aferon. Mi kaj Anja, kun serioza mieno devis respondi al ĉiuj demandoj de la membroj.

Kiam mi revenis al la hotelo, akvo ne venis el la krano, kiel kutime. Mi karesis mian tuberon sur la frunto, kaj decidis preni dormigan medikamenton. Ĉio supre skribita estis ekzakte sama al la travivaĵoj, kiujn mi mem spertis. Mi sentis, kvazaŭ mi legus mian propran taglibron aŭ leteron. Ĉu la komputilo de la sortodivenisto tenas en si mian, ne nur mian, sed taglibrojn de ĉiuj homoj en la mondo? Mi endormiĝis kaj dormis sen sonĝo.

«Ĉu vi vere fartas bone? Estas preferinde, ke vi ankoraŭ ne trinkos, mi pensas.» Rostov fervore zorgis pri mia sano. Mi ignoris lian admonon kaj trinkis vodkon. Mi kaj Rostov decidis atendi la sortodiveniston en drinkejo Boĥaj, kies nomo estis prenita el forta azia reĝlando antikve reginta ĉi tiun regionon, nunan rusan Ĉemaran Regionon. La trinkejo situis ĉe sakstrateto flanke de la strato Svetlanskaja, kaj hodiaŭ ĝi estis jam preskaŭ plena de drinkemuloj. Sur ĝia muro troviĝas ligna skulptaĵo de «(eble) Ursa Homo» farita de praloĝanto Udegeo. Sonoras rokmuziko de Beatles. Mi kredas, ke trafis ankaŭ la sortodiveno por Rostov. Li estas iom maltrankvila. Kiam ni fariĝis ebriaj, aperis la sortodivenisto. Li restis plu malpura. Li unuspire glutis glason da vodko, kaj elprenis du kovertojn el la ŝultrosako. «Donu al mi po kvar mil rublojn por unu koverta. Mi ne povas proponi al vi eĉ unu kopekon da rabato.» Ni tuj pagis la sumon. Li diris, ke li ne akceptas usonajn dolarojn. Malsame al la hieraŭaj kovertoj, sur hodiaŭaj estis

skribitaj la nomoj de adresitoj. Jen, sur la mia.

«La 8-an de oktobro 2022, al s-ro MIJAZAVA Naotaroo de Granda Sortodivenisto en la 21-a jarcento, Miĥajl Miĥajloviĉ»

Mi ne komprenis, kial «la Granda Sortodivenisto» okupiĝas pri tia bagatela komerco. Mi kredas ke, Rostov havis saman demandon. Miĥajl Miĥajloviĉ haltigis niajn demandojn kaj proponis tosti per glaso da vodko. «Por la sano kaj prospero de vi kaj viaj idoj! Kaj por mia gloro en la pasinteco.» Ĉu lia estonteco jam fariĝis pasinteco? Ankaŭ mi kaj Rostov senintence tostis. Rostov jam estis ebria. «Ni tostu por la fanfaronado de la Granda Sortodivenisto Miĥajl Miĥajloviĉ!» La sortodivenisto cinike ridis kaj demandis nin. «Sinjoroj, ĉu vi konas la novelon 'MALFACILAS ESTI DIO' verkita de Fratoj Strugackij?» Mi ne konis. Rostov respondis, ke jes. Lia vizaĝo paliĝis. Miĥajl Miĥajloviĉ stariĝas kaj iris al elirejo de la drinkejo Boĥaj. En la momento mi vidis bluajn flugilojn de etrusko sur lia dorso, kiu malaperis en la mallumegan straton.

Hodiaŭ estis la lasta tago de nia restado en la urbo Vladivostoko. La Internacia Konferenco okazinta en Far-Orienta Federacia Teknika Universitato jam finiĝis antaŭ kelkaj tagoj. Nia fakkunsido de Esperantologio sukcesis ankaŭ en tiu ĉi jaro. Rostov prezentis sian studon «Fonologia problemo en la verkoj tradukitaj en Esperanton de japana poeto kaj fabelisto MIJAZAVA Kenĵi». Mi prezentis la mian «Afriko en esperanta literaturo». Ne venis multaj demandoj, nek okazis diskutoj same kiel en la kutimaj fakkunsidoj. Ĉar Aleksandr Borisoviĉ estis unu el la organizantoj, li estis ĉiam okupita, sed hodiaŭ li estis libera kaj trankvila. Eĉ Naĝeĵda kaj Anja venis al la flughaveno por adiaŭi. Anja ridis, montrante la bandaĝon de nia dekstra mano per sia fingro. Ankaŭ mi montras la bandaĝon sur ŝia kapo per mia fingro. Estis tempo por aranĝi formalajon por eliri la landon. «Ĝis revido.» «Ĝis revido.» Adiaŭaj vortoj ne estis en la rusa, nek en la japana.

«Gataroo, Gataroo!» Post la vortoj Anja forte brakumis min.

Dum la flugo al Sapporo en Hokkajdo, mi kaj Rostov neniam aludis pri la sortodiveno de Miĥajl Miĥajloviĉ. Sed ni reciproke konsciis, ke ni ambaŭ fervore pensas pri ĝi. Ni restis silentaj. Se ni malfermus la kovertojn, ni povus ekscii, kiaj ni fariĝos post dek ok jaroj. Sed per tio ni povus scii nur unu tagon estontan, nome, etan pecon de nia estonteco. Aŭ povus simple esti, ke la sortodiveno estus bone preparita, blufa trompo. Se mi malfermus la koverton, mi trovus faskon da blankaj paperoj. Niaj ok mil rubloj estus trompoprenitaj. Momenton, tamen, kion la blankaj paperoj signifas por mia estonteco? Ĉu mia prospero, aŭ mia morto? Kiam mi mortos? Ĉu mi povas revidi mian filon Gataroo, kiam ankoraŭ mi vivas? Ĉu mi iam metamorfoziĝos al Gataroo, kaj iros al la fianĉino Anja? Fantazia penso obsedis min.

Mi penis pensi alian aferon. La prezidanto de mia universitato, Internacia Kultura Universitato en Sapporo, estas entuziasma adoranto de MIJAZAVA Kenĵi (japana poeto, fabelisto). Antaŭ ok jaroj li proponis min kiel instruiston de Esperanto al lia universitato. MIJAZAVA Kenĵi aspiris al Esperanto, sed li ne povis fini la lernadon de la lingvo pro sia morto en juna aĝo. En kelkaj liaj verkoj oni povas vidi influon de Esperanto. Rostov estas esploristo pri MIJAZAVA Kenĵi. Nun li provas traduki liajn verkojn en la rusan. De antaŭ du jaroj li instruas rusan lingvon en mia universitato. Ankaŭ lin la prezidanto trovis kaj dungis. Unuvorte la prezidanto estas unu el la miskomprenemaj romantikistoj. Multaj gestudentoj partoprenas en mia kurso de Esperanto. Tamen ne pro ĝia furoreco, sed pro tio, ke la studentoj povas facile gajni poenton. Nature, ĉar la gramatiko de Esperanto estas tre simpla. La studentoj ne estis entuziasmaj pri la lingvo. Mi provis instigi kelkajn gestudentojn organizi Esperantan Rondon en la Universitato. Sed tuj la rondo endormiĝis.

La posteniĝo de Rostov en mia universitato draste ŝanĝis mian kurson. Mi petis al li partopreni en mia kurso. La duon-mortaj okuloj de gestudentoj fariĝis brilaj. Ili ridis kaj demandis ne per la japana, sed per Esperanto ne tre lerta. Studenta Esperanto-Rondo organizis simpozion en la universitata festo. En la regulaj kunsidoj de Sapporo-Esperanto-Societo svarmis homoj ĉirkaŭ Rostov. Mi komplete fidis la popularecon de la lektoro.

«Rostov, Rostov.»

Li sidas en universitata restoracio kun sencela mieno.

«Mi aŭdis ke, studentoj prezentos teatraĵon en Zamenhofa Festo de la Sappora Societo?»

«Jes, la titolo estas ‘Estontmilito de Gilgameŝo (sumera heroo en Mezopotamia mito)». La rakonto estas iom komplika kaj malfacila. Studentoj petas min plibonigi la scenaron.»

Li aspektis malvigla.

«Profesoro, ĉu vi legis la sortodivenon de Miĥajl Miĥajloviĉ?»

«Ne. Mi rezignis. Kaj vi?»

Mi ŝovis la koverton en la lastan paĝon de mia albumo, kaj decidis sigeli ĝin ĝis post dek ok jaroj.

«Ne. Mi firme kredas, ke ĝi estas fraŭdo. Mi bruligis ĝin.»

Estas certe, ke Rostov legis ĝin. Aŭ povas esti, ke la paperfolioj estis blankaj. De tiam Rostov neniam sorĉe fascinis gestudentojn en mia kurso. Al ĉiuj ŝajnis, ke li subite maljuniĝis. De tempo al tempo, mi proponis al Rostov iri al la riverbuŝo de Iŝikari kaj ĝui fajron sur la bordo. Silente ni enrigardis la fajron. Super la strando neĝo dance falis pecon post peco. Mi scias, ke trans la vasta maro troviĝas Rusio. Ĉe flagranta lumo kaj flamo, mi sentis, ke ne gravas pasinteco, estonteco, nek homa digno.

Kelkajn semajnojn poste Rostov revenis al Rusio, eble al Kamĉatko aŭ al Sankt-Peterburgo. Tamen ekzakte kien, mi ne scias.

Post kelkfojaj transloĝiĝoj mi perdis la koverton aĉetitan de Miĥajl Miĥajloviĉ. Same kiel ordinara homoj, ankaŭ mi maljuniĝis, tamen feliĉe mi vivas ankoraŭ...

Nigr' kaj Blus'



Aldono/reago
al la artikolo pri
Ella Fitzgerald
(Hela Ella)
de Marcelo Redulez
en Sennacieca Revuo
2021

Far Sir'




En la pasinta SR, troviĝis longa artikolo pri Ella Fitzgerald far Marcelo Redulez, kiu emfazas ŝian sintenon rilate rasismon, notinde en tiuj ekstraktoj :

«Male al Billie Holliday, Ella Fitzgerald neniam provokis skandalan tumulton. Ŝi nek drinkis, nek fumis. **Ella restis digna kaj diskreta fronte al la rasdiskriminacioj.** Tiun formon de diskreteco, simpleco, evidenteco Ella elektis kiel sintenon por dediĉi sian vivon, anime kaj korpe, al sia arto, al ĵazo, al ceteraj muzikistoj, siaj publikoj sen ajna rezervo, kaj foje ankaŭ iom al sia familio, siaj proksimuloj, siaj personaj esploroj aŭ al helpobezonantaj homoj, sia privata

mondo.[...] Ella Fitzgerald ne eskapis el la rasista, diskriminacia situacio. Foje arestita pro falsa preteksto post koncerto, foje blokita en flughaveno, ĉar ŝi devis lasi sian lokon al blankulo, **ŝi decidis digne kaj diskrete alfronti rasismon.** »

Tiel mi certe ne prezentos la sintenon rilate rasismon de multaj nigrulaj muzikistoj. Ili por plu resti sur scenejoj de prestiĝa teatro, nepre restu « dignaj » kaj « diskretaj » pri la rasisma sinteno kontraŭ siaj « fratoj laŭ koloro ». Tian « dignon » mi pli volonte vortus « submetiĝo ».

Thomas « Fats » Waller



Rilate tiun sintenon, jen trafa okazaĵo en la jaz-historio, kie ĉefe rolas du ĵazistoj same «dignaj» pri rasismo : la tre fame konata Louis Armstrong kaj la iom malpli fama Thomas (Fats) Waller, ĉirkaŭ la kanzono «Black and Blue», kies aŭtorecon oni ŝuldigas jen al Armstrong, jen al Waller.

En la jaro 1929 Fats Waller komponas «Black and Blue» kunlabore kun Andy Razaf koncerne la tekston, por la muzika revuo «Hot Chocolates» (Varmaj Ĉokoladoj), kiun origine kantis Edith Wilson. La spektaklo celis amuze distri la publikon per la nigrulaj kondiĉoj de ekzistado. En ĉi spektaklo estis aliaj komponaĵoj de Fats Waller - Andy Razaf, inter alie «Ain't misbehavin'» kiu iĝis fama ĵaza ŝlagro.

Okazis ke Louis Armstrong eniris en la revuon, interesiĝis pri la kanzono, ĝin adaptis por ĝin enigi en sian repertuaron.

Ĉi titolo konsistas el vortludo, kiu, kiel kvazaŭ ĉiuj vortludoj, ne estas tradukebla(j): laŭvorte ĝi signifas «nigra kaj blua» sed «bluo» plie estas sinonimo de malĝojo en Usono, kontraste kun «nigro» en multaj aliaj lingvoj, inkluzive Eon. El tiu signifo fontas la vorto «Blues» (Eo: Bluso) uzita por la nigrulaj kantoj, kiuj plejofte estis sopire malgajecaj. Traduki «US:Blua» per «Eo:Nigra» evidente tute ne taŭgus, ĉar «Black and Blue» iĝus «Nigra kaj Nigra» ! Mi fine elektis tiun pli proksiman formon: «Nigr' kaj Blus'».

Originalo (anglalingva) (kun teksto forlasita de Armstrong)	Laŭvorta traduko
Out in the street, shufflin' feet, Couples passin' two by two, While here am I, left high and dry, Black, and 'cause I'm black I'm blue.	Sur strato, gape vagantaj Paroj paŝas duope dum mi estas ĉi tie forlasita Nigra, kaj ĉar mi nigras, mi sombras
Browns and yellors, all have fellers, Gentlemen prefer them light, Wish I could fade, can't make the grade, Nothing but dark days in sight»	Brun- kaj flav-haŭtulinoj ĉiuj havas kompanion, viroj preferas ilin helaj. Mi deziras povi heliĝi, mi ne povas sukcesi, nenion, krom sombraj tagoj mi vidas
Cold empty bed, springs hard as lead Feel like ol' Ned*, wish I was dead What did I do to be so black and blue ?	Malvarma malplena lito, risortoj malmolaj kiel plumbo, Mi sentas min kiel olda Ned*, mi preferus esti morta Kion faris mi por esti tiom nigra kaj blua ?
No joys for me, no company Even the mouse ran from my house What did I do to be so black and blue ?	Neniu ĝojo por mi, neniu kunulo Eĉ la muso fuĝis el mia dom' Kion faris mi por esti tiom nigra and blua ?
'Cause you're black, folks think you lack They laugh at you, and scorn you too and all you do** What did I do to be so black and blue ?	Ĉar vi estas nigra, uloj taksas vin ne valora ili ridas pri vi, kaj malestimas vin kaj ĉio (kion) vi faras Kion faris mi por esti tiom nigra kaj blua ?
I'm white inside but that don't help my case 'Cause I can't hide what is in my face How would it end, ain't got a friend My only sin is in my skin What did I do to be so black and blue ?	Mi blankas interne, sed tio ne helpas mian kazon ĉar mi ne povas kaŝi kia estas mia vizaĝ' Kiel tio finus, mi ne havas amikon Mia nura peko 'stas en mia haŭto Kion faris mi por esti tiom nigra kaj blua ?

* ol' Ned >> Olda Ned = la diablo;

** varianto far Armstrong



Unue, ne eblas por li, viro, uzi la du unuajn strofojn, kiuj rilatas al plendoj de virino (kio li ne estas), kiu suferas pro manko de amindumo (kio ne estis lia problemo)

Pro tio, li ankaŭ formetis la version «no joy for me, no company», tamen lasis la version «Even the mouse ran from my house», kiu povis esti komprenata kiel «eĉ muso ne ŝatas resti kiel kompani-estaĵo», sed ankaŭ kiel signo de totala malriĉeco : ja ĝi fuĝis el domo en kiu restas eĉ ne l' plej eta panero.

Tion farante, li donis al kanzono – eble ne intence – tute alian signifon, nome speco de pledo rilate la rasismon de la blankuloj super la nigruloj.

Sed tiu kanzon-pledo, de la komenco estis tre favore akceptita kun aplaŭdoj, eĉ de plej reakciaj blankuloj... Fakte, ne temas pri *pledo* por ke oni *agnosku* nigrulecon, sed pri *preĝo* por ke oni *indulgu* la nigrulon, ĉar «li estas blanka interne, kaj *sia nura peko* troviĝas pro *sia haŭto*». Alidirite, kio igas lin «blua» – *malĝoja* – tio ne estas ĉar vi mistraktas lin, estas nur ĉar tio ŝuldiĝas al lia haŭt-koloro. Li ja estis nur malbonŝanca.

Tiun aspekton taksis ne akceptebla ĉar ne tre postulema (kiel diras la eŭfemismemuloj) kelkaj – raraj – ĵaz-kantistoj, kiuj provis malmoligi la kanzonon ŝanĝante «mi blankas interne» per «mi vundiĝas interne». Sed tiu versio ne konis ontecon.

Fakte ĵazo komplete submetiĝis al la reganta ideologio de Usono, kune kun siaj komponantoj, el kiuj siaj blusoj. Sed paralele al ĵazo kaj ties blusoj ĵazigitaj, bluso disvolvis memstaran branĉon, en kiu aperis tekstoj entenantaj politikajn aspektojn multe pli batalemaj por agnosko de l' nigruleco.

Nigr' kaj Blus'

$\text{♩} = 70$

Mal - plena lit' el plumb' malvarma, dam-ni - ta mi pli ŝatus morton Pro ki - u far'
fuĝis mus' el mi - a do - mo sub rid' kaj spit' far pala a - ro Pro ki - u far'

1. min plagas nigr' kaj blus' ? eĉ 2. min plagas nigr' kaj blus' ? Mi blankas in - terne,
ĉar eblas ne kaŝi

1. sed tio ne su - fiĉas, l' kar - bon ĉe l' vi - zaĝ' sen ajna am' ĝis ki - a fin' nur
2. sed tio ne su - fiĉas, l' kar - bon ĉe l' vi - zaĝ' sen ajna am' ĝis ki - a fin' nur

20 pro la haŭt' plej pekas mi ? Pro ki - u far' min plagas nigr' kaj blus' ?


Muziko laŭ la Waller-originalo, teksto laŭ la Armstrong-adaptado

Dosiero de
Marcelo Redulez

ukrainaj artistoj dum milito



Andriy Khlyvnyuk
Kanto al fronto



Katya Gritseva
serve al Socia Movado



Ptaška, ŝtalbirdo
Kantema flegistino

TRI PERSONAJ REAGOOJ, DIVERSAJ SED SAMCELAJ : ENGAĜIĜO !

Kiel polpokanto iĝis himno
Kaj esperantistoj kunkantu!

Tutmonda famiĝo
Rolo de intereto



Gastigado de ukraina familio de marto ĝis julio 2022 en nia hejmo kreis fortajn ligojn. Niaj senperaj interŝanĝoj dank' al esperanto, helpis al ĉiu trovi sian lokon en la ĉiutaga rondo. Kaj tuj interesis nin vivkutimoj kaj kulturoj. Kaj niaj diskutoj naskis renkontojn. Iom post iom ni malkovris novan parton de la homaro.

Inter la unuaj kantoj ofte kunkantiĝas de niaj gastinoj distingeblis la tradicia popola *Hej! Surherbeje la viburno ruĝa!* Ĉar ni scivolis, ni eksciis pri tiu kanzono ĝian signifon, originon, kaj esperantigon. Mirinde estas kiel enretigita filmeto povas naski tutmondan ĉenon de kunkantantoj kun multaj variantoj. Dankata estu la kantisto **Andrij Khlyvnyuk**, el la rokgrupo *BoomBox*, pro lia startpunkta voĉa (seninstrumenta) interpretado. Tiu fama rokantisto turneis en Usono, kiam la rusa armeo ekinvas Ukrainion. Li tuj revenis hejmlanden por soldatiĝi. Kaj sur kijiva placo li soldatvestite tutsole kantas tiun popolan kanzonon, kiu iĝis kvazaŭ himno por la ukrainaj rezistantoj. Ĝi plu sonas en nia hejmo, kaj dum prelegoj pri Ukrainio prezentitaj de **Katja Gradzion**.

Sekvas portretoj de du neordinaraj junulinoj, ambaŭ dudek-du-jaraj.

Katja Gritseva, grafikistino kaj poetino, naskiĝis en Mariupolo kaj suferis ekmiliton en sia bombadita art-akademio en Ĥarkivo. Socialista aktivulino ĉe *Socialnyj Ruh* (*Socia movado*) ŝi rifuĝis en Lvivo, kie ŝi plu agadas, disponigante abundajn artaĵojn favore al la luktantoj. Ekspozicio de verkoj de tiu arda luktantino okazis en Parizo. Ili bele spegulas ŝiajn konvinkojn.

Katja Poliŝĉuk, kromnomata **Ptaŝka**, el la regiono de Ternopilo, lernis kant- kaj teatr-artojn. Ekmilite en Kijivo post sukuristaj kursoj ŝi volontulis kiel flegistino en la medicina helpservo. Laborinte en la detruita hospitalo de Mariupolo, ŝi rifuĝis kun la lastaj batalintoj en la uzino *Azovstal*. Tie en malluma subtera kamero ŝi kantis por kuraĝigi kunsuferantojn. Sekve ŝi estiĝis kaptita de la rusa armeo kaj finfine liberigita okaze de interŝanĝo de militkaptitoj. Ŝian sorton perrete sekvis miloj da subtenantoj. Ŝi iĝis kvazaŭ heroino.

Hej! Surherbeje La viburno ruĝa

*aŭ kiel popola kozaka kanzono
iĝis himno de la ukraina rezistado*



Surherbeje la viburno ruĝa klinis triste sin,
Malgajiĝis ial nia glora land' Ukraini'.
Sed ni kune la viburnon ruĝan suprenigos,
Ukrainan nian landon gloran, hej! hej! regajigos ni!

Tiun tekston de la kanzono Surherbeje la viburno ruĝa (Ой у лузі червона калина) elukrainigis Petro Palidova. Ĝin kantas Jurij Krombet en filmeto de Natalija Pendjur enretigita la 23an de aprilo 2022 kaj spektinda ĉe Jutubo¹.

En 2022, *Surherbeje viburno ruĝa* aŭdiĝas tra la mondo tradukita en diversajn lingvojn. Tiu kozaka kanzono el la 17a jarcento estis registrita en la 19a jarcento, epoko de la ukraina nacia revigliĝo, transformita dum la ukraina revolucio komence de la 20a jarcento kaj



kantita far la batalantoj por libereco meze de tiu jarcento. Tiu kanzono en la 21a jarcento plu plifortigas la ukrainan popolon, ĉar ĝi ligas la rezistantojn kontraŭ la rusaj invadantoj al iliaj antaŭuloj, kiuj pli frue dum pluraj jarcentoj samloke bataladis por libereco.

Vorto de la botanikisto

Viburno estas arbusto inter 2 kaj 4 metrojn alta. Pro tiu alteco ĝi staras rande de arbaroj aŭ de arbaraj aleoj. Printempe, viburna floro similas malgrandan neĝblankan ombrelon, kiu aspektas kiel la kapvestaĵo de fianĉino. Ĉi-apuda foto montras ĝian maksimume florantan staton. Nur la internaj floretoj estas fekundaj, la grandaj borde simple logas la insektojn. La trompo bonefikas kaj en aŭtuno multnombros la helruĝaj beroj. Sed ĉiu entenas ununuran semon. Se en okcidenta Eŭropo oni konsilas ne



gustumi tiujn berojn, ĉar oni taksas ilin iom toksaj, laŭ ukrainoj, ili estas bongustaj, precipe post frosto. Laŭ tradiciaj receptoj estas p r e p a r i t a j frandindaj tortoj, f r o m a ĝ k u k o j, marmeladoj, ĵeleoj kaj ceteraj kukoj kaj sukoj. Sed eblas ankaŭ frandi la berojn freŝajn post

ripozo en frostoŝranko kun sukero por dolĉigi la amarecon kaj acidecon. Dolĉaĵoj tre ŝatataj en multaj familioj.

Viburno estas konsiderata ankaŭ kiel rimarkinda kuracplanto! La planto enhavas askorbatan acidon, taninojn kaj glikozidojn, kaj por bontenado de sano havas pli da vitaminoj ol citrono! En antikveco, la ŝelo de viburno estis uzita kiel sepsa agento, kaj kiel sedativo kontraŭ kramfoj. Viburnon oni ankaŭ aplikas en kosmetikaĵoj kaj dermatologio: ekstraktaĵo de viburnaj floroj estas uzita kontraŭ alergiaj haŭtaj reagoj kaj viburna suko kontraŭ makuloj.

Rakontoj pri la verkado de la kanto


Varias pluraj versioj pri la origino de la kanto, kiun inspiris viburno kiel nacia simbolo de Ukrainio. Jen unu: en 1914 ĝi inspiris la faman **Stepan Charnetsky** (Ĉarnetskij) (1881-1944). Poeto, reĝisoro kaj direktoro de teatro «Руська бесіда» (rusa *konversacio*). Ensceniginte la tragedion de Vasyl Pachovsky kun «Сонце Рутини» (*Suno de ruino*) pri la kozaka ĉefo Doroshenko (Doroŝenko), Charnetsky ne kontentis pri la lasta plendokanto «Чи я в лузі не калина була» (Ĉu mi ne estis viburno *sur la herbejo?*). Tial por konkludi per pli optimisma finalo, li enŝovis la folkloran kanzonon «Розлилися круті бережечки»

(transbordigitaj krutaj bordoj) en la dramon. Charnetsky prilaboris la tekston, tiel ke la paroloj pli bone kongruu kun la enhavo de la teatraĵo. Tamen la lasta strofo restis sensanga. Krome li aranĝis novan melodion kaj Mikhail Kossak harmoniigis la partiturojn por la instrumentoj.

Alia versio de Mykhailo Haivoronsky konteste asertas, ke la kanzonon verkis **Vasyl Pachovsky** kaj ĝin popularigis Yosyp Stadnyk, direktoro de la teatro en Lvivo jam ekde januaro 1912.

Sed evidentiĝas, ke Charnetsky modifis plurajn partojn de la teksto, donante al la verko pli lumajn bildojn kaj melodion. Tamen nek en 1916, kiam li klarige kontraŭdiris la version de Haivoronsky, nek en 1934 verkinte siajn memoraĵojn «Моя мандрівка з Мельпоменою» (*Mia vojaĝo kun Melpomeno*), li nomas sin verkinto de la paroloj de *Surherbeje viburno ruĝa*, pro ilia folkloro deveno. Samtempe li insistas pri lia propra kreado de la nova melodio.

Laŭ Volodymyr Viatrovitch², historiisto kaj deputito de la popolo, indas aserti, ke Charnetsky fakte kreis rebakaĵon de folkloro kanzono el la 17a jarcento el la regiono de Khmelnytsky. La malnovan melodion estis registrita kaj eldonita jam en 1875 far famaj kolektintoj de la ukrainia riĉaĵo Volodymyr Antonovych kaj Mykhailo Drahomanov.



Stepan Charnetsky

La unua prezento de la renovigita dramo *Suno de ruino* de Vasyl Pachovsky kun la kanzono *Surherbeje la viburno ruĝa* - fakte la unua strofo - okazis en februaro 1914 en Sambor. Kaj en marto la artistoj de Lvivo prezentis tiun verkon ankaŭ en Drohobych kaj Stryi. *Suno de ruino* surscenigita de Charnetsky estis tuj konsiderata kiel teatra sukceso. Tial ĝi estis elektita por honori la 50an datrevenon de la kreado de la teatro *Rusa Konversacio* la 29an de marto 1914 en Stryi. En sia raporto pri tiu evento

la ĵurnalisto Ostap Vesolovsky, de la ĵurnalo *Dilo* de Lvivo, aparte traktis la kulminon de *Suno de ruino*, kiam fine de la dua akto aŭdiĝas *Surherbeje la viburno ruĝa*, dum la kozaka armeo estrita de

Petro Dorochenko ekiras al batalo por unuiĝo kaj sendependeco de Ukrainio. En septembro 1914 ĝi estas kantata en Transkarpatio, kie haltis la ukrainaj Siĉ-pafistoj, kiuj mem luktadas por sendependeco de sia lando.



Alia versio diras, ke la pafisto **Ivanytsky** lernis la kanton de la teatristoj en Lvivo. Li aldonis tri novajn strofojn post la unua kaj instruis la tuton al siaj kompanoj. Se ne eble certiĝi pri kiu versio pravas, fakto estas ke sekve la Siĉ-batalantoj adoptis ĝin kiel unuan pafkazonon kaj

baldaŭ disvastigis ĝin tra la regionoj de Stryi, Galicio kaj tuta Ukrainio.

Jam en 1921 veteranoj de la Ukrainaj Siĉ-pafistoj kreis la eldonejon *Ruĝa Viburno*, kiu eldonis memoraĵojn de luktintoj por la sendependeco, de soldatoj de la Ukraina Popola Respubliko kaj de la Okcidenta Ukraina Popola Respubliko, kaj eldonis ankaŭ esploraĵojn pri la Ukraina revolucio.

Dum la soveta okupado la kanto estis malpermesita pro ĝia enhavo taksita tro patriota.

En 1925 la kanzono transiris oceanon por unua registrado en la Novjorka *Metropolitan Opera*, kie ĝin interpretas Mykhailo Zozulyak, ukraina kantisto, kiu naŭ jarojn pli frue jam registris la himnon *Ще не вмерла України* (*Ukrainio ankoraŭ ne mortis*).

Dum la dua mondmilito la kanzonon kantadas la soldatoj de la Ukraina Ribela Armeo, kiu de 1942 ĝis 1954 batalis ekskluzive por sendependeco de Ukrainio kontraŭ la invademaj unue nazioj, poste poloj kaj fine rusoj.

En 1944 *Surherbeje viburno ruĝa* duafoje aperas sur disko en Usono dank' al aranĝo de Oleksandr Koshyts, kiu tutmonde famigis ankaŭ la ukrainan julkanton *Щедрика* (iĝinte *Carol of the bells* en la angla).

En la filmo *Червоний* (*Ruĝa*), kiu rilatas la ribelon de Ukrainaj kaptitoj en la gulagoj komence de la 1950aj jaroj, la herooj kantas *Surherbeje viburno ruĝa*, kaj tio ŝajnas efektive reala pro ĝia populareco inter la deportitaj sendependistoj.

Kaj la kanto revenis en Ukrainion fine de la 1980aj jaroj en koncertejoj, stadionoj kaj protestaj manifestacioj. Interese

estas, ke ĝuste tiam **Leopold Yashchenko** kaj **Nadiya Svitlychna**, fama reĝimkritika aktivulino en la jaroj 1960-1980aj, aldonis la strofon «Не хилися, червона калино...» (*Ne kliniĝu, viburno ruĝa*)³.





Populareco en 2022

Andriy Khlyvnyuk (Andreo Ĥlivnjuk) estas fama kantisto de la ukraina funka muzikgrupo *Boombox*, kiu turneis tra Usono, kiam la rusa armeo komencis sian «specialan operacion» tra Ukrainio. Reage li decidis tuj reveni hejmlanden por soldatiĝi. Kaj la kvaran tagon post la ekinvado li sendis per Instagramo filmeton⁴, en kiu li nurvoĉe, seninstrumente, interpretas version de la unua strofo de la kanzono *Surherbeje la viburno ruĝa*. Li tiam aperas en militista vesto sur la placo Sofia en Kijivo. Tiu filmeto tuj estis plurdeke, plurcente, plurmile spektita. Kelkajn tagojn poste la sudafrika muzikisto *The Kiffness*, tiuokaze kromnomita *The Kyivness*, aldonas muzikon kaj ĥoruson kaj enretigas sian filmeton⁵ ĉe Jutubo. Ĝi iĝis kvazaŭ virusa tra la retejo, kaj tiel tutmonde popularigis la kanton. Kvar



monatojn poste tiu filmeto estis pli ol dekmilion-foje spektita.

Komenciĝis ĉeno de kreado. En multnombraj urboj kaj landoj, profesiuloj kaj amatoroj, por atesti sian solidarecan apogon al la ukrainaj popolo kaj armeo amase registris kaj enretigis filmetojn, kiuj mem estis multope trans- kaj dis-senditaj.

Fine de marto la ukraina sketista paro Oleksandra Nazarova kaj Maksym Nikitin dancas okaze de la Tutmonda Ĉampionludo por Arta Sketado laŭ tiu sonbendo.

La kanto atingis ankaŭ la orelojn de **David Gilmour** de mondfama *Pink Floyd*. Aparte kortuŝita, ĉar li havas ukrainajn bofilinon kaj genepojn, tiu artisto deklaris: «Kiel multaj aliaj, ni sentis koleron kaj frustriĝon, vidante sendependan, paceman kaj demokratieman landon invadita kaj ĝian popolon murdita far unu el la plej potencaj landoj en la mondo.» Por montri sian solidarecon kun la ukraina popolo, Gilmour kaj eksaj membroj de la grupo, Nick Mason kaj Guy Pratt, decidis reuzi sian instrumentojn. Kvankam disigitaj de 2015, por tiu kazo, helpe de la komponisto kaj produktisto Nitin Sawhney ili registris la 30an de marto la titolon *Hey, hey rise up*⁶. De 1994 ili ne plu kunkreis. Sed por tiu nova peco, se *Pink Floyd* zorgas pri la muzika parto, ili enmiksas la voĉon de Andreo Ĥlivnjuk. La grupo, kiel multaj aliaj artistoj, celas krom kuraĝigi la rezistantojn, ankaŭ kolekti monon favore al la militsuferanta popolo.

Ne plu nombrebilas la kvanto da diversaj registraĵoj de tiu kanzono nun perrete alireblaj. Amatoraj aŭ profesiaj, individuaj aŭ kolektivaj, de familio el Irpin filminte Leon, sian kantantan trijaran knabeton al surstrataj kunkantadoj, jen spontanaj dum manifestacioj, jen organizitaj dum eventoj kiel en Vilno ĉirkaŭ Eliza Ismalkova⁷, ĝis plenplenaj stadionoj kiel en Varsovio la 12an de aprilo okaze de futbalmaĉo por paco... Ja diverskvalitaj, sed ĉiuj montrante komunan emocion,

firman decidemon kaj kuraĝigan impulson. Kelkaj akcentas la folkloran devenon, aliaj la militistan transiron. Kaj pluraj televidelsendoj kaj tagĵurnaloj prezentis la evoluon de tiu fenomeno anoncante eĉ tutmondan rekordon por fulmobando kun partoprenintoj el pli ol kvindek landoj perrete ligite kunkantintaj la himnon al rezistado kontraŭ la rusa invado. Tiam «militista fanfaro grupiĝis centre de Lvivo kun ĥoristoj kaj samtempe homoj tra la tuta mondo kunkoncertis» filme raportis TSN la 28an de junio 2022⁸.



<https://france3-regions.francetvinfo.fr/>

«Disrompita viburna arbo estas signo de perturboj kaj tragedio. Difekti tian arbon estas hontinda ago. »

A. Khlyvnyuk

Pedagogia analizo de la teksto

La temo de la kanzono prezentas la doloron de Ukrainio, kiu suferas pro siaj filoj forportitaj sub Moskvajn katenojn kaj la batalon de la Siĉ-pafistoj por la liberigo de la kaptitoj. Ĝi glorigas la kuraĝon kaj bravecon de tiuj batalintoj, defendintoj de la lando, de ĝia sendependeco.

La poezio arte uzas metaforon: kliniĝanta viburno bildigas suferantan Ukrainion. Ĝi ripetas la versojn *Sed ni kune la viburnon ruĝan suprenigos, Ukrainan nian landon gloran, hej! hej! regajigos ni!* Tiu refreno estas kiel medikamento kontraŭ malsano. Viburno estas kuraca revigligo bezonata por ke Ukrainio retrovu sian forton. Kaj la uzado de retorikaj ekkrioj *hej!* emfazas la decideman karakteron.

Mezlernejo de Myrhorod elektis instrui tiun kanton al la gejunuloj, kaj en aprilo 2022 enretigis la detalojn de sia pedagogia projekto⁹. Inter la celoj klare difinitaj, krom la personaj evoluoj de la gelernantoj rilate memkritikemon kaj esplorojn de studfontoj per interreto, troviĝas ankaŭ «alkutimigi la gelernantojn kun la karakterizoj kaj enhavo de ideologiaj kanzonoj; informi ilin pri la Siĉ-pafistoj; lerni distingi pafkanzonojn, klarigi iliajn simbolojn; (...) zorge respekti la pafkanzonojn, iliajn aŭtorojn, kaj la historian pasintecon de sia naskiĝlando.» Instruante la kompletan kanzonon, la infanoj kantas ĝin de la komenco ĝis la fino, tiel ke ili bone komprenu la signifon de la paroloj kaj sentu la forton de la tuto. Tiu kanzono ne estas amuzaĵo, ĝi parolas pri la liberigo de Ukrainio.

«**R**uĝa viburno estas simbolo, kiu apartenas al la Ukraina kulturo jam de pratempoj. Ĝiajn signifojn transportis tra la jarcentoj legendoj kaj kantoj. Disrompita viburna arbo estas signo de perturboj kaj tragedio. Difekti tian arbon estas hontinda ago. Ukrainoj protektis tiun arbon, ĉar oni kredis, ke ĝi kreskas nur ĉe bonaj personoj. Laŭ niaj prauloj, viburno kapablas transdoni eternecon kaj kunigi ĉiujn generaciojn por luktadi kontraŭ la malbono.»



Tion raportas membro de la muzikgrupo GO_A, kiu reprezentis Ukrainion en la Eŭropa kant-konkurso *Eurovision* en 2022. Cetere ĉi-jare gajnis la ukraina kanto, kiu miksas rokon, repon kaj folkloron; tiam tiu eŭropa konkurso montris ekzemplon de la nuntempa tiea muziko. Tie eblas konstati la elekton de la artistoj aldoni la pli modernajn ritmojn por riĉigi sian repertuaron, sen definitive forviŝi la tradiciajn melodiojn. Homoj daŭre parkeras tiajn kanzonojn, kiuj vojaĝas tra la jarcentoj kaj la generacioj. Ĉu ne tie kuŝas sekreta armilo de la neprofesiaj rekrutitoj de la ukraina armeo?

Krome, laŭ Volodymyr Viatrovitch⁹, la tuta mondo agnoskas, ke ukrainoj estas tre kantemaj. Konsiderinde estas ke grava parto de la folkloro kantaros konsistas el kozakaj kanzonoj, ĉefe paf- kaj insurekci-kantoj, luktantaj por libero. Multaj novaj kanzonoj tiucelaj aperis okaze de la nuntempa milito. Tamen ĝi ne estas tempo nur por novaj kreaĵoj sed ankaŭ por reapero de forgesitaj kanzonoj, al kiuj la cirkonstancoj donis novan sonon. Inter tiuj, *Surherbeje la viburno ruĝa* okupas elstaran lokon. Ja, muziko estas plaĉa universala lingvaĵo, kiu eligas emociojn el homprofundo. Ĝi tiel kapablas grupigi, kunigi, unuigi eĉ plej diversajn, disajn homojn dank' al la emocioj, kiujn ĝi provokas.

Ciu tiuj antaŭaj argumentoj jam helpas klarigi kiel kaj kial tiu kanto *Surherbeje la viburno ruĝa* tiel eĥas ĉi-jare. Ja la kunteksto favoras: demokratia Ukrainio estas refoje atakita de rusa armeo. La teksto kaj la historio de tiu kanto montras, ke nehazarde ĝin elektis Andriy Khlyvnyuk (*Andreo Ĥlivnjuk*) kiel stimulan alvokon.

Krome muziko ĉiam grave rolis en periodoj de krizoj, aparte dum militoj, ĉar kantanto kaj muzikanto engaĝiĝas. Tiam muziko estas signo por espero, revo pri plibela estonto, ĉar necesas ĉiam pensi, ke la malbono finiĝos. Kantado ebligas senti sin vivanta, pli proksima al aliluloj, eĉ se fizike malproksimaj. Kunkantado forte ligas homajn rilatojn, kiuj neniigas sentojn pri soleco aŭ izoleco. Jen forta socia fenomeno. Ĥore kunkanti pligrandigas memfidon, samkiel fidon al aliaj, kaj favoras kunlaboron, ne konkuron. Tio ankaŭ ebligas al ĉiu teni sian rolon en grupo, respektante komunan celon por arta aŭ/kaj kuraĝiga rezulto.

Multaj kantemuloj esprimas senton de libereco akompanatan de vasta plezuro. Efektive muziko malstreĉigas nin, ĉar ĝi stimulas kreskon de dopamino, neŭrotransmisiilo de plezuro. Tial laŭ neŭrosciencistoj kantado povas helpi por kuraci deprimon, solsenton, angoron.

Cetere la melodio de *Surherbeje la viburno ruĝa* estas plaĉa kaj facile memorebla. Tial ĝia kunkantado estas rapide alirebla por ĉiu ajn.

La modernaj komunikiloj ebligis kaj la rapidan dissendon, kaj la aldonon de bildoj kaj filmoj, kiuj emfaze ilustris la kanton. Kaj krome la plurmiloj da ligitaj komentoj el la kvin kontinentoj esprimas jen emociojn, jen instigojn, jen kuraĝigojn, ktp. Nekontesteble pintan sukceson ĉi-jare atingis *Surherbeje la viburno ruĝa*.

La esperantista apogo

Kompreneble tiun kanton oni tradukis en multajn diversajn lingvojn¹⁰. Kiel citite komence de tiu artikolo la ukraina poeto **Petro Palidova**, loĝanta en la regiono de Kijivo, tradukis en esperanton la unuan strofon, la plej kantatan, kaj ekde aprilo per jutubo eblis ĝin aŭdi dank' al interpretado de Ĵurij Krombet spektante filmeton¹ de Natalija Pendjur.

Krome **Ĵomart kaj Nataŝa** el Svedio iniciatis kolekton de filmetoj registritaj de pluraj esperantistaj artistoj el diversaj mondpartoj¹¹, kantantaj ukrainlingve nur tri el la kvin strofoj kun la jena surskribita laŭvorta traduko ankaŭ de Petro Palidova:



Petro Palidova

Ial nia glora Ukraino malgajiĝis
Sur la herbejo la ruĝa viburno kliniĝis
Kaj ni tiun ruĝan viburnon suprenigos
Kaj ni nian gloran Ukrainion, hej! hej! gajigos!

Ne kliniĝu, ruĝa viburno, vi havas blankajn florojn,
Ne malgajiĝu, glora Ukrainio, vi havas bonan familion,
Kaj ni tiun ruĝan viburnon suprenigos
Kaj ni nian gloran Ukrainion, hej! hej! gajigos!

Sur la kampo de printempa kampo estas orkolora falĉaĵo
Ukrainaj pafistoj komencis batalon kun malamikoj!
Kaj ni rikoltos tiun printempan tritikon
Kaj ni nian gloran Ukrainion, hej! hej! gajigos!

Kaj laste **Ĵomart kaj Nataŝa** en Esperanto rekantas la unuan strofon laŭ la traduko de Petro Palidova:

Surherbeje la viburno ruĝa triste klinis sin
Malgajiĝis ial nia glora land' Ukraini'
Sed ni kune la viburnon ruĝan suprenigos
Ukrainan nian landon gloran, hej! hej! regajigos ni!



Mankas tie la du plej naciismaj strofoj, kiuj senpere, nemetafore, parolas pri alvoko al sanga danco kaj al gloro de la Siĉ-pafistoj tra la stepoj. Certe malfacilas al pacemaj artistoj apogi militan buĉadon. Sed tio jam enkondukas gravan debaton aliloke pritraktindan: Kiel senarme subteni ukrainojn, kiuj sopiras liberigi sin de rusa jugo?

*Kontrolis Volodimir Hordijenko,
Valentina Gradzion, Petro Palidova
kaj Janine Dumoulin
21an de marto - 7an de julio 2022*



Fontoj

¹ *Jutuba esperanto-versio:* <https://www.youtube.com/watch?v=ITEqQaJ65JQ>

² Analizo de Volodymyr Viatrovitch: <https://nv.ua/ukr/opinion/cikava-istoriya-pisni-chervona-kalina-andriy-hlivnyuk-novini-ukrajini-50237632.html>

³ Aldona strofo de Nadiya Svitlychna:

Не хилися, червона калино, маєш білий цвіт.

Не журися, слава Україно, маєш добрий рід.

Laŭvorte:

Ne kliniĝu, ruĝa viburno, vi havas blankan floron

Ne kliniĝu, glora Ukrainio, vi havas bonan familion

Kantebla versio:

Ne kliniĝu vi, viburno ruĝa, blanke floras vi

Ne kliniĝu, Ukrainio glora, bonas famili'

⁴ *Instagrama versio de Andreo Ĥlivnjuk:* <https://www.instagram.com/p/Cae5TydPAxh/?hl=fr>

⁵ *Jutuba miksita versio de The Kiffness* <https://www.youtube.com/watch?v=lu8m5FA2nL8>

⁶ *Jutuba Pinkfloyd-versio* <https://www.youtube.com/watch?v=saEpkcVi1d4>

⁷ En Vilno <https://www.youtube.com/watch?v=NHHv3uiWKJA>

Ankaŭ spektinde en Estonio <https://www.youtube.com/watch?v=iWSMdxAxW3c>

⁸ Televida tagĵurnalo: <https://www.youtube.com/watch?v=kIHVqEEfdxI>

⁹ En pedagogia projekto de la mezlernejo de Myrhorod: http://mirgorod7.at.ua/news/oj_u_luzi_chervona_kalina_lunae_na_ves_svit_istorija_viniknennja_pisni_doslidnickij_proekt/2022-04-22-1470

¹⁰ Plurlingvaj tradukoj: <https://pryvatr.de/povstanski/63-hej-u-luzi-chervona-kalyna#slova>

¹¹ Esperantista artistaro: <https://www.youtube.com/watch?v=48kQNiu2dfg>

Portreto de

Katya Gritseva



Ukraina **revoluciema** artistino



Mia sango
miksiĝis kun la
sablo kaj la
fumo de
Mariupolo

Katja Gritseva estas Ukraina artistino, socialista, aktivula studentino, poetino. Ŝi naskiĝis en Mariupolo en la jaro 2000 en laborista familio. Dudek-du-jara, hodiaŭ rifuĝinto en Lvivo, ŝi laboras precipe en la medio de grafika fasonado perkomputila kaj presita, kaj enpaĝigo de libroj. Ŝi kontribuas ilustraj plurajn maldekstrulaj ukrainaj retejoj: Соціальний рух (Socialnyj Rukh / Socia Movado) kaj revuo Commons

Mesaĝo de *Katja Gritseva* okaze de la malfermo de ekspozicio de propraj verkoj en Parizo la 24an de junio 2022

«**M**i naskiĝis en Mariupolo, tiel mia sango miksiĝis kun la sablo kaj la fumo de tiu marindustria urbo. Mian arton grave influis tiu ekstera medio kaj observado de la vivmaniero de la homoj el tiuj malriĉaj kvartaloj de la uzinoj. Relative frue mi komencis desegni kaj rimarki kiel maljusteco pezas en la strukturo de nia socio. Mi de ĉiam inklinita al maldekstrulaj ideoj, mi bezonis nur iom maturiĝi kaj akiri la necesajn konojn kaj spertojn. En mia regiono nostalgio pri la soveta tempo estis ofta. Mi amis la sovietan monumentan arton, la mozaikojn, la freskojn, la propagandajn afiŝojn, kaj estetiko iel helpis min pli profunde interesiĝi pri la politika elemento de komunismo.

«De post adoleskaĝo miaj politikaj konvinkoj evoluis el primitiva prosovetismo al militanta opinio regulebla kaj konscia. Nepras por la ukraina maldekstrularo sin disigi de la stalina pasinteco de nia lando. Konsekvence mi kredas, ke socialismo devas esti kontraŭksenofoba, sentema al movadoj el la bazo kaj al realaj bezonoj de la socio, sed por efika agado, politika movado devas esti fleksebla kaj adaptiĝema al objektivaj kondiĉoj de apartaj lando, situacio kaj tempo.

«La politikaj ideoj, kiujn mi havis en la mezlernejo, plurflanke puŝis min elekti mian profesion. Lastatempe mi sukcesis universitatan licencon pri librografismo kaj mi studis diversajn teknikojn, konoj hodiaŭ postulitaj por labori por la maldekstrulaj informiloj. Krom ilustraĵojn, mi prilaboras ankaŭ litertipojn, enpaĝigojn de libroj kaj konceptadon de diversaj grafikaj produktoj. La plej agrabla, laŭ mi, estas labori per tradiciaj presteknikoj, kiel linogravuro, glugrafio kaj gravuro, sed dum milito miaj teknikaj kaj tempaj eblecoj estas tre limigitaj.

«Hodiaŭ mi estas aktiva membro de *Socialnyj Ruĥ* (Socia movado), kie mi aktivas kiel libervola dezajnisto, kaj kreas kompletan gamon de prezentaĵoj por la organizo: Instagramaĵoj, T-ĉemizoj, ilustraĵoj, broŝuroj kaj afiŝoj. Malfacilas imagi, kion mi ne faris por miaj kamaradoj. Mi senpere rilatas kun la komitato de la organizo, kaj mi havas sincerajn amikajn sentojn por niaj geaktivuloj, kvankam ilia pozicio ne estas unubloka kaj foje viglas diskutoj.



Pasintece mi travivis spertojn pri organizado de studentaj manifestacioj en Ĥarkivo. Mi plu aktivas kun la komunumo de mia art-akademio, kie mi estas membro de la konsilio por la studentoj kaj respondeculo de la dormejo. Antaŭmilite mi revizoris grupeton de marksista legado en Ĥarkivo, kaj mi provis esti ligilo por la maldekstrularo de tiu urbo. Hodiaŭ eĉ kun la statuto de rifuĝinto, mi daŭre aktive partoprenas en la ukraina socialista movado kaj faras ĉion, kion mi kapablas: de laboroj informcelaj al fizike pezaj kaj streĉaj. Libervole.



«Ĉar mia tuta familio troviĝis en okupita Mariupolo kaj ke iuj membroj de mia familio mortis pro la bataloj, povas esti psikologie malfacile por mi labori kaj dediĉi sufiĉe da tempo al arto. Tamen de nun mi kreadas pli da artaĵoj ol antaŭ la milito, ĉar ĉiu batalas sur sia fronto, kaj mia ĉefa tasko estas popularigi la ideojn de socialismo en Ukrainio, krei novan stilon rekoneblan por la orient-eŭropa maldekstrularo, kaj kompreneble, helpi nian socion kontraŭi la rusan imperiismon. La malklarvidaj ukrainaj kaj rusaj grupoj de maldekstruloj, parazitante la sovetan heredaĵon, gravege difektis la opinion de la ukraina popolo pri komunistoj kaj diversaj maldekstrulaj geaktivuloj. La konvinko de iuj lokaj aktivuloj estas, ke la milito oponas la du imperialismojn, t.e. NATO kaj Rusio, kaj ke bona estas la ideo saboti la ukrainan armeon, aŭ pasive tute neagi, kio estas fundamente malprava.

Tia opinio malproksimigas de ni la tempon de la venko por Ukrainio luktanta por malkoloniigo, senigante la maldekstrularon je popola subteno, kaj la ukrainan maldekstrulan movadon je ebleco disvolviĝi. Mi esperas, ke tiu hororo finiĝos kiel eble plej rapide, kaj ke kune ni komencos rekonstrui nian belan landon, iom post iom proksimigante ĝin je modelo de forta, sociala ŝtato, kiu flegeme kaj sensive pritraktos sian popolon, kiu honeste laboras por pli bona mondo. Mi estas sincere dankema al miaj francaj gekamaradoj, kaj aparte Patrick Le Tréhondat el la Eldonejo Syllepse, pro la okazo al mi donita esti vidata kaj aŭskultata, pro la aparta atento al la ukrainaj socialistoj, kaj pro la subteno al ili aportita en tiel malfacila tempo. La solidareca agado, kiun vi esprimas estas grava kontribuo por la historio kaj la spirito de la internaciaj maldekstrulaj movadoj. Mi pensas, ke hodiaŭ ni staras sur la taŭga flanko kaj mi deziras ke Francio ne kritikeble mispaŝu en siaj elektoj.»

Lvivo, la 13an de junio 2022








ALVOKO AL SOLIDARECO KUN LA UKRAINAJ STUDENTOJ

La rusarmea invado en Ukrainio kreis ne nur terure malfacilegan politikan kaj ekonomian situacion, sed ankaŭ profundan humanan kaj socian krizon. Sub bombardado de raketoj kaj eksplodoj de pafoj, milionoj da Ukrainoj devige forlasis sian hejmon, sian labor- kaj stud-lokojn, serĉe ŝirmejon malpli danĝeran. Inter ili, centmiloj da gestudentoj.

Jam ekde la unuaj monatoj de la milito estis detruitaj multegaj ligoj inter organizoj, sindikatoj kaj aliaj reprezentadoformojn de studentoj.

Plejparte ili restis en la lando entute izolitaj, aŭ en eduk-strukturoj senrimedaj. Kelkaj foriris eksterlanden, dum aliaj fuĝis per propraj rimedoj el la teritorioj rapide okupitaj. Multaj rekrutiĝis ĉe rezistantaj rotoj, kiel ekzemple grupoj de la teritoria defendo. Nur nun¹ ni komencis ricevi pli detalajn informojn pri iliaj situacio, ĉiutagaj defioj kaj helpokrioj.

La plej grava problemo por la ukrainaj studentoj nuntempe estas la kostoj rilate al iliaj universitataj loĝejoj, por kiuj multaj ŝulde monpruntegis. Kvankam en multaj ukrainaj regionoj estas praktike tute ne eble ĝui la loĝservon en la universitataj dormejoj pro la okazanta milito, kaj kvankam plejparto de tiuj, kiuj tie antaŭe vivis, jam delonge forlasis la lokojn, la studentoj troviĝas en devigo plupagi la luprezon de sia loĝejo, kiun ili ne plu okupas. Ofte al tiuj kostoj aldoniĝas





La
socialajn aferojn,
inter kiuj la loĝado,
ignoras la aŭtoritatoj.

Solidaru!

minacoj forĵeti rubujen iliajn personajn aĵojn, kiujn ili haste forlasis en sia ĉambro, eĉ pri definitiva interrompo de iliaj studoj en supera lernejo, aŭ pri rifuzo pri aljuĝo de diplomo. Nu, kvankam la leĝoj de la lando favoras la studentojn (eĉ se nek universitatoj, nek kampusoj kapablas adekvate disponigi tiujn servojn), la socialajn aferojn, inter kiuj la loĝado, ignoras la aŭtoritatoj.

Krom la kostoj de la universitataj loĝejoj, la studokostoj estas doloriga problemo por multaj. Medikamentoj, nutraĵoj, vestaĵoj kaj kuracado enlistiĝas inter la ĉefaj elspezoj de la ukrainaj studentoj, kiuj plej ofte ne plu havas la necesajn rimedojn, por ĉiujn alfronti. Nur malmultaj superaj lernejoj pretas kunhelpi kaj prokrasti la pagojn de la universitatajn kostojn, tiel ke multaj studentoj pretas forlasi siajn studojn, sen ricevi la diplomojn, por kiuj ili jam elspezis gravajn sumojn en la lastaj jaroj. Konsekvence ilia profesia estonteco en postmilittempa Ukrainio, kie industrio estas detruita, iĝis tre malcerta.

La milito kaj la malkapablo de la ukrainaj aŭtoritatoj solvi la socialajn kaj humanajn krizojn kaŭzitajn de la milito alportis ne nur haoson en la vivo de la ukrainaj studentoj, ili ankaŭ kreis novan malfacilan realaĵon, estigante problemojn, kiujn la studentoj mem ne povas solvi. Ni, organizo de ukraina maldekstrularo Соціальний рух (Socialnyj Ruĥ / Socia Movado), alvokas al internacia solidareco en tiuj malfacilaj tempoj kaj proponas, ke kuniĝu vi al ni por monkolekti donace al humana helpo favore al bezonantaj ukrainaj studentoj.

Nia plej potenca armilo estas solidareco!

Соціальний рух (Socialnyj Ruĥ / Socia Movado)
Por kontakto: Katya Gritseva, de27ad00@gmail.com

¹ Lvivo, julio 2022

<<Ni nepre rekonstruu maldekstrulan sindikaton por studentoj en Ukrainio.>>

Diskuto kun Katja kaj Maksim, ukrainaj studentoj

Katja kaj Maksim, vi estas gestudentoj en Lvivo. Katja ĉe la arta akademio kaj Maksim pri informadiko. En la helpalvoko, kiun vi lanĉis profite al la ukrainaj studentoj, vi aludas pri loĝado de la studentoj. Pro la milito studentoj ne plu vivas en siaj loĝejoj kaj tamen devas ĝin pagi. Ĉu vi povas doni ekzemplojn?

En Ukrainio studentoj povas vivi en ŝtataj dormejoj proksime de sia universitato. La loĝokostoj estas relative malaltaj (de 150 ĝis 300 eŭroj por semestro). Tamen eĉ dum paca tempo la kosto estis neeltenebla por studentoj, kiuj stipendie ricevis ne pli ol 50 eŭrojn monate. Grandparte la loĝantoj en la ŝtataj dormejoj venis el orientaj regionoj de Ukrainio, kie la familioj loĝas en okupitaj teritorioj. Por kelkaj el miaj geamikoj studi en universitato estis la nura ebleco por forlasi la popolan respublikon de Donetsko aŭ tiun de Luhansko, ĉar la ŝtato povis al ili disponigi loĝejon kaj minimumajn vivrimedojn. La studentoj frontis kontraŭ loĝoproblemojn, kiam komenciĝis la vasteskalan invadon de ukrainaj regionoj. Kiel mi, multaj studentoj el Ĥarkivo devige fuĝis el sia studenta loĝejo. Tiuj de Mariupolo kaj de multaj ceteraj urboj bombaditaj neniam plu povos reveni en sian hejmon, kaj iliaj gepatroj evidente ne povas ilin helpi, ĉar ankaŭ ili ĉion perdis. La rusaj kaj ukrainaj armeoj ofte uzas la studentajn dormejojn kaj studejojn kiel militistajn bazojn. Foje, kiel en la nacia universitato de Kijivo, la studentoj devas kunvivi en la sama konstruaĵo kun la soldatoj. Ja pro bezono nepre sed ĝi endanĝerigas la vivon de la studentoj. En Ĥersono la Putinaj trupoj ne agis tiel deceme: la armeo ekokupis la universitatajn loĝejojn, kaj forpelis la studentojn, sen lasi al ili la tempon forpreni siajn personajn aferojn. Same okazis ĉie en okupitaj teritorioj, kaj krome rusaj bomboj regule frapas studejojn kaj dormejojn.

Kvankam multegaj studentoj hodiaŭ kvazaŭmizere vivtenas sin, psike kaj fizike damaĝitaj de milito, la ŝtato devigas nin daŭre pagi por la studoj, kiuj

ne ĉiam konvene disvolviĝas, kaj kies nivelo malaltiĝis kompare al la antaŭmilita. Kaj plej maljusta estas la devigo pagi por la ĉambroj, en kiuj ni ne povas vivi.

Tamen la dormejoj de la ukrainaj regionoj relative trankvilaj daŭre funkcias kiel antaŭe. Ili akceptas eĉ rifuĝintojn kaj studentojn, kiuj perdis sian loĝejon. Sed danĝere estas vivi en batalzonoj, eĉ kiam la danĝero malpliĝas; tial la administracio ne volas respondi pri la vivo de la studentoj kaj foje forpelas ilin. Tiel multnombraj studentoj devige restadas en danĝeroplena urbo, kaj la nunaj kondiĉoj trudas al ili pli loĝejon krom la ceteron. Malfacilas postuli respekton de siaj rajtoj dum milita tempo en lando, kie profunda krizo skuas ekonomion. Pagi aŭ ne universitatan loĝejon iĝis malfacila, morala kaj materiala elekto por studentoj. Kaze de nepago, oni timas forpelon el la loĝejo, malpermeson trapasi ekzamenojn, perdon de personaj posedaĵoj, oni suferas daŭran psikan premon kaj fine oni riskas entutan forpelon el la universitato. Krome la akumulita ŝuldo malpliigas la kapablon de la ministerio pri Edukado pagi la salajrojn kaj la stipendiojn. Kelkaj universitatoj malgrandigas sian dungitaron ĉar «neprofitdona». La disdono de la monhavo estas entute malklara. Ĉiu povas senti kulpecon, konstatante ke propra universitato kolapsas pro monmanko. Tamen pri tiu situacio vere ne kulpas la studentoj sed la koruptita administracio. Tiu grava problemo estas komplika kaj ne facile solviĝos per ĝenerala striko, aŭ io tia. Ni staras en drama kaj unika situacio, kies solvo povas veni nur el vera revolucio en la studenta movado.

Kiujn ceterajn problemojn alfrontas studentoj en sia ĉiutaga vivo?

Ni tuj diru, ke rekte fizika danĝero daŭre minacas la vivon de la studentoj kaj iliaj familioj, kiuj restis en Ukrainio. Tial la ebleco koncentriĝi sur siaj studoj estas malfacila. Psika elĉerpiĝo aŭ troa ŝuldiĝo devigas ilin forlasi siajn studojn. Kaj konsekvence Ukrainio riskas estontan mankon de specialistoj, kiuj povus utili al ekonomia aktiveco kaj helpi la landon jam nun kaj postmilita. Multaj forfuĝis eksterlanden. La studentinoj (estas malpermesate al viroj inter 18 kaj 60 jaroj forlasi la landon) devas elekti inter du eblecoj: daŭrigi siajn studojn kaj vivi koste de universitatoj, kiuj akceptis ilin, aŭ provi vivteni sin proprarimede. La dua vojo ofte kondukas al malstabila laborloko sen jura protektado kaj tio malfaciligas la procezon de integriĝo kaj adaptiĝo al nova medio, ekzemple eksterlande. Kelkaj studentinoj plendis pro naciemaj aŭ malestimaj etosoj far universitataj komunumoj aŭ profesoroj en landoj, kie ili rifuĝis. Tiaj problemoj devigas ilin foje reveni en Ukrainion. Mi konas

multajn studentinojn en mia akademio, kiuj elektis pluvivi en Ukrainio spite la danĝeron, prefere ol subiĝi al ĉikanadoj eksterlande. Tial necesas defendi la rajton je komfortaj kaj neperfortaj akceptokondiĉoj en la eŭropaj universitatoj, kaj disdoni materialon, kiu helpas ilin adaptiĝi al ilia nova medio.

Necesas ankaŭ alkalkuli malvigliĝon de instruistoj pro sama psika elĉerpiĝo, trooftan nepagon de salajroj, disdeĝnon de la ŝtato rilate laborprotektado. Ekzistas multaj ekzemploj pri instruistoj, kiuj heroe plulaboris eĉ meze de perfortaj interbataloj. Ili mem organizis elsavon de studentoj, partoprenis en humanitara interhelpo, kaj donis siajn lastajn fortojn pro bono de scienco. Tamen ekzistas ankaŭ negativaj ekzemploj, kiam studentoj perdis kontakton kun sia universitato, kiu restus ilia nura rifuĝejo. Aŭ kiam instruistoj (en la okupitaj teritorioj) iĝis kunlaboristoj kaj trudis al la studentoj opiniojn diktitajn de la rusaj aŭtoritatoj.



En la alvoko, vi mencias, ke studentoj engaĝiĝis por la defendo de la teritorio. Ĉu vi bonvolas iom pli diri pri tio?

Junuloj konsistigas gravan parton de la ukrainiaj armeaj fortoj, notinde por la teritoria defendo. Kvankam la ŝtato studentojn sendevigas je militservo, multaj studentoj vole partoprenas en la armita rezistado. La militaj administracioj rifuzis kelkajn, ĉar la nombro da nespertaj volontuloj estis tro granda. La studentoj laboras en la armeo sub la samaj kondiĉoj kiel la ceteraj militistoj. Kutime antaŭ ol daŭrigi siajn studojn post soldatservo, multaj studentoj elektis unu sabatan jaron.

Tamen oftigis, ke studentoj sur batalfronto ricevis leteron de sia universitato, avertinte ke ili ne plu rajtos daŭrigi siajn studojn. La batalantaj studentoj bezonas gravan helpon. Ju pli proksima al la frontlinio, des pli malfacilas ricevi bazajn aĵojn por la ĉiutaga vivo. Krome la regimentoj por la teritoria defendo batalas sur frontlinioj same kiel la ukrainiaj armeaj fortoj. Kaj kompreneble malfacilas esti juna dum milito.

Katja, ci estas membro de la konsilio de la studentoj de cia universitato kaj deligito de cia dormejo. Ĉu ci bonvolas klarigi, kio estas tiu konsilio, ĉu la reprezentantoj de la studentoj estas elektitaj? Kion ili faras? Kiu estas cia rolo kiel delegito de dormejo?

Ĉiuj institucioj por superaj instruoj en Ukrainio disponas pri organoj kvalifikitaj kiel *memmastrumado far la studentoj*. Iliaj membroj diverse aktivadas kaj povas malsimile interagi kun la studentoj kaj la administracio. Sed ili plenumas precipe burokratajn taskojn kaj informas pri la studenta vivo per presaĵoj kaj sociaj retoj. Kelkajn decidojn la universitata administracio ne rajtas preni sen antaŭa konsento de la studenta konsilio. Konsekvence, se vi sufiĉe aplombe pravas vian memfidon, vi povas konstrue evoluigi aferojn, eĉ se koruptita administracio tre probable grandparte kontraŭstaros viajn strebojn. Por eniri la organojn pri memmastrumado far la studentoj, necesas esti elektita de la studentoj, okaze de balotoj regule organizitaj, aŭ vi elmontru viajn kvalitojn plaĉajn al la administracio.

Verdire mi eniris la konsilion kvazaŭ akcidente. Min oni invitis al kunveno de la sindikato de la artistoj (*flava sindikato*, kompreneble). Mi tien iris kaj fakte mia nomo aperis inter la membroj de la studentoj de nia akademio, ĉar miaj profesoroj rekomendis min kiel respondecan junulinon. Jen nek atendita, nek de mi dezirata situacio. Tamen nun mi konsideras, ke ĝi estas tre bona sperto, eĉ esenca en mia vivo. Ĝi helpas min en mia revoluciema praktiko. Jam ekde la unua labortago de la konsilio mi provis kiel eble plej klare montri al la studentoj la nedecajn kondiĉojn, en kiuj ili vivadas,

kaj mi provis protekti iliajn rajtojn. La plej gravaj problemoj de nia akademio tiutempe estis materiaj kaj ekonomiaj. Mi do komencis labori specife pri la dormejoj kaj la financaj problemoj por ilin solvi. Malfacilas koncentriĝi sur arta kreemo, kiam tegmento likas, kiam planko putras, kaj blatoj forvoras vian lastan manĝon. Laboro de respondeculo pri dormejo tre similas al tiu de sindikata deligito. Ĉiuj studentoj, kiuj vivis en la akademio, alfrontis samajn problemojn, kaj konvikeme pretis radikale agi. Antaŭ la milito ni intencis grupiĝi kontraŭ plialtigo de la porstudentaj loĝokostoj. Ni ne sukcesis, ĉar ekis milito. Tamen dank' al mia partopreno en la mastrumado de la dormejo, la administracio anstataŭis la koruptitan laboristaron de la dormejo, kaj komencis renovigojn (unufoje de 30 jaroj!). Kaj tio multe simpligis nian vivon dum la unuaj tagoj de la invado. Efika manaĝero estis nomunita, novaj kaldronego kaj akvokondukiloj instalitaj, muroj refarbitaj. Sen tiuj ŝanĝoj, mi certas, ke nia vivo fariĝus vera infero. Mi starigis komunikadon kun la studentoj laŭ maldekstraj principoj, horizontalaj. Tio ebligis rapidan mobilizadon kaj evitis neutilan anksion pro malordo. Pli frue, dum du semajnoj en bombadita Ĥarkivo ni travivis kvazaŭ studentan Komunon amikeman, kaj ni eltenis dank' al interhelpo kaj solidaro (ni ricevis neniun ajn subtenon; nek de la akademio, nek de la ŝtato)*.

** De post tiam, Katja rifuĝis en la akademio pri artoj en Lvivo, kie ŝi daŭre aktivadas.*

Fine kelkajn vortojn pri la ukraina studenta movado. Ĉu ekzistas sindikataj organizoj por studentoj aŭ junularaj organizoj aktivaj? Kiuj estas la aktivuloj de Socialnyj Ruĥ (Socia Movado) en la junularo?

Kelkaj organizoj en Ukrainio ĝuste prezentas sin kiel studentajn movadojn, sed bedaŭrinde, ili ĉiuj estas kontraŭmaldekstrulaj. La libertariana organizo *Ukrainaj studentoj por la libereco*, kiu ŝajne estas aktuale la plej vasta studenta organizo, disvolvis aktivan retaron. Laŭ ĝi, libereco estas sinonimo de libera merkato kaj privatigo de la universitatoj, kion ni fundamente kontraŭas. La sendependa sindikato *Rekta Agado* pli frue kunigis maldekstrulajn studentojn en Kijivo kaj diversaj grandaj urboj. Hodiaŭ plejparto de la maldekstrulaj ukrainaj aktivuloj venas el tiu sindikato. Sed de post 2018, la aktivado de *Rekta Agado* estas blokita. Ne ekzistas alternativo rilate porstudentan organizon, escepte klare dekstrulaj organizoj, burĝaj kaj skoltaj. Necesas rekonstrui porstudentan maldekstrulan sindikaton. La maldekstrula junularo ĝenerale kuniĝis en pli larĝaj organizoj, kiel *Socia Movado*. Sed ĝi ne proponas sendependan retaron specifan por

junularo. En nia organizo *Socia Movado*, multaj junuloj egalnivele laboras kun ĉiuj aliaj membroj. Ili tre aktivas en la revoluciema flanko.

La plej juna membro de la konsilio de *Socia Movado* estas 19-jara kaj li tre aktivas. Eĉ pli junaj en la movado same volontulas. Aktivuloj firme celas renovigi la solidarajn ligojn inter studentoj en Ukrainio. Kaj la internaciaj helpoj por studentoj povas tiucele kontribui. Dum la milito eltretitaj estas la rajtoj de gejunuloj, kiuj eĉ ne povas elteni siajn bazajn bezonojn. Tial, ĝuste nun, maldekstrulaj aktivuloj povas elmontri je kia grado socia subteno al studentoj gravas por ili. Tiel ili kuraĝigu la gejunulojn pripensi la neceson pri ridikalaj ŝanĝigoj en la socia sistemo.

*Diskuto de Katja Gritseva kaj Maksim kun Patrick Le Tréhondat la 1an de aŭgusto 2022.
Tradukis Marcelo*

Gluaĵo de Katja Gritseva

Sur la ruinoj de la milito kreskas esperdonaj heliantoj



Portreto de

Katya Poliŝĉuk

Ĉu Ŝtalbirdo estas detruenda?



Mi ♥ Mariupolon

Ptaŝka (Birdo en la ukraina lingvo) estas ŝia kromnomo, ĉar jam de ŝia infanaĝo ŝi senĉese kantadis. Ŝi tutmonde famiĝis dank' al perrete dissendita filmeto, kiu aŭdigas ŝian kristalan voĉon interpretantan tradiciajn kaj ribelajn kanzonojn el keloj de la uzino Azovstal en Mariupolo, kiam la bombadoj de la rusa armeo portempe mutis. Hodiaŭ dudek-du-jara, iĝinte heroino, la itinero de tiu neordinara junulino rakontindas.

— pri Katerina Poliŝĉuk
kromnomata **Ptaŝka** —

Satano 32846

Ekaterina Poliščuk naskiĝis en la regiono de Ternopil, okcidente de Ukrainio. Laŭ aserto de la patrino, infana ŝi estis gaja kaj petolema, ĉiam pozitiva, eĉ en nefacila situacio. Ŝi sciis kanti antaŭ ol paroli! Endormiĝonte la knabino postulis de sia patrino tradiciajn kanzonojn. Sesjara ŝi partoprenis en desegnokonkurso. Ŝia pentraĵo prezentis birdon, ukrainan tridenton kaj viburnon. De tiam ŝi kromnomiĝis Ptaŝka. Ŝi volonte partoprenis en porinfanaj 'olimpiaj ludoj' kaj konkuroj de muziklernejoj. Ŝi tre ŝatis montriĝi sur scenejo antaŭ publiko. Post la naŭa lernojaro ŝi ekstudis en la kantofako de la *Ternopil Art Vocational College* laŭnome *Solomiya Krushelnytska*. Tiam la studentino montriĝis kreema kaj iniciatis multajn aktivaĵojn.


Valerja Panasiuk, tiama samklasanino raportas, ke «*Ptaŝka ofte engaĝiĝis en la aferoj de la lernejo. Ŝi pretis helpi al ĉiuj kaj nutris multajn kontaktojn. Ŝi jam rimarkigis sian kuraĝon kaj deziron antaŭeniri. Daŭre ŝi konsentis novajn taskojn en plej diversaj medioj. Ekzemple, antaŭ la diplomovespero, ŝi partoprenis en la kreado de la scenaro kaj en la filmado. Ĝenerale, Ptaŝka ŝatas organizi ĉion mem.*»

Ptaŝka estas brila studentino, ŝi ludas banduron, tradician kordinstrumenton el la ukraina folkloro, kaj ŝi talente soprane interpretas klasikaĵojn. Sed ŝi estas ankaŭ inspirita poetino. Kun sia instruistino Maria Chornenko kaj amikinoj, ŝi pasigis beletrajn vesperojn titoliĝintajn «*literatura diapazono*». Tiam Ptaŝka recitas sian proprajn poemojn. Multfoje ŝi publikigis sian verkojn en *Free Life*. Kaj post publikigo de ŝia poemaro *Melodio de l' animo* Bohdan Romanovych Mayuk, instruisto en la ŝtata teknika universitato *Solomiya Krushelnytska*, kun granda entuziasmo laŭdis sian studentinon. Krome Ptaŝka mem verkis ankaŭ kanzonojn kaj melodiojn jam de sia infanaĝo. Kaj dum kvar kvin jaroj ŝi aktoris en la drama popola teatro de Ternopil *Konstelacio*. Kaj kiajn rolojn ŝi ludis! Jen ciganino Aza, jen freneza Elena.... Bohdan Mayuk ridetante memoras, ke li neniam antaŭe vidis tian aktorinon kaj asertas, ke filmetoj pri ŝiaj spektakloj daŭre furoras sur interreto.

«*Ptaŝka estas fajra junulino asertas ŝia amikino Valerja. Eĉ ŝiaj haroj pruvas tion! Ŝi ĉiam tinkturiĝas al si ilin jen ruĝaj, jen ĉerizaj, jen oranĝaj. Ptaŝka estas temperamente fajra, ekstere kiel interne. Ŝi inspiras per sia pasio kaj energio!*»

En 2019, dekokjara Ptaŝka diplomiĝis kaj daŭre parolis pri scenejoj kaj arto en ĉiutaga vivo. Tamen ŝi forlasis la muzikan universitaton por tute alia aktivaĵo. Sendependema Ptaŝka transloĝiĝis en ĉefurbon Kijivo. Ŝia patrino estis maltrankvila, tamen memstara en la vivo, Ptaŝka sekvis la sentencon de sia patrino: «*En la vivo, nepras mem ĉion fari.*» Tiel ŝi enposteniĝis en la lernejo por motorciklantoj *The Riders*. Kaj ŝi ekpasiĝis pri motorciklista profesio. Ŝi decidis akiri propran motorciklon kaj aĉetis ĝin. Tiu posteno rapide montris al ŝi la danĝeron de la afero kaj tio konvinkis ŝin sekvi sukuristajn kaj flegistajn kursojn.

Samtempe Ptaŝka interesiĝis ankaŭ pri militaj aferoj. Laŭ Valerja, Ptaŝka firme asertis sian civitan konvikon jam en la altlernejo kaj pasiĝis pri historio de Ukrainio. Nature en Kijivo ŝi partoprenis en manifestacioj kaj aliĝis al organizaĵo por defendi homajn rajtojn. Iam dum unu manifestacio Ptaŝka estis «tordita» kaj severe frapita. Sed obstine ŝi neniam forlasas la idealon kaj ne timas problemojn, kvankam foje ŝi raportis pri vere nekredeblaj aventuroj travivitaj! Por ŝia amikino Valerja, Ptaŝka estas ekzemplo pri kuraĝo.



Valerja memoras, ke printempe 2021 ŝi promenis kun sia amikino en la parko Sosnica, kiam balancilo frapegis kapon de apuda knabineto. Ptaŝka tiam alproksimiĝis al la terurigitaj gepatroj kaj diris: «*Trankviliĝu, trankviliĝu, mi estas kuracisto!*» dum fakte tiam ŝi nur sekvis medicinajn kursojn. Sed ŝi lerte sukcesis kvietigi la homojn kaj vokis ambulancon.

Sekve Ptaŝka parolis el siaj geamikoj pri sia intenco aliri al fronto kiel militista kuracisto. Kaj en novembro ŝi iris al la batalanta zono de Donetsko en la bataljono de la volontulaj flegistoj. Sed neniam ŝi subskribis kontrakton por arma servo. Tiun medicinan bataljonon kreis Yana Zinkevich, volontula kuracistino, en 2014 kiel libervola organizaĵo por helpkuracaj volontuloj. Ĝia slogano: «*por la bono de ĉies vivo.*» Ili savis, kuracis, helpis multnombrajn civilulojn kaj soldatojn.

Ankaŭ al gepatroj ŝi diris, sed neniam ŝi parolis pri sia situo, nek pri sia situacio. Ŝi simple diris, ke ŝi laboras en hospitalo. Kaj ili neniam tion rivelis al siaj najbaroj. Ili preferis sekrete teni tiun informon, por ne endanĝerigi sian filinon. Fakte en la unuaj tagoj de la milito Ptaŝka venis al la hospitalo de Mariupolo por savi homojn. La hospitalon detruis bombadoj, do ŝi kun aliaj kuracistoj kaj flegistoj troviĝis en la ŝtalezino Azovstal.



La fakinstruisto Bohdan Romanovych deklaras:

«Ptaŝka estas birdo, sed birdo el ŝtalo! Ŝi povus ŝminki sin kaj surŝultre porti saketon por iri al rendevuoj, sed anstataŭ tion, ŝi elektis mitralon kaj kamuflaĵon. Ptaŝka estas spirite tre forta! Ŝi estas batalanto sen ajna timoguto en la sango!»

Longtempe li ne sciis, kie troviĝis la junulino, ĝis ankaŭ li ekvidis la faman filmeton, en kiu, kun la lastaj defendantoj de la uzino Azovstal, ŝi laca tamen nevenkita, kantas patriotajn kanzonojn en subtera mallumo, dum aŭtenta infero liberaere fulmadas kaj tondradas.

Konklude de longa ilustrita artikolo¹ publikigita la 6an de majo, Valerja diris sian ŝokon, eksciinte ke ŝia amikino troviĝas en Mariupolo. Tion ŝi tute ne povis imagi. Dum Bohdan Mayuk karakterizas sian lernintinon Ptaŝka kiel heroinon por ĉiuj ukrainoj. Li diris, ke li «*ne povis imagi iun alian*

ĉe ŝia loko, ĉar simple neniu alia povus tion elteni. Sed Ptaŝka, jes! Ŝi eltenos!»

1270 komentoj abundis sub la retejo sekve al publikigo de tiu artikolo. Inter tiuj, rimarkindas tiu de Ivan Svitlar, la 13an de majo, do unu semajnon poste. Ĝi citas reagon de la patrino, sen precizigi la fonton. «*Kial ili publikigis ĉiujn datumojn de mia filino? Kial neniu unue petis de mi permeson? Ili sendas al mi ligojn el diversaj fontoj, kie estas skribite ĉion pri Katya, estas fotoj. Ili malkaŝis datumojn pri mia infano. Ja mia filino estas patrioto, ni fieras pro ŝi. Sed por paĉjo kaj panjo ŝi estas unue infano, pri kiu ni maltrankvilas. Ni sciis, ke Katya batalas ĉe fronto, sed ni nenion diris al iu ajn, ĉar ŝia sekureco gravas antaŭ ĉio.*»

Unu tagon Svitlana, la patrino de Ptaŝka, ricevis telefonalkvokon informante, ke ŝia filino estis kaptita de la rusoj. Tion eksciinte, Ptaŝka tuj sendis filmeton montrante la malon.

Alia ŝoko por la patrino sekvis, kiam oni informis pri la morto de ŝia filino. Svitlana provis tuj serĉi la originon de tiu novaĵo por kontroli ĝian verecon, ĉar ŝi rifuzis kredi ĝin. Ŝi konstatis, ke la mesaĝo malaperis. Tamen perrete rapide disvastiĝas misinformoj, kaj la patrino ekricevis kondolencojn. Tial ŝi ekfunebriis, religieme fastis. «*Tiam en tri tagoj mi travivis dudek jarojn de mia vivo.*» ĉagrene diras Svitlana.

La fuŝaĵo malfrue atingis Ptaŝkan, kiu tuj mallongege kaj malbonkvalite telefonis al sia patrino. Poste, kiam ŝi sukcesis paroli plilonge, dum pluraj minutoj, Ptaŝka raportis, ke ŝi havas multe da laboro, ĉar kuŝas multaj vunditoj rifuĝintaj en la uzino.

Svitlana, la patrino, kaj Ptaŝka, la filino, restis en kontakto ĝis la 19a de majo. Sekvis longa silento, atendo, plursemajna atendado, dum kiu Svitlana daŭre asertis sian scion, ke ŝia filino plu vivas. Kaj ŝi daŭre volis montri sian fidon. Ŝi daŭre aŭskultis la voĉon de sia filino en la filmeto el Azovstal. Tiam Ptaŝka celis kvietigi la samsortanojn sed ankaŭ alerti la eksteron. Kaj per sia voĉo ŝi hipnotis milojn da personoj.

La 14an de majo sur le reto videblis nova filmeto, kiu montris kaptitojn eluzinigitajn far la rusoj. Inter ili klare aperis Ptaŝka, facile rekonebla. Kaj denove longa atendado sen novaĵoj, kun propono de la ukraina registaro interŝanĝi militkaptitojn, kiel nura espero por rapide retrovi sin intime en familio.

Fotoj de tiu artikolo fontas el diversaj retejoj

Tri monatoj pasis. La 19an de aŭgusto Svitlana povis rakonti la sorton de sia filino en kaptiteco. Ĝin raportis al ŝi samsortanoj, Vladyslav Zhaivoronok, Denys Chepurko kaj Dmytro Usachenko, pli frue interŝanĝe liberigitaj el Olenivka, kie Ptaŝka devis submeti sin al pridemandado. Ili ne malkaŝis torturojn kaj perfortojn, inter alie per fastigo, soifigo kaj fizikaj streĉadoj sen kuraca flego. Reprezentantoj de Internaciaj helpservoj ne rajtas eniri tiun teritorion de Olenivka. Kvankam mankis rektaj rilatoj kun sia filino, Svitlana opiniis, ke baldaŭ ŝia «birdo» kaj ĉiuj defendintoj de Mariupolo revenos hejmen. Ŝi fidis al la kompetentaj aŭtoritatoj por tiucele plenumi ĉiujn necesojn. En tiu tago disvastiĝis informo pri starigo de speciala tribunalo por la Azovstal-kaptitoj. Ĝi estus spektakle planita la 24an de aŭgusto; nehazarda dato, ĉar ĝi festas sendependecon de Ukrainio. Kaj rumoroj sugestis, ke tiuokaze rusoj ĵetus misilojn sur la lokon. Kaj tiam la celitoj tuj respondecigus Ukrainion pri la krimo.

La 16an de septembro rusaj propagandistoj rete dissendis filmeton pri pridemandado de Ptaŝka. Ne eblas scii, kiam ekzakte ĝi estis filmita. Tamen tiel la ekstera mondo vidis, ke tiam ŝi plu vivas kaptita de la malamika armeo. Ptaŝka tiam kuraĝe rezistis, eĉ provis ŝerceti. «*Mi pensas, ke mi estas pli utila kiel flegistino. Mi ne iĝis kuiristo, ĉar mi nebone kuiras. Mi iĝis nek pafisto, nek mitralisto, nek kanonisto. Mi certas, ke mi portis plej grandan profiton kiel flegistino.*» respondis ŝi dum la pridemandaro. Ŝi parolis ukrainlingve kaj tial rusaj subskriboj estis aldonitaj. Ŝi digne respondis rigardante nek la kameraon, nek la propagandistojn. Ŝi asertis bedaŭri nur unu aferon: ŝi sakris sur unu el la filmetoj. Kaj ŝi pardonpetis al sia patrino pro tio. Se ŝi devus denove elekti, ŝi reirus al Mariupolo sen kaŝpenso, por savi homojn. Neniu informo pri la sorto de la junulino aperis fine de la filmeto.

Reage Svitlana la patrino intervjuita unue diris sian fieron pri sia filino, kiu tiel forte tenas sen rezigni. «*Mi scias, ke certe ŝi revenos hejmen. Estis tre afable de ŝi, en tiel malfacila situacio, pensi pri kiel mi perceptis kion, ŝi diris sur filmeto.*»

Poste Svitlana konfesas, ke ŝi ne povis taksi, ĉu la junulino maldikiĝis, ĉar ŝi surhavis larĝajn vestojn. Ŝi ankaŭ atentigas, ke Ptaŝka estis de la akuzitoj nomita *embuska pafisto*, kvankam ŝi estis flegistino. «*Fakte ŝi delonge aktivis kiel*

flegistino, ĉiuj tion scias. Mi scias, ke en Rusio ili mensogas. Ŝi eĉ ne kapablas pafi. Tion raportis al mi Azov-knaboj, kiuj konas Ptaŝkan.» konfirmas la patrino.

Finfine la 21an de septembro, post kvar monatoj da kaptiteco, venis informo, ke multaj Azov-defendintoj estis liberigitaj. Inter ili, la kvin plej famaj komandantoj, Denys Prokopenko «Redis» de «Azov», Serhiy Volynskyi «Volyn» el la 36a brigado de la mararmeo, Svyatoslav Palamar («Azov»), Oleg Khomenko («Azov»), Denys Shlegu el la Ukraina Nacia Gvardio, ankaŭ gravedaj soldatinoj - Maryana Mamonova, Yana Shumovetska kaj Anastasia Chernenkaya kaj krome Ptaŝka, k.a.. Sume 215 homoj laŭdataj kiel herooj.



Kiel Ptaŝka iĝis heroino: rolo de interreto kaj informservoj

Jam en majo, tuj post la enretigo de ŝiaj personaj filmetoj el la Azovuzino, ankaŭ retĵurnaloj kaj televidelsendoj², kiel Radio Svoboda, 24TV Kanal, Telekanal Kijiv, siavice dissendis la kantadon de Ptaŝka, aldonante laŭdojn, kaj foje dramajn informojn, prezentante fotojn el diversaj periodoj de ŝia vivo kaj intervjuojn de proksimuloj, de ŝiaj patrino, lernejamikino aŭ eksinstruisto. Kaj graslitere kaj emfaze jen la poseda adjektivo «nia» antaŭas ŝian nomon aŭ kromnomon, kiel alproprigo de ŝia persono far la ĵurnalistoj por la tuta lando.

Tiuj tuaj reagoj, ŝajne senpripensaj, kvazaŭ instinktaj, povus krei timon, ke tiu elmonstro signus Ptaŝkan kiel pafcelon por hato de la malamikoj. La demando pri ŝia sorto kiel kaptito certe turmentis tiujn, kiuj atendis ŝian revenon el la fronto. Sed plurmilaj vidoj de tiuj filmetoj ekkreis miton, por reala heronio. Rusoj tiam troviĝis antaŭ dilemno, liberigi ŝin kadre de interŝanĝo, kiel varon, aŭ murdi ŝin kaj tiel martirigi ŝin. Ŝiakaze la tutmondiĝo de ŝia herooa bildo verŝajne savis ŝin.

Jutuba filmeto, baldaŭ unumilionon-foje spektita, montras la dumnoktan liberigon de la 215 Azovstal-kaptitoj la 21an de septembro³. Fortaj emocioj ne bezonas vortojn por esprimiĝi en tiaj cirkonstancoj. Tamen Ptaška parolas kiel unua intervjuito. La morgaŭaj novaĵoj sciigas, ke kun siaj samsortanoj ŝi estas enhospitaligita. Ŝia patrino aperas sur TVekrano.

La 26an de septembro, nur kvin tagojn poste, aŭdiĝas ŝia deklaro:

«Mi revenis, tamen mi ne entute revenis, ĉar parto de mia koro restis tie for, en rusa malliberejo, ĉar ukrainaj soldatoj daŭre suferas en tiu infero, do nia ĉefa tasko estas daŭre bataladi por ĉiu ukraina soldato.»

La morgaŭon Ptaška dissendas filmeton per la telefona *TikTok*. Pala ŝi alparolas vizaĝon rekte kontraŭ la kamerao. Ŝia tono estas grava. Kaj la saman tagon per sia persona paĝaro ĉe Instagram Ptaška skribas:



«La cetero de la arkivaĵo pri la subtera kantado estas savita. Ŝajnas al mi, ke ĝi datumas de antaŭ duonjarcento. Meze de ruinoj kaj cindroj, ni plubruligis la fajron de la vivo per niaj varmaj koroj. Kiam estis malfacile, ili kantis; terure, ili kantis; kiam ŝajne venis fino, ili kantis. Kaj ili plu laboris. 24 horojn ronde de l' horloĝo, libervole, senĉese, nepre. Malesperon forpelis fera kunhelpo, senesperon frateco, lacecon forto de la naskiĝgrundo, bedaŭron la fido en la ukraina popolo.

Tie ni batalis kontraŭ, kaj nun mi batalos por. Por ukrainaj militistoj, por estonteco de veraj herooj, por ĉiu militkaptito, kiu devas reĥjmenigi. Mi kantados tiel longe mi vivos. Mi estas vivanta dum mi batalas. Mia armilo estas kanzono.»

Kaj tiuj vortoj denove vekos plurajn centojn da komentoj de admirantoj, ĉefe admirantinoj, kiuj sentas sin persone alparolitaj kaj tial kortrafitaj. Plej multaj montras sincerajn kortuŝojn, dankas al la defendantoj de la lando, vokas al superaj fortoj por beni kaj helpi la ukrainan armeon, kun penso al mortintoj kaj glorigas Ukrainion.

La 15an de oktobro «*El la naŭ cirkloj de l' infero, tiu ĉi estis la lasta!*» deklaras la «*legenda birdo*» de Azovstal dum matenmanĝo sur televidscenejo, kie ŝi estis akceptita kun blua kaj flava florbukedo kaj ĉirkaŭbrakumado.

Kaj la morgaŭon, Ptaška estas filmita en Kijivo⁴. Ŝi rajtis eliri kelkajn horojn el la hospitalo, kie ŝi plu sekvis reedukan terapion, sed volonte al ĵurnalistino ŝi respondis kun entuziasmo kaj ridetante kaj ŝerceteme. Ŝi leĝere parolis pri sia kaptiteco, liberigo, pri sia sopiro trinki kafon en kvietaj Kijivo. Ŝi ja scias, kiel la informservoj uzas ŝian bildon kaj ŝia aktora profesio ne dubeble helpis al ŝi por prezenti tiun personaĵon, kiun atendis, bezonis la ukrainan popolon rezistantan. Se pozo kun mitralo sur foto dum la Mariupola sieĝo povas aperi kiel defia propagandilo, ankaŭ la elekto de soldataj vestoj kaj ŝuegoj dum tiu lasta intervjuo ne kongruas kun junulino promenanta kelkajn horojn el hospitalo. Do ankaŭ tiam ni konsciu, ke Ptaška rolas. Ŝi rolas ekzemplan ukrainan kuraĝulinon tian, kian sopirus esti multaj suferantaj virinoj. Kaj nenaive ni pensu, ke la tuto estis profesie elpensita kaj programita; eĉ la kafpokalo, kiun ŝi tenas dum la tuta intervjuo, kaj sur kiu kelksekunde facile legeblas detalbilde plenekrane la vortojn «*Enjoy the GOOD LIFE*» kun GOOD blukolore kaj sube LIFE flave; ne hazarde en la usona lingvo por traduki *Ĝuu la belan vivon... Carpe diem!*

Kiujn kanzonojn kantis Ptaŝka en la mallumo de la subgrunda rifuĝejo?

Ne nur ŝia voĉo kaptis la atenton en la mallumo de la Azovstal-subtero. Ankaŭ gravas la elektitaj kantoj.

La retfilmetoj aŭdigas kanzonojn de la historia Organizaĵo de la Ukrainaj Naciistoj Revolucia (OUNR), gvidata de Stepan Bandera dum la dua mondmilito. «Зродились ми великої години» (ni naskiĝis je glora horo), «Батько наш Бандера» (Patro nia, Bandera), sed ankaŭ rokaĵon de Skryabin «Спи собі спокійно» (Bone dormu).

La unua estas senambigue patriota kanto, kiu de komence ĝis fine kongruas kun la situacio kaj facile kompreneblas, ke Ptaŝka sukcesis restimuli dolorigitajn animojn kaj refortigi tutan suferantan grupon per ĝia kunkantado. Libera traduko de la dua, tria kaj kvara strofoj tekstas:


«(...) Kaj jen ni en la batalo de la vivo,
Fortikaj, nerompeblaj kiel granito.
Ĉar ploroj neniam portis liberecon al iu ajn,
Kaj kiu batalas, venkas la mondon.

Ni volas nek gloron, nek salajron,
Ni volas la lukson batali:
Pli milde estas morti batalante
Ol vivi katenigitaj kiel muta sklavo.

Jam sufiĉas ruinoj kaj konfliktoj.
Ne plu batalu frato kontraŭ frato.
Sub la blua kaj flava flago de la libereco
Ni unuigu ĉiujn niajn grandajn popolojn. (...)»

En la dua kanto, kiu jam en sia titolo signas la inklinton, Stepan Bandera estas komence kaj refrene kantita kiel «nia patro» kaj Ukrainio kiel «nia patrino». Kaj la oka strofo de la kanto denuncas:

«(...) ni ne harmonie vivis kun la Moskvanoj,
Ni batalis kontraŭ Petro (la granda).»



Ptaŝka, ribelema poetino

15jara Ptaŝka publikigis sian poemon: Настав вже наш час!⁵ - Alvenis nia hor'. Legado de tiu poemo lasas impreson de maturiĝanta adoleskantino, konscia kaj kritikema rilate la socion, en kiu ŝi vivas. La lasta verso «Necesas liberigi patrinon Ukrainio el prirabo de stultuloj.» aperas kiel konforma al ŝia aktuala akvivado. Tamen la teksto datumas de 2015. Ĉu do la tiama kolero direktiĝis kontraŭ la registaro demokratie elektita post la Majdana revolucio en 2014?

Alvenis nia hor'!

Realeco ununuras. Paraleloj abundas.
Reale vi senesperige frandas la vivon.
Preterpasante milojn da siluetoj,
Kiuj jam delonge perdis vizaĝon.
Ĉar matene ĉiu surmetas elpensitan maskon,
Por reludi la skribitan rolon.
Je la limo de pensoj ni estas kvazaŭ katenigitaj en kaĝoj.
Tiel ke iu povu kontroli nin pli facile.
Estu afabla kaj vi estos stampita:
«normala» kun atesto «rajtas ekzisti».
Tiru vian vivojugon, homo,
sed ni daŭre torturos vin.

Realeco ununuras. Paraleloj abundas.
Vekiĝu amiko mia. La sonoriloj ĉe la urbodomo jam sonoradas.
Alvenis nia hor'! Pri dormo, sufiĉe!
Necesas liberigi patrinon Ukrainio el prirabo de stultuloj.

Originale Настав вже наш час!
Kuntradukis Volodimir Hordienko kaj
Marcelo Redulez



La stelo estingiĝis

Stelo tie brilis, kaj estingiĝis.
Kviete dum nokto, ne plu.
Ĉar al ŝi ĉi amo ne sufiĉis.
Ja hurlu, nur krii en bru'.
Longe ŝin neniuj alrigardis.
Teneraj poemoj jam for,
En apogepenso stel' finardis,
Post vundoj, turmentoj kaj plor'.

Miliardoj da steloj ĉiele,
da astroj brilantaj eĉ pli.

Sed jen, nur por vi brilantan stelon
Estingis vi per apati'.

Originale Зірка погасла

*El la ukraina kuntradukis Katja Gradzion kaj
Marcelo Redulez*

Fontoj:

(1) <https://te.20minut.ua/lyudi/ptashka-zi-stali-yaku-ne-zlamati-istoriya-spivochoyi-oboronitsi-azovst-11602147.html>

(2) <https://www.youtube.com/watch?v=IFO-auNwxVo>

(3) <https://www.youtube.com/watch?v=u6PtFH-ET5E>

(4) <https://www.youtube.com/watch?v=40VAtPNFBUo>

(5) <http://www.poetryclub.com.ua/getpoem.php?id=602430>

Kaj cetere:

<https://www.radiosvoboda.org/a/azovstali-spiv-medyk-mariupol/31906651.html>

<https://www.unian.ua/society/ptashka-z-azovstali-pokazalas-na-video-mati-prokomentuvala-rolik-okupantiv-11985420.html>

<https://vikna.tv/istorii/rozpovidi/zavzhdy-lyubyla-spiv-ta-dopomagala-lyudyam-istoriya-ptashky-z-azovstali-vustamy-materi/>

<https://glavred.info/ukraine/eshche-raz-by-poechala-v-mariupol-v-seti-poyavilos-video-doprosa-v-plenu-ptashki-s-azovstali-10410248.html>

<https://zn.ua/ukr/UKRAINE/ptashka-u-klitsi-propahandisti-opublikovali-intervju-iz-zakhisnitseju-azovstali.html>

<https://telegraf.com.ua/ukr/ukraina/2022-09-19/5716935-plennaya-zashchitnitsa-azovstali-ptashka-poyavilas-na-video-rossiyan-v-kakom-ona-sostoyanii-i-hto-o-ney-izvestno>

https://24tv.ua/ptashka-azovstali-zhiva-rosiyi-pokazali-video-katerinoyu-polishhuk_n2160320

<http://www.poetryclub.com.ua/author.php?id=15409>


<https://news.obozrevatel.com/show/people/zashchitnitsa-azovstali-ekaterina-polischuk-pokazala-svoi-arhivnyie-foto-tolko-cherez-god-ya-poluchu-psevdo-ptashka.htm>



Artaĵo de Tanya Kornienko

Pretas ni!

Adapto de teksto gurge rekantita dum la manifestacioj en Francio. Jam de la Flav-veŝtuloj kaj poste de la protestantoj kontraŭ la reformo de la pensioj.



Pretas ni! spitas ni!
Spit! al prezidanto jen ni tie ĉi!
Por honor' de l' laborist'
Por pli bona la ekzist'
Spit! al prezidanto jen ni tie ĉi!

Pretas ni! spitas ni!
Spit! al prezidanto jen ni tie ĉi!
Per pli alta la salajr'
dece vivu ĉiu ajn
Spit! al prezidanto jen ni tie ĉi!

Pretas ni! spitas ni!
Spit! al prezidanto jen ni tie ĉi!
Sen laboro trans la strat'
Fortas ni kun sindikat'
Spit! al prezidanto jen ni tie ĉi!

Kanto de manifestantoj kontraŭ la franca prezidanto Macron adaptita de Marcelo

Hej! Surherbeje la viburno ruĝa!

J = 100 *Stepan Charnetsky - trad. Petro Palidova*

Sur-her - be - je la vi-burno ru - ĝa kli - nis tris-te sin,

Mal - ga - ji - ĝis i - al ni - a glo - ra land' U - kra - i - na.

Sed ni ku - ne la vi-burnon ruĝan supren-i - gos, U - kra - i - non

ni-an landon gloran hejhej re - gaj - i - gos ni! - i - gos ni!

The musical score is written on four staves. The first staff is in 2/4 time with a tempo marking of J = 100. The key signature has one sharp (F#). The lyrics are written below the staves. The fourth staff includes first and second endings, marked with '1.' and '2.' above the notes.



Sennacieca REVUO



Sennacieca Asocio Tutmonda